

Urbeto ĉe Limo

Verkis Shen Congwen

Tradukis Vejdo

e-librigita de Elerno

majo, 2015



Shen Congwen (1902-1988)

Antaŭskribo

Por kampuloj kaj soldatoj mi havas neeldireban delikatan amon, kiu videbliĝas en ĉiuj miaj verkoj. Kaj mi neniam kaŝas ĝin.

Mi naskiĝis en tia urbeto, kia priskribita en miaj verkoj. Miaj avo, patro kaj onkloj ĉiuj servis en armeo, iuj el kiuj finis sian vivon sur la militista posteno kaj aliaj neeviteble finis sian karieron kiel armeanoj. Kiam mi priskribas iliajn amon kaj malamon, ĝojon kaj malĝojon, de la flanko de la mondo, kun kiu mi kontaktiĝas, eĉ se mia plumo estus tiom mallerta, mi ne devias malproksime de la vero, ĉar ili estas rektanimaj kaj honestaj. En la vivo, ili sin montras ekstreme grandaj en kelkaj flankoj kaj ekstreme banalaj en aliaj, kaj en temperamento, ili impresiĝas ekstreme belaj en kelkaj flankoj kaj ekstreme trivialaj en aliaj. En mia verkado pri ili, mi nature portretas ilin laŭ la vero, por ke ili povu esti pli humanaj kaj pli proksimaj al la homa naturo. Pro tio, la verko eble fariĝis sensignifa entrepreno. Al tiuj legantoj, kiuj plenkreskis kaj edukiĝis en urboj, tiu ĉi verko malproksimiĝas de ilia postulo, sed ili bezonas alispecan verkon, kion mi scias.

Laŭ nuntempa moro, literaturaj teoriistoj, kritikistoj kaj plejmulto de legantoj facile naskas malplezurajn sentojn, legante ĉispecajn verkojn. Tiuj antaŭaj esprimas sin *ne elmodiĝintaj*, dirante, ke Ĉinio ne bezonas ĉispecajn verkojn nuntempe; tiuj lastaj montras sin *maltrankvilaj pri elmodiĝinteco* kaj ili ne volas legi ĉispecajn verkojn. Kio estas *elmodiĝo*? Eble tiuj kun iom da racio neniam komprenas ĝian sencin. Sed ĉu plejmulto de homoj ne timas esti elmodiĝintaj? Mi volas diri, “Ĉi tiu verko ne celas la plejmulton.” Tiuj, kiuj jam legis kelkajn binitajn librojn pri literatura teorio aŭ literatura kritiko, aŭ legis samtempe amasojn da klasikaj kaj nuntempaj majstroverkoj, ofte ne permesas al si, ekster sia “erudicio”, koniĝi kun aferoj en aliaj lokoj en Ĉinio. Eĉ se ĉi tiu verko hazarde kongruas kun iu teorio de literaturo, kritikistoj superŝutas ĝin per laŭdoj, kiuj ankoraŭ neeviteble fariĝas humiligo al la aŭtoro. Ĉar ili ne emus akiri komprenojn pri la veraj amo kaj malamo, pri la veraj tristo kaj ĝojo, ili ne povus taksii la gajnon kaj perdon de ĉi tiu verko — ne por ili ĉi tiu libro destinita.

El tiuj diletantoj de literaturo kaj arto iuj estas universitataj studentoj kaj aliaj mezlernejanoj, kiuj dise loĝas en dense loĝataj metropoloj de la lando. Ili ofte honeste kaj naive konsumas sian tre valoran tempon por legi literaturajn librojn freŝe eldonitajn. Ili, kune kun teorigoj, kritikistoj, saĝaj eldonistoj kaj mensogemaj informistoj en literature rondo, kreas sinergie malbonan moron, kiu regas kaj jugas ilin mem. Samtempe ilia vivo ankaŭ malproksimas de la mondo priskribita en ĉi tiu libro. Ili ne bezonas ĉi tiun verkon, dum ĝi ankaŭ ne esperas inkludi ilin kiel legantojn.

Teorigoj ne maltrankviliĝas elbuŝigi vortojn, ĉar ili povas preni kiel referencin kaj ateston el la teorigoj en eldonaĵoj de diversaj landoj; kritikistoj povas pasigi sian tutan vivon en glorigo aŭ detruado de sia propra reputacio, ĉar ili devas atribui malgrandan favoron aŭ malgrandan plendemon al verkistoj kaj verkoj. Multo da legantoj, sen distingo de siaj gustoj aŭ kredoj, havas verkojn por legi. Por montri sian zorgemon al leganta amaso, ĉu troviĝas multaj, kiuj, laŭ ilia gusto, turniĝadas kaj ŝanĝiĝadas kiel turbo? Eĉ se ĉi tiu libro ne estus negata de teorigoj kaj kritikistoj, kiuj dominas la multon, nek tute de dominata multo da legantoj, la aŭtoro de ĉi tiu libro jam intencas forlasi ĉi tiun “multon”.

Ĉi tiu libro estas preparata por tiuj, kiuj “jam forlasis lernejon aŭ neniam alproksimiĝas al la lernejo aŭ konas iom da ĉinaj lingvaĵoj kun la nivelo kiun neniel atingas la literaturaj teorigoj,

literaturaj kritikoj kaj novaĵoj de mensogoj kaj famoj, sed vivante en ĉi tiu socio, montras grandan zorgemon al ĉiuj bonoj kaj malbonoj de la tuta nacio tra tempo kaj spaco”. Ili vere scias, kiel statas la nuntempa kamparo, kaj volas scii, kiel aspektis la kamparo en la pasinteco, tiel ke ili volantas ekkoni el ĉi tiu libro iom pri la kamparo kaj soldatoj, kiuj vivis en ĉi anguleto de la mondo.

Eĉ se la mondo, kiun mi priskribas, estas tute fremda al ili, iliaj toleremo kaj fervoro ĉerpi konsolon kaj sciojn el unu libro ebligas ilin finlegi ĉi tiun libron senhasteme. Pli ol tio, mi provizos al ili ŝancon por fari kontraston en legado. Mi, en alia verko, mencias la enlandan militon dum lastaj dudek jaroj, kies unua celo estas tiuj kampuloj, kiuj pro granda premo sur siaj temperamento kaj animo, perdis originajn simplecon, diligetecon kaj ŝparemon, trankvilecon kaj honestecon, kaj reduktiĝis al tiel nomata nova umo. Pro troa impostkolektado kaj opia venenado, ili jam fariĝis ekstreme malriĉaj kaj pigraj. Mi volas fari senpretendan priskribadon pri la ĉagreno kaj maltranvileco de malgranduloj dum ĉi tiu nacio, pelate de historio, estas ŝanĝanta kaj progresanta al nekonata destino, kaj pri la ideoj kaj deziroj “pluvivi” kaj “kiel vivi” kaŭzitaĵoj pro subnutriteco. Miaj legantoj estas raciaj homoj, kiuj, surbaze de la racio, montras iom da zorgemo pri ŝanĝado de la nuna Ĉinio, ekkonas la pasintan grandecon kaj nuntempan dekadencan de la nacio dum ili sin okupiĝas pri la la granda afero de la nacia renaskiĝo en silento kaj soleco. Ĉi tiu verko eble donas al ili iom da sopiremo al paseo aŭ amaran rideton aŭ koŝmaron aŭ probable kuraĝon kaj memfidon.

skribita je la 24-a de aprilo, 1934

Ĉapitro 1

1

Oriente troviĝis oficiala vojo¹ de Siĉŭano-provinco al Hunano-provinco. Ĉe la limo de la okcidenta Hunano la vojo preterpasis montozan urbeton “Chadong”, kie fluis rivereto kun blanka pagodeto ĉe la bordo. Je ĝia piedo lokiĝis izola kabano, kie vivadis maljunulo, knabino kaj flava hundo.

La rivereto ĉirkaŭfluis la montbazan elstaraĵon kaj, post distanco de unu kaj duona kilometroj, konverĝis en la riveron ĉe Chadong. Se oni travadis la rivereton kaj transgrimpis monteton, la distanco kovrita mezuris nur duonkilometron ĝis la urbeto Chadong. La fluo de rivereto aspektis kiel pafarko, dum la montvojo kiel ŝnuro streĉita inter du ekstretoj de arko, tial la longeco inter ambaŭ iom diferencis. La rivereto larĝis proksimume sep metrojn kun grandaj plataj ŝtonpecoj pavimitaj sur la fundo. La kvieta akvo tiel klaris, ke fiŝoj videbliĝis naĝantaj ir-reire. Kiel akvovojo konektanta Siĉŭanon kaj Hunanon, la rivereto ŝveliĝis aŭ malleviĝis de tempo al tempo. Pro limigo de financo, pramboato disponiĝis ĉi tie anstataŭ ponto. La pramboato povis enteni ĉirkaŭ 20 veturantojn unufoje. Por pli granda nombro da veturantoj, ĝi ripetade ir-reiris trans la rivereton. Sur la pruo de boato estis plantita bambua stango, sur kiu pendis movebla fera ringo, kaj eluzita kablo streĉiĝis transverse super la rivereto inter ambaŭ bordoj. Kiam oni faris transiron, alkrōĉis la feran ringon al la kablo, la pramisto malrapide kondukis la boaton transen per mantirado de la kablo. Tuj proksime al la transa bordo, la boatisto, kriante, “Malrapide, malrapide!”, eksaltis sur la bordon. Firme tenante la feran ringon, li sekurigis, ke ĉiuj veturantoj, homoj kaj varoj, ĉevaloj kaj bovoj, surbordiĝis, kaj post momento ili malaperis malantaŭ la monteton.

La pramboato konstruiĝis per publika mono, tiel ke ne pagado necesis por veturantoj. Ĝenate pro nepago, kelkaj el ili ĵetis plenmanon da moneroj sur la plankon de la boato. La boatisto ĉiam levis monerojn unu post alia kaj ŝovis ilin en la manon de la ĵetinto, dirante:

“Mi jam havas tri dekalitrojn da rizo kaj sep cent monerojn kiel rekompenco. Jam sufiĉe. Mi ne volas tion!”

Sed tio ne eblis, ĉar iuj el la veturantoj, kiuj senpage transportiĝis trans la riveron, insiste donis kelke da mono por rekompenci la pramlaboron. La boatisto ne tute rifuzis pro varmkoreco de donintoj, sed por eviti konsciencan ĝenadon, li konfidis la donacitan monon al konato por aĉeti teon kaj tabakon en la urbeto Chadong. Li ligis la aĉetitan bonkvalitan tabakon en malgrandajn faskojn kaj enŝovis ilin en sia zono. Kaj kiam iuj pramatoj bezonis ĝin, li malavare donacis ĝin. Kelktempe, rimarkinte iujn veturantojn fiksi sian atenton al la tabako ĉe lia zono, li tuj alligis tabakfaskon al ilia pakaĵo, dirante, “Fumu ĝin. Ĝi estas bona kaj en kvalito kaj gusto. Decas doni ĝin al aliaj kiel donacon!” Dume la teon li metis en grandan vazon en junio kaj infuzis ĝin per boligita akvo por malsoifi pasantojn.

La pramisto estis tiu, kiu loĝis sube de la pagodeto. Li jam aĝis 70 jarojn. Ekde la aĝo de dudek jaroj, li kondukis la pramboaton ĉe ĉi tiu rivereto. Dum kvindek jaroj, li jam pramis multege da veturantoj. Kvankam li devus halti por ripozi en tiom granda aĝo, la Ĉielo tamen ne

¹ *Oficiala vojo: la larĝan vojo finance konstruita de loka registaro.*

permesis al li ripozi, kvazaŭ li ne povus apartigis sin de tia vivo. Li neniam pensis pri la signifo de sia devo al si mem, sed kviete kaj sindone pluvivadis tie. Anstataŭ la Ĉielo, la knabino ĉiumomente akompananta lin igis lin senti forton de la vivo ĉe sunleviĝo kaj ne pensi pri morto ĉe sunsubiro. Lia amikoj estis nur la pramboato kaj la flava hundo, kaj lia ununura karulo tiu knabino.

La patrino de la knabino, solfilino de la maljuna pramisto, antaŭ dek kvin jaroj, sekrete ekhavis amaferon kun soldato en Chadong malantaŭ la dorso de sia honesta patro. Kiam ŝi gravediĝis, la soldato garnizonanta en la urbeto volis fuĝi kune kun ŝi al la malsupra baseno de la rivero. La fuĝado decidis, ke la soldato devus iri kontraŭ sia devo kaj la virino devus forlasi sian solecan patron. Post konsiderado, la soldato, vidinte ke ŝi ne havas kuraĝon forkuri, ne volis ruinigi sian reputacion kiel soldato. Pensante, ke, pro neeblo kunvivado, ili kune iru al morto sen ajna ĝenado de aliaj, li sin mortigis per veneno. Dume la virino, domaĝema pro la infano en la ventro, hezitis faris decidon. Sciiĝinte pri la afero, la pramisto-patro ne povis ŝuti pli da riproĉoj sur ilin, kaj afektis aŭdi nenion pri la afero. Ankoraŭ li vivis trankvilan vivon kiel antaŭe. Kun honto kaj kompatemo miksitaj, la filino restadis ĉe la patro. Kiam la infano naskiĝis, ŝi mortigis sin per trinkado de troa malvarma akvo ĉe la rivero. Preskaŭ mirakle la forlasita infano plenkreskiĝis 13-jara en palpebrumo. Laŭ la vidaĵo de prospera freŝa verda bambuaro sur proksimaj du montoj, la maljuna pramisto laŭvole nomis ŝin Cuicui (ĉine: freŝa verdo).

Cuicui, nutrita per favoro de sunlumo kaj vento, havigis al si brunan haŭton kaj paron da okuloj klaraj kiel kristalo en la medio de verdaj montoj kaj riveroj. La naturo, kaj nutrante kaj kultivante ŝin, dotis ŝin per naivo kaj viglo kiel etan beston. Bela kiel kapreolo sur la montsupro, ŝi volis nek fari kruelaĵojn nek ekhavi ĉagrenojn nek eksplodi per kolero. En ordinara tempo, rimarkante la priatenton de fremdulo en pramo, ŝi sendis fiksan rigardon al li, ŝajnigante, ke ŝi fuĝas en profundan monton ĉiumomente, sed post kiam ŝi ekkonis, ke la fremdulo ne havas malican motivon, ŝi denove senĝene ludis kun akvo.

Malgraŭ sunaj aŭ pluvaj tagoj, la maljuna pramisto atendadis sur la pruo. Kiam li pramigis veturantojn, li, iom klinante sian korpon, irigis la boaton trans la rivereton per tirado de bambua kablo per ambaŭ manoj. Laciĝinte, li kuŝis dormanta sur la roko tuj ĉe la rivereto. Kiam homoj krie petis por pramado ŝvingante siajn manojn sur la transa bordo, por ne vekti sian avon, Cuicui desaltis en la boaton kaj lerte transigis ilin anstataŭ li. Ĉio, kion ŝi lerte faris, estis en ordo. Kelktempe, kiam okazis, ke ŝi, ŝia avo kaj flava hundo troviĝis en la sama boato, ŝi helpis sian avon en pramado. Proksime al la bordo, kiam Avo admonis al pramitoj, “Malrapide, malrapide.”, la flava hundo, prenante ŝnuron per buŝo, jam unue elsaltis sur la bordon kaj forte tiris la boaton al la bordo, kvazaŭ ĝi konus kiel plenumi la taskon.

En senventa kaj suna vetero, kiam ne troviĝis pramitoj pro senbazara tempo en la urbeto, Avo kaj Cuicui sidigis sin sur la rokegon antaŭ la pordo por sunumi sin. Kelktempe, ĵetinte lignopecon de la altaĵo en akvon, ili instigis la hundon desalti de la rokego por repreni ĝin per la buŝo, aŭ Cuicui kaj la flava hundo, streĉante siajn orelojn, asŭkultis al Avo rakonti militajn historietojn okazintajn en la urbeto antaŭ multaj jaroj, aŭ Avo kaj Cuicui, per bambuaj flutoj je la buŝo, muzikis la pornuptajn ariojn. Kiam venis pramitoj, la maljuna pramisto, demetinte fluton, iris sola al la boato por transveturigi ilin, dum Cuicui, vidinte la boaton moviĝi, akutvoĉe kriis:

“Avĉjo, avĉjo, mi ludu fluton, vi kantu!”

En la mezo de la rivereto, Avo komencis kanti gaje. La raŭkvoĉa kantado kaj flutsonoj vibrantaj en kvieta aero alportis iom da viveco al la rivereto. Fakte la ripetado de kantado dronigis ĉion en pli da kvieto.

Kelktempe, kiam transpason bezonis bovidoj de orienta Siĉŭano tra Chadong, gregoj da ŝafoj aŭ palankeno de novedzino, Cuicui nepre volis fariĝi pramanto. Starante sur la pruo de la boato, ŝi lante tiradis la kablون por malrapidigi la transigon. Post kiam bovidoj, ŝafoj aŭ palankeno surbordiĝis, ŝi ĉiam sekvis ĝis la supro de la monteto kaj okule akompanis ilin malproksimen. Post tio, ŝi revenis al la boato kaj tiris ĝin al la bordo proksime al sia kabano. Dumtempe, ŝi imitis subvoĉe la blekadon de ŝafidoj aŭ muĝadon de bovinoj, aŭ kolektinte faskon da sovaĝaj floroj, ŝovis ĝin en hararon por ŝajni sin novedzino.

La urbeto Chadong distancis nur duonkilometrojn de la pramejo. Kiam necesis aĉeti kuiroleon kaj salon aŭ alkoholaĵon okaze de festotagoj, anstataŭ Avo, Cuicui, akompanata de la flava hundo, iris al la urbeto por fari aĉetojn. Ĉe la butikoj, faskegoj da rizvermiĉeloj, vazego da sukero, pendaĵoj da petardoj kaj ruĝaj kandeloj donis profundan impreson al ŝi. Kiam ŝi revenis al Avo, ŝi ripetade pribabilis tiujn aĵojn por longe. Tie ankaŭ troviĝis multe da ĵonkoj el la malsupra baseno, de kiuj dekoj da boatanoj okupiĝis pri malŝarĝado de ĉiutagaj varoj. Tiuj ĵonkoj estis multe pli grandaj kaj interesvekaj ol pramboatoj, kio ankaŭ ne facile viŝebla el la memoro de Cuicui.

2.

La urbeto Chadong estis konstruita kun la rivero fronte kaj monto dorse. Ĉe la flanko de la monto, la urbemuro serpente rampis sur la monto. Ĉe la rivero ekster la urbeto instaligis kajoj por malgrandaj kovritaj boatoj. La boatoj direktantaj al la malsupra baseno transportis aleŭrit-oleon, krudan putsalon kaj tinkturitajn ĉinajn gajlojn, kaj tiuj venantaj de la malsupra baseno estis ŝarĝitaj per kotonoj, kotonaj fadenoj, ŝtofoj, marproduktoj kaj diversaj varoj. Apudrivera strateto ligis ĉiujn kajojn. La plejmulto de domoj ĉe la strato estis konstruitaj, pro limigo de spaco, kun duono de dombazo sur la tero kaj alia super akvo, tiel nomataj palafitoj. Post kiam la rivero ŝveliĝis kaj la riverakvo malrapide invadis en la straton, la loĝantoj en la strato transmetis unu finon de longa eskalo sur la tegmentrandon de sia domo kaj alian sur la urbemuron. Sakrante aŭ grumblante, ili, portante pakaĵojn, litaĵojn kaj rizvazojn, eniris la urbeton laŭ la eskalo, kaj post kiam la akvo malleviĝis, ili hejmenrevenis tra la pordego de la urbeto. Iujare, kiam inundo invadis pli forte kaj forportis kelke da palafitoj, ili gapadis stupore starante sur la urbemuro. Tiuj, kiuj suferis perdojn, same staris kiel gapantoj, povante paroli nenion pri la perdoj, kiuj similis tiujn nesaveblajn malfeliĉojn aranĝitajn de la naturo. Dum superakviĝo de la rivero, oni povis vidi de la urbemuro larĝigitan riversurfacon kun torentaj fluoj, kaj ankaŭ domojn, bovojn, ŝafojn kaj arbegojn floris laŭflue de la supra baseno. Ĉe la loko de malrapidaj fluoj, antaŭ la dogana kontrolboato ĉe kajo, ofte vidiĝis sampanoj, kies boatistoj, vidinte alflosantajn hejmbeston, pecon da ligno, malplenan boaton aŭ boaton kun virino kaj plure krianta infano, haste alremis ĝis ili atingis ilin pli malsupre de la fluo, kaj ligis ilin per longa ŝnuro kaj remis al la bordo. Tiuj bravaj kaj honestaj homoj, tiel riĉaj-amaj kiel sindonemaj, havis la sama karakteron de lokanoj. Savante ĉu riĉaĵojn aŭ homojn, ili montris sian lertecon kaj bravecon en la plezuraj aventuroj, vekante varmajn aplaŭdojn ĉe spektantoj.

Tiu rivero estis fama Youshui-rivero en la historio, kies nova nomo estas Blanka Rivero. Kiam ĝi kunfluas kun Yuanshui-rivero ĉe Chenzhou, ĝi aspektas iom malklare, kiel montfonto fariĝas

malklara ĉe fluejo. Se oni veturas kontraŭflue, ili povas vidi la fundon eĉ tra la akvo profunda 9 aŭ 15 metrojn. Sub la brila suno, vidiĝas klare blankaj ŝtonetoj kaj striitaj agatŝtonoj ĉe la fundo. En la akvo fiŝoj naĝas ir-reire kvazaŭ flosantaj en aero. Sur ambaŭ bordoj troviĝas altaj montoj, kie kreskas maldikaj bambuoj uzeblaj por paperfarado, tutjare kun malhele verda koloro okulplaĉa. Apudriveraj domoj plejparte situas en la ĉirkaŭbrakumo de persikarboj kaj abrikotarboj. Kiam venas printempo, oni certe povas trovi inter persikarboj kaj abrikotarboj domojn, kie certe vendiĝas alkoholaĵo. En somero, la brile purpuraj vestaĵoj sekigataj sub la suno servas kiel flagoj por indiki la loĝejojn. Dum aŭtuno aŭ vintro, ĉiuj domoj, ĉu sur rokoj ĉu apud la rivero, panorame falas en vidkampo. Tiuj domoj kun argilaj muroj kaj nigre grizaj tegoloj, kiuj ĉiam ŝajnas lokitaj en decaj situoj, tute akordiĝas kun ĉirkaŭa medio, prezentante tre plezurigan bildon al okuloj. Por vojaĝisto, kiu iom interesiĝas pri poemoj kaj pentraĵoj, se li lokas sin en boato por tridek-taga veturo, li ne tediĝas iome, ĉar ĉie troviĝas mirakloj de naturo, brave kreitaj kaj rafinitaj, kiuj lin allogas.

La Blanka Rivero fontis el la limo de Siĉŭano-provinco. La boatoj veturantaj supren laŭ la Blanka Rivero povis atingi Xiushan de Siĉŭano, dum la sezono de akvoŝveliĝo de la rivero. En la teritorio de Hunano-provinco, Chadong estis la lasta kajo proksima al la limo. La akvosurfaco de la rivero ĉe Chadong mezuriĝis proksimume kvaronkilometron larĝa, sed dum malleviĝo de riverakvo en aŭtuno kaj vintro, la fluejo larĝis malpli ol sep metrojn en ĉirkaŭbrakumo de grizverdaj ŝtonebenejo. Ĝis ĉi tiu loko boatoj ne plu povis veturi supren laŭ la rivero. La varoj transportitaj de aŭ al la orienta Siĉŭano devis estis malŝarĝitaj de boatoj aŭ ŝarĝitaj en boaton ĉi tie. La varoj elirontaj estis ŝultre alportataj de portistoj per abiligna vekto, kaj tiuj envenantaj ankaŭ transportiĝis aron post aro per homa forto.

En la urbeto garnizonis bataliono da soldatoj, kiu estis reorganizita de armeo de Qing-dinastio, kaj sin lokis proksimume 500 hejmoj, plejparto de kiuj havis soldaton kiel familianon, krom tiuj etaj kapitalistoj, kiuj posedis kampojn kaj olefarejon, aŭ akaparis oleon, rizon kaj bobenojn da kotonaj fadenoj. Tie ankaŭ funkciis loka departemento de transita imposto, kies oficejo situis en la templo sur la apudrivera strato ekster la urbeto, kun longa flagrubando antaŭ ĝi. Kaj la departementestro loĝis en la urbo. Bataliono da soldatoj garnizonis en la malnova jamen-o² pri militaj aferoj. Ĉiutage la klarionisto ludis trumpeton por amuziĝo, kio memorigis, ke ĉi tie troviĝas garnizonantaj soldatoj, kaj la aliaj soldatoj ne aperis, kvazaŭ ili ne ekzistus. Dum vintraj tagoj oni povis vidi surstrate en la urbeto vestojn kaj legomojn sekigatajn antaŭ ĉiuj pordoj, batatojn kun sarmento pendatajn de tegmentrandoj, kaj palmfibrajn sakojn entenantajn tiajn nuksojn, kiaj kaŝtanoj kaj avelgrajnoj, ankaŭ pendataj de tegmentrandoj. Ĉie ĉe domanguloj kokoj kaj kokidoj ludis, klukante. Okaze vidiĝis viro segis sur la sojlo de sia domo aŭ dishakis brullignon per hakilo, kaj stakis la splititajn lignopecojn pagodforme. Kelkfoje vidiĝis kelkaj mezaĝaj virinoj en tre rigide lavamelitaj vestoj el blua tolo sub la blanka antaŭtuko desegne florumita, kiuj babilante klinis sin super la laboro sub la sunlumo. Ĉio ĉiam troviĝis en tia kvieto kaj ĉiuj urbetoj pasigis tagojn en tiaj simpleco kaj soleco. Porcio da kvieto pliigis ilian pensemon pri la vivo kaj iliajn sonĝojn. En ĉi tiu urbeto ĉiu, kiu vivis sian propran vivon dum la destinita tempdaŭro, kovis la neeviteblan inklinemon al amo kaj malamo al personoj kaj aferoj. Sed kion ili pripensis? Neniu sciis.

Loĝante sur la pli alta loko, oni povis, starante ĉe la pordo de sia loĝejo, rigardi okazaĵojn sur la transa bordo kaj la rivero. Kiam ĵonko alveturis, oni povis vidi demalproksime sennombrajn

² *Jamen-o: oficejo de registaro aŭ juĝejo*

haŭlistojn sur la transa bordo. Kelkaj el la haŭlistoj alportis kukojn kaj sukeraĵojn el la malsupra baseno por vendi ilin, kiam la ŝonko albordegis al la urbeto. Kiam ŝonko alproksimiĝis, la imago de infanoj certe iris al la haŭlistoj, dum la plenkreskuloj volis konfidi al ili neston da kokidoj aŭ du porkojn por ŝanĝi ilin kontraŭ paro da oraj orelingoj, du ĝang-ojn³ da solida maŝinfabrikita nigra tolo, vazo da sojsaŭco aŭ plifortigita vitra kovrilo de kerosena lampo, kiuj plej plaĉis al sia edzino.

Kvankam tiu ĉi urbeto estis trankvila kaj paca, kiel komercejo kaj komunikejo en la orienta Siĉŭano, ĝia apudrivera strato tamen havis sian apartan staton. Tie troviĝis gastejoj, kiuj estis destinitaj por loĝado de komencistoj, kaj barbarejoj, kiuj okupis fiksitan terenon. Kaj krome la straton ornamis restoracietoj, spicejoj, olevendejoj, saldeponejoj kaj tolvendejoj, tiuj butikoj, kiuj havis sian apartan funkcion, kaj ankaŭ butikoj provizantaj surboatajn puliojn el santalligno, bambuajn kablojn, vazojn kaj kaserolojn, kaj agentejoj varbantaj boatanojn. Sur la longa tablo antaŭ restoracieto ofte vidiĝis brune frititaj karpoj kun toŭfuo dekoritaj per ruĝaj kapsiktranĉaĵetoj, metitaj en malprofundaj pelvoj, apud kiuj staris dika bambua tubo kun ruĝaj manĝbastonetoj ŝovitaj en ĝi. Kiu volis pagi, tiu povis sidiĝi ĉe la longa tablo kaj elpreni paron da manĝbastonetoj per la mano. Alvenis virino kun delikate pentritaj brovoj kaj pudrita vizaĝo, kaj demandis:

“Ĉu vi volas dolĉan vinon aŭ alkoholaĵon, granda frato?”

La kliento, kiu, spritema kaj ŝercema, direktis sian firtemon al tiu edzino de la mastro, ŝajnis sin kolera kaj diris:

“Dolĉan vinon? Mi ne estas infano. Kial vi kolportas al mi dolĉan vinon!”

Do, oni ĉerpis fortan alkoholaĵon per bambua tubo el granda vazo kaj verŝis ĝin en krudan bovlon kaj tuj alportis ĝin al li sur la longan tablon. La alkoholaĵo nature estis forta kaj elspiris bonodoron. Se forta drinkus tro multe, li ebriiĝus. Pro tio oni ne emis drinki multe.

La butikoj de ĉiutagaj necesajoj vendis kerosenon, fremdlandajn lampojn konsumantajn kerosenon, incensilojn, kandelojn kaj paperon. Olevendejoj stokis aleŭrit-oleon. Saldeponejoj amase tenis krudan salon el salputoj de Siĉŭano. Tolvendejoj disponigis blankajn kotonfadenojn, ŝtofojn, kotonon kaj turbanojn el nigra krepo. En butikoj por surboataj uzaĵoj aĉetebles diverspecaj varoj en plena gamo, kaj eĉ iafoje fera ankro peza je pli ol kelkcent kilogramoj estis metita apud la vojo antaŭ la butika pordo, atendante eventualan aĉetanton. Tiuj, kiuj varbis boatanojn kiel sian profesion, t.e. vivantan de dokaj aferoj, sidis en sia hejmo sur la strato kun la pordo vaste malfermita tuttage, kie ofte en- kaj eliris boatposedantoj en nigra satena veŝto kaj krudkonduktaj boatanoj. Iliaj hejmoj ŝajnis tetrinkejoj, sed oni ne vendis teon, kaj ne estis opifumejoj, sed oni povis fumi opion tie. Tiuj venis ĉi tien interparoli pri negocado, tamen ĉiuj boatanoj, inkluzive remistoj kaj haŭlistoj faris regulon, ke oni ne diskutu pri ciferoj. Plejparto de ili venis por amuza renkontiĝo. Sub gvidado de “ĉefa intendanto” ili babilis pri lokaj okazaĵoj, la situacio de negocado de du provincoj kaj novaĵoj el la malsupra baseno. Kunvenoj, kolektado de mono kaj decidfarado pri kunvenprezidanto pere de kubĵetado plejofte okazis ĉi tie. En ilia negocado estis du ĉefaj aferoj: negocado pri boatoj kaj edzinoj.

Pro komerca disvolviĝo de metropolo kreiĝis parazitaj. En la apudrivera strato de tiu ĉi urbeto eĉ grupiĝis tiaj parazitaj, kiuj loĝis en palafitdomoj, por kontentigi la postulon de komercistoj kaj boatanoj. Tiaspecaj virinoj venis de ĉikaŭaj vilaĝoj aŭ estis forlasitaj de sia edzo, Siĉŭana soldato, kiu rekrutiĝis al Hunano kaj mortis sen reveno. Ili vestis sin per vestoj el silka imitaĵo kaj pantalonoj el flor-presita tolo, kun siaj brovoj pentritaj linie kaj granda surkapa hartubero ŝmirita per malmultekosta pomado elspiranta densan kaj vulgaran bonodoron. Dumtage kiam ili estis

³ Ĝang-o: tradicia ĉina mezurunuo de longo, valorata al 3.33 metrojn.

senokupaj, ili sidante ĉe la sojlo faris ŝuojn, sur kies pintoj ili brodis duoblajn feniksojn per verda kaj ruĝa silkfadenoj, aŭ kudris flor-broditan bluzon por sia boatan-amato, jen kaj jen ekrigardante pasantojn por pasigi la longan tagon. Aŭ apogante sin al la fenestro, kiu rigardis la riveron, ili direktis siajn okulojn al la boatoj, kiuj staplis varojn, kaj aŭskultis al ĉantado de boatoj, kiam ili surgrimpis mastojn. Dumnokte ili laŭvice akceptis komercistojn kaj boatojn, kaj zorgeme plenumis sian devon kiel putinoj.

En la limregiono regis simpla kaj honesta moro, tiel ke ankaŭ putinoj sin montris honestanimaj. Ili petis al nekonatoj pagi kaj kalkulis monon, antaŭ ol fermi la pordon kaj eki la aferon. Sed kiam ili akceptis konatojn, ne gravis la mono. Ili plejparte vivtenis sin depende de la komercistoj el Siĉŭano, sed ili plejofte naskis korinklinemon al boatoj. Tiuj paroj, kiuj formis profundan amsenton, mordetante lipojn aŭ kolojn unu al la alia, ĵuris, ke ili ne flirtu kun aliaj, post sia disiĝo. Dum kvardek aŭ kvindek tagoj, tiu boatano flosanta sur la rivero kaj ĉi tiu virino restanta en la urbeto ambaŭ stulte pasigis la tagojn iele trapele, kroĉigante sian koron al alies koro en la foro. Precipe la virino havis sinceran amsenton kaj sin montris nepriskribeble stulta. Se ŝia amato ankoraŭ ne revenis post la difinita tempo, ŝi ĉiam songis, ke, kiam la boato albordiĝas, viro ŝancele kuras de la saltotabulo al la bordo, rekte al ŝi. Se ŝi ekhavis suspekton pri li iutage, ensonĝe ŝi certe vidis lin kanti sur masto al la alia direkto, ignorante ŝin. La virino kun malforta karaktero ĵetis sin en la riveron aŭ englutis opion por mortigi sin en la songo, dum tiu kun dura temperamento kaptis tranĉilon kaj kuris rekte al la amata boatano. Kvankam ilia vivo iom fremdiĝis de la ĝenerala socio, iliaj larmoj kaj ĝojo tamen miksiĝis en sian vivon pro perdo de amo aŭ malamo. Tiele ili ankaŭ similis tiujn junulinojn en la alia mondo kaj iliaj korpo kaj koro estis plene maceritaj per tiom da amo kaj malamo, kiuj facile blindigis ilin kaj eĉ forgesigis ilin pri ĉio ĉirkaŭ ili. Se paroli pri la diferenco, ĉi tiuj virinoj estis pli sinceraj kaj pli proksimaj al menskonfuziteco. Mallongatempa kunvivado, longatempa "edziniĝo" kaj provizora aparteno al viro post fermita pordo estis pri negocado de virina korpo. Pro simpla kaj honesta moro de la loko tiuj, kiuj persone okupiĝis pri tio, ne konsideris tion malnobla kaj senhonta, kaj apudrigardantoj ne devis alpreni la vidpunkton de pedantoj por riproĉi kaj malestimi ilin. Fakte ĉi tiuj virinoj ne nur pli taksis senton ol profiton, sed ankaŭ strikte plenumis sian promeson kaj rigore regis sin. Kvankam ili servis kiel putinoj, ili estis pli fidindaj ol tiuj urbanoj, kiuj ĉiam havas moralecon kaj hontecon sur siaj lipoj.

La homo, kiu superregis en la kajo, estis nomata Sunsun. Li pasigis sian tempon iele trapele en la trupoj de Qing-dinastio, antaŭ ol servi kiel oficiro en la reputacia 49-a terarmea taĉmento de la revolucia armeo en 1911. Malkiel li, aliaj oficiroj fariĝis gravuloj aŭ famuloj, aŭ suferis senkapigon aŭ dispecigon de sia korpo. Pro sia lama piedo, kiun li suferis de sia infaneco, li revenis al sia hejmloko kaj aĉetis per iom da mono ŝparita de li blanklignan boaton kun ses remiloj. Li luigis ĝin al malriĉa boatmastro por transporti varojn ir-reire inter Chadong kaj Chenzhou. Lia bona ŝanco daŭris kaj la boato ne paneis dum ĵarduono. Li edzinigis per la profito, kiun li faris, bonhavan vidvinon kun blanka vizaĝo kaj nigraj haroj. Post kelkaj jaroj li havigis al si ok boatojn, grandajn kaj malgrandajn, edzinon kaj du filojn.

Kvankam lia kariero iris glate, li tamen, malavara kaj mon-donema, ŝatis amikiĝi kaj prodige helpi siajn amikojn en malfacilo, kaj pro tio li ne povis riĉiĝi parvenue kiel la komercistoj, kiuj negocis pri aleŭrit-oleo. Tial, ke li spertis la vivon kiel soldato, li plene sciis pri la suferoj de tiuj, kiuj klopodis ekstere, kaj komprenis la animstaton de malsukcesintoj. Kiam boatistoj bankrotiĝintaj pro boatpereo, preterpasantaj malmobilizitaj soldatoj kaj vagemaj kleruloj alvenis ĉi

tien por peti lian helpo pro lia renomo, li faris sian plejebulon helpi ilin. Unuflanke li akiris profiton el la entreprenado sur la rivero, kaj aliflanke tiel malavare disponigis sian monon al aliaj. Malgraŭ sia lama piedo li povis naĝi; kvankam li iris lame, li sin montris justa kaj senegoisma al aliaj. La reguloj de la rivera trafiko estis tre simplaj, ĉiuj surbaze de la longeformita kutimo. Se boato koliziis kun la alia kaj se boato damaĝis la intereson de alia boato aŭ alia homo, troviĝis la kutimaj metodoj por solvi la kazojn. Arbitraciado per tiuj metodoj bezonis aĝulon, kies moralo estis sendubinda. Aŭtune de tiu jaro la antaŭa superreganto de la kajo mortis kaj Sunsun anstataŭis lin. Tiam li estis nur dekkvin-jara. Li estis tiel racia kaj prudenta kiel justa kaj pacama, kaj ne interesiĝis pri mono, tial neniu levis oponon kontraŭ lia juneco.

Nun lia pli aĝa filo estis dekok-jara, kaj la alia dekses-jara. Fortikaj kiel bovidoj ili kapablis direkti boaton, naĝi kaj fari longan vojaĝon. Ĉion, kion la junuloj de ilia aĝo en la urbeto povis fari, ankaŭ ili kapablis lerte kaj sperte fari. La pliaĝa filo, kiel sia patro, grandanima, komprenema kaj libera de kutima rutino, dum lia frato, simile al sia patrino en temperamento, neparolema, elstariĝis per sia bele delikata aspekto, kiu sugestis saĝecon kaj sentoplenecon je la ekvido.

Ĉar tiuj du fratoj jam plenkreskis, ili bezonis trejnadon en diversaj flankoj de la vivo. Pro tio ilia patro sendis ilin vojaĝi unu post alia diversloken. Kiam la boato veturis malsupren laŭflue, ili plejofte servis kiel boatanoj sur sia propra boato, dividante dolĉecon kaj maldolĉecon kun aliaj boatanoj. Kiam venis la tempo remi, ili elektis la plej pezan remilon; en haŭlado ili gvidis la teamon de la haŭlistoj; sekigitaj fiŝoj, kapsikoj kaj malbonodoraj peklitaj legomoj estis iliaj manĝaĵoj; ili dormis sur la malmolaj holdotabuloj. Irante al la supra baseno, ili trenis sin sur la landvojo kunportante la varojn de la orienta Siĉŭano por negoci en Xiushan, Longtan kaj Youyang. Spite al frosto, varmego, pluvado aŭ neĝado ili devis iri la vojon en pajlaj sandaloj. Ili kunportis ponardon kun si por eventuala bezono. Kiam ili vole nevole defendis sin, ili tuj elingis la ponardon kaj starigis sin sur vasta tereno por atendi sian rivalon kaj korpe batali unu kontraŭ la alia. Tiam furoris la agmaniero por ili kaj similaj, ke “oni devas utiligi ponardon kontraŭ malamikoj, kaj ankaŭ por ligi amikojn”. Tial ili neniam perdis la ŝancon uzi ponardon, kiam necese. La trejnado ellerni, kiel negoci, trakti homojn, vivi en alia nova loko kaj defendi sian korpon kaj reputacion, ŝajne celis, ke ili fratoj ekhavigas al si kuraĝon kaj kavalirecon, kaj rezultigis, ke la duopo fariĝis tiel fortikaj kiel tigroj, afablaj kaj akomodigemaj, nek fiere mallaboremaj nek vante parademaj nek agresemaj pro sia potenco. Pro tio, kiam oni menciis la familian nomon de la patro kaj la du filoj en la limregino de Chadong, ili senescepte montris respekton al ili.

Kiam la du fratoj ankoraŭ estis tre junaj, la patro komprenis, ke la pliaĝa filo tute similas lin, sed li iom dorlotis sian duan filon. Pro sia senkonscia inklinemo li donis nomon Tianbao (Ĉielo protektas) al la unua filo, kaj Nuosong (La dio de Nuo⁴ donacas) al la dua. La sencoj de la nomoj respektive montris, ke homon aŭ aferon, kiun la Ĉielo protektas, pli aŭ malpli havas mankon, dum tion, kion la dio de Nuo donacas, laŭ la loka moro, oni ne devas iomete malestimi. Nuosong estis tre belaspekta, ke la lokanoj ne estis kompetentaj sufiĉe por laŭdi lian belecon kaj donis al li alinomon “Yue Yun”⁵. Kvankam neniu vidis “Yue Yun” mem per siaj propraj okuloj, ili tamen eltiris la impreson el la scenejo pri li kiel rolo de brava militisto, kiun Nuosong similis.

⁴ *La dio de Nuo: dio, kiu forpelas plagon laŭ ĉina legendo.*

⁵ *Yue Yun (1119-1142): la plej aĝa filo de Yue Fei (1103-1142), kiu estis la granda nacia hero kontraŭ invadantoj dum Song-dinastio. Kiam Yue Yun estis tre juna, li jam fariĝis generalo. En operoj oni prezentis la rolon de li kiel belaspektan kaj bravan militiston.*

3.

En ĉi tiu regiono, kie du provincoj limis unu al la alia, la milita komandanto donis atenton al sekureco kaj packonservado dum pli ol dek jaroj. Pro lia bona traktado pri lokaj aferoj, ne okazis ajna tumulto. La negocoj surriveraj kaj surteraj neniel stagnis pro milito nek pro banditoj. Ĉio troviĝis en granda ordo kaj la urbetanoj vivis en trankvileco. Krom ke ili malĝoje ĉagreniĝis pro bovo-morto, boato-renversiĝo aŭ homa morto en ilia hejmo, ili ŝajne ekhavis nenian senton pri tio, kiel malfeliĉe baraktis la popolanoj en aliaj lokoj de Ĉinio.

En tiu ĉi urbeto ĉe la limo la plej vivoplenaj tagoj estis la Drak-Boata Festo⁶, Mezaŭtuna Festo⁷ kaj lunkalendaro Novjaro, kiuj antaŭ la pasintaj tridek ĝis kvindek jaroj ekscitis la ĉi-tieanojn, sed ĝis nun neniom ŝanĝiĝas kaj restas la plej signifoplenaj tagoj al ili.

Dum la Drak-Boata Festo ĉiuj virinoj kaj infanoj de la loko surportis novan veston kaj sur ilia frunto ĉina ideogramo kun senco “reĝo” estis pentrita per realgara vino⁸. En tiu tago ĉiuj hejmoj nepre preparis fiŝaĵojn kaj viandon kiel manĝaĵojn. Ĉirkaŭ je la dekunua antaŭtagemeze ĉiuj lokanoj de Chadong jam tagmanĝis. Tiuj, kiuj loĝis en la urbeto ŝlisis la pordon kaj iris kun ĉiuj familianoj al riverbordo spekti la konkurson de drak-boatoj. Kaj tiuj, kiuj havis konatojn aŭ parencojn en la apudrivera strato, povis rigardi ĉe la pordo de palafitdomo, kaj aliaj rigardis, strarante ĉe doganejo aŭ sur kajo. La rem-konkurso de drak-boatoj komencis ie de la rivero kaj finiĝis antaŭ la pordo de doganejo, ĉar tiutage ĉiuj oficiroj, ranguloj de doganejo kaj lokaj eminentuloj kolektiĝis ĉe la pordo de doganejo por spekti la spektaklon. Kelkajn tagojn antaŭe oni jam faris preparojn en grupoj. Fortikaj kaj lertaj junuloj estis elektitaj kaj trejnitaj remi antaŭen kaj malantaŭen en la rivero. Multe malkiel la ordinaraj boatoj, la drak-boatoj estis kaj longaj kaj mallargaj, kun ambaŭ finoj alten turnitaj kaj la korpo pentrita per longaj vermilionaj linioj. Ordinare ili plejofte metiĝis en sekaj kavernoj ĉe riverbordo, kaj oni trenis ilin en akvon, kiam ili estis bezonataj. La drakboatoj povis enteni po dekok remistoj, unu gvidanto, unu tamburisto kaj unu gongisto. La remistoj tenis po mallonga remilo kaj remis antaŭen laŭ la malrapidaj aŭ rapidaj taktoj de la tamburo. Sidante sur la pruo, la gvidanto, kun la kapo kovrata per ruĝa tuko, svingis ambaŭmane du triangulajn komandflagojn dekstren aŭ maldekstren por gvidi la boaton. La tamburisto kaj gongisto ofte sidis en la mezo de la boato. Kiam la boato startis, ili tuj frapis la tamburon kaj gongon simple sonantajn “Dong-dang, dong-dang”, por reguligi la ritmon de remado. La boata rapideco tute dependis de la tamburaj frapsonoj. Kiam du boatoj konkursis furioze, la tamburo tondre sonis kaj la rigardantoj sur ambaŭ bordoj bruis per kuraĝigaj krioj, kio memorigis pri antikvaj bataloj sur rivero kun tondrado de tamburfrapoj. La boato, kiu antaŭiris, povis gajni premion: ruĝa balteo kun alpinglita arĝenta tabuleto, kiu estis pendigita ĉirkaŭ la kolo de ajna konkursanto de la venkanta boato por montri la gloron de la tuta boato. Ĉiufoje kiam unu boato gajnis venkon, tiuj agemaj soldatoj bruligis grapolojn de kvincent petardoj ĉe la bordo por celebri la triumfon.

Post boat-konkurso la komandanto de la garnizono, por esprimi ĝojon kumunan kun la popolanoj kaj pliigi la plezuron de la festo, disŝutis en riverakvon tridek verdkapajn viranasojn kun la kolo ligita per ruĝa tolrubando, por ke la naĝkapablaj soldatoj kaj popolanoj ĉasu la anasojn en la rivero. Kiu ajn sukcesos kapti anason, tiu fariĝos ĝia posedanto. Pro tio la rivero ŝanĝis la scenon. Ĉie sur la surfaco de la rivero troviĝis anasoj kaj naĝantoj, kiuj penas kapti anasojn.

⁶ La Drak-Boata Festo okazas en la kvina de la kvina monato laŭ ĉina luna kalendaro.

⁷ La Mezaŭtuna Festo okazas en la dekkvina de la oka monato laŭ ĉina luna kalendaro.

⁸ Realgara vino: la vino kiun oni trinkas dum la Drak-boata Feston por preventigi epidemion.

La konkurso de la drak-boatoj kaj ĉasado de naĝantoj al la anasoj nur finiĝos ĝis vesperiĝo.

Sunsun, la superreganto de la kajo, naĝis tre lerte, kiam li estis juna. Se li enakviĝis por ĉasi anasojn, li certe sukcesis kapti unu aŭ du en ĉiuj okazoj. Iufoje kiam lia dua filo Nuosong, dek-jara, jam povis naĝi subakve, retenante siajn spirojn, apud anason, subite elakviĝis kaj kaptis la anason, la patro duonŝerce diris:

“Bone, vi jam povas fari tion. Mi ne bezonas enakviĝi persone plu.”

Post tio li vere ne enakviĝis por kapti anasojn konkursante kun aliaj, krom savi dronanton. Se temis pri helpo al aliaj el suferoj, li volontis esti la tipo, kiu surportas la neeviteblan respondecon, malgraŭ tio, ke li devus sin ĵeti en fajron, eĉ konstante ĝis la aĝo de okdek jaroj!

Tianbao kaj Nuosong ambaŭ estis bonaj naĝantoj kaj remistoj en la urbeto.

Denove la Drakboata Festo baldaŭ alvenos. La boata konkurso okazos en la kvina de tiu lunmonato. Antaŭ tio la kunveno en la unua de tiu lunmonato sur la apudrivera strato decidis, ke la drakboato, kiu apartenis al la apudrivera strato, lanĉiĝis en la riveron la saman tagon. Koincidis, ke tiutage Tianbao ekvojaĝis al la supra baseno kune kun komercistoj laŭ landvojo por liveri pornovjarajn varojn tra la orienta Siĉŭano, tial nur Nuosong partoprenos en la konkurso. Dek ses bovide fortikaj junuloj kunportis incensojn, kandelojn kaj petardojn kune kun altpieda bovfelda tamburo pentrita per ruĝa desegnaĵo de Ok Signoj⁹. Kiam ili atingis la kavernon situantan sur supra baseno de la rivero, kie la drakboato estis metita, ili bruligis incensojn kaj kandelojn, kaj trenis la boaton en akvon. Enboatiĝinte, ili bruligis petardojn kaj frapis la tamburon, ke la boato sage pafiĝis al la malsupra baseno.

Tio okazis antaŭtagmeze. Posttagemeze la drakboato de la fiŝistoj trans la bordo ankaŭ lanĉiĝis en akvon. La du boatoj komencis provludi diversajn manovrojn de konkurso. Aŭdiĝis la unuaj tamburfrapoj, el kiuj multaj lokanoj sentis plezuron kaj ĝojon de alproksimiĝanta festo. Tiuj loĝantaj en apudriveraj palafitdomoj, kiuj sopiris al karuloj en malproksimo, ankaŭ ekpensis pri siaj karuloj je tiuj tamburfrapoj. En tiu ĉi festo kelkaj ĵonkoj certe povis haste reveni por la festo, dum aliaj vole nevole pasigis la feston dumvoje. Tio kompreneble kaŭzis multajn ĝojigajn kaj malĝojigajn aferojn, kiujn oni malfacile vidis. Kaj en la apudrivera strato iuj mienis ĝoje, dum aliaj kuntiris brovojn.

Kiam “peng, peng”-sonoj de la tamburoj transflugis riveron kaj montetojn kaj atingis la pramejon, la flava hundo estis la unua sensi la voĉon. Bojante, ĝi iris ĉirkaŭ la kabano, kvazaŭ surprizite. Kiam oni veturis al la transa bordo per la pramboato, ĝi pramiĝis al la orienta bordo kaj kuris sur monteto-supron kaj plengorĝe bojis al la direkto de la urbeto.

Cuicui estis plektanta akridon kaj skolopendron el palmbranĉoj. Vidinte, ke la flava hundo unue dormis en sunlumo, subite vekiĝis, kuris tien kaj ĉi tien kvazaŭ freneze, veturis per la boato trans la rivereto kaj revenis, ŝi insultis al ĝi:

“Hundaĉo, hundaĉo, kion vi faras! Vi ne rajtas konduti tiamaniere!”

Post momento ŝi sukcesis aŭdi la tamburajn frapsonojn kaj kuris ĉirkaŭ la kabano. Transirinte la rivereton kune kun la hundo, ŝi aŭskultis longan tempon sur la montetsupro, lasante sin alporti de la allogaj tambursonoj al iu pasinta festo.

⁹ *Desegnaĵo de Ok Signoj: Taoisma signo.*

Ĉapitro 2

4

Tio okazis antaŭ du jaroj. En la Drakboata Festo, la kvina de la kvina lunmonato ŝia avo anstataŭis sin per alia persono por zorgi la pramboaton. Li kunportis Cuicui kaj la hundon kaj iris al la bordo de la rivero spekti konkurson de drakboatoj. Ĉe la bordo staris granda homamaso kaj oni remis kvar vermiljonajn drakboatojn en la rivero. Pro antaŭnelonga ŝveliĝo la riverakvo estis pizverda sub serena ĉielo. Dum tamburoj sonadis “peng, peng”, Cuicui kunpremis sian buŝon senparola, sentante la koron plenan je nepriskribebla ĝojo. En iom troa kunpuŝiĝo ĉiuj spektantoj nur streĉis siajn okulojn por rigardi la spektaklon en la rivero. Post nelonge ŝi trovis, ke la hundo staras ĉe ŝi, sed Avo malaperis pro kunpuŝiĝo.

Donante sian atenton al la konkurso, ŝi pensis, “Baldaŭ avĉjo alvenos serĉi min.” Sed, post longa tempo ŝia avo ankoraŭ ne venis, kaj ŝi iom maltrankviliĝis. Antaŭ unu tago, kiam ili eniris la urbeton kun la hundo, Avo demandis al Cuicui:

“Morgaŭ okazos konkurso de drakboatoj en la urbeto. Se vi iros spekti sola, ĉu vi timos pro kunpuŝiĝanta homamaso?”

“Mi ne timas homamson, sed se mi iros sola, ne estos amuze,” ŝi respondis.

Post longa pensado Avo sukcesis ekmemori maljunan konaton loĝantan en la urbeto. Dumnokte li hastis al la urbeto kaj petis al la maljunulo, ke tiu prizorgu la pramboaton dum unu tago, por ke li povu akompani sian nepinon distriĝi en la urbeto. Pro tio, ke la maljuna konato havis nek karulojn nek hundon ĉe si, pli soleca ol la maljuna pramisto, tiu invitis lin al sia hejmo por manĝo kaj trinkado de realgara vino la sekvantan matenon. La invitito vere venis la sekvan tagon. Post manĝado Avo konfidis al li la taskon kaj kunportis Cuicui kaj la hundon iri al la urbeto. Survoje Avo kvazaŭ ekpensis pri io kaj demandis denove al Cuicui:

“Cuicui, Cuicui, kia spektaklo kun tiel multaj homoj! Se vi sola iros al la bordo por spekti la konkurson, ĉu vi kuraĝos iri tien?”

Cuicui respondis:

“Kial mi ne kuraĝos? Sed se mi sola iros, mi ne sentos intereson.”

Post kiam ŝi iris al la bordo, la kvar ruĝaj boatoj en la rivero okupis ŝian tutan atenton, kaj ŝajne egale al ŝi, ĉu Avo restas apud ŝi aŭ ne. Avo pensis: “Ankoraŭ frue. Restas almenaŭ tri aŭ kvar horoj ĝis la konkurso finiĝos. Mia amiko ĉe la pramejo devas ĝui la spektaklon de junuloj. Estas sufiĉa tempo, ke mi reiros kaj anstataŭos lin.” Pro tio li diris al ŝi:

“Tro multas homoj. Staru ĉi tie por rigardi kaj ne moviĝu alien. Mi iru ien por fari aferon. Ĉiaokaze mi revenos akompani vin hejmen.”

Plenokupite de du boatoj konkursantaj flankon ĉe flanko, ŝi senpripense jesis. Avo sciis, ke estas pli fidinde por ŝi resti kun la hundo ol kun li, kaj li foriris al la pramejo.

Kiam li atingis la pramejon, li vidis sian maljunan amikon, kiu anstataŭas lin, atenteme aŭskulti al tamburado en malproksimeco, starante ĉe la piedo de blanka pagodeto.

Avo vokis al li, ke li altiru la pramboaton. Ili pramveturis trans la rivereton kaj ankoraŭ starigis sin ĉe la blanka pagodeto. La anstataŭanto demandis al la maljuna pramisto, kial li revenis.

Avo respondis, ke li restigis Cuicui ĉe la bordo kaj sola revenis, volante prizorgi la pramboaton por kelka tempo anstataŭ li, por ke tiu povu iri al la bordo por spekti la spektaklon. Kaj li aldonis:

“Se vi havos ĝojan tempon en spektado, vi ne bezonos reveni kaj nur diros tion al Cuicui. Ŝi revenos hejmen, kiam la konkurso finiĝos. Se la knabino ne kuraĝas rehejmeniri, akompanu ŝin iri kelkan vojpecon!”

Sed lia anstataŭanto ne interesiĝis pri la konkurso kaj volis trinki du tasojn da alkoholaĵo kun la maljuna pramisto ĉe la roko apud la rivereto. Kun granda ĝojo la maljuna pramisto elprenis botelkukurbon kaj pasigis ĝin al la urbetano. Babilante pri la okazaĵoj dum pasintaj Drakboataj Festoj, ili trinkis alkoholaĵon. Post nelonge la urbetano ebriiĝis, kuŝante sur la roko.

Ĉar tiu jam ebriiĝis, li nature ne povis iri al la urbeto. Pro tio, ke Avo ne povis forlasi sian devon pri la pramboato, Cuicui ĉe la bordo ne povis ne maltrankviliĝi.

Post kiam la ĉampiono de la konkurso estis aljuĝita, oficiroj de la urbeto jam sendis boatojn disŝuti aron da anasoj en la riveron. Sed Avo ankoraŭ ne venis ĝis tiam. Timante, ke ŝia avo atendas ŝin ie, kun la hundo ŝi ŝovis sin tra la homamason por serĉi lin tien kaj ĉi tien, sed ŝi trovis neniun spuron de Avo. Baldaŭ krespukiĝos. Tiuj soldatoj, kiuj elportis benkojn por spekti la spektaklon, jam reiris al barakoj unuj post aliaj, ŝultroportante benkojn. En la rivero restis nur kelkaj anasoj kaj anaskaptantoj malpliĝis. La suno subiris al la direkto de ŝia kabano ĉe supra baseno kaj la krepusko vualis la riveron per nebulo. Ŝi rigardis tion, kio okazis ĉirkaŭ ŝi, kaj ŝin kaptis terura penso: “Se avĉjo mortus?”

Ŝi ekmemoris admonon de Avo ne forlasi la lokon, kie ŝi staris, kaj ŝi senkulpigis sin pri tiu penso. Ŝi mense klarigis al si, ke li ankoraŭ ne povas reveni certe pro tio, ke li eniris la urbeton aŭ faras viziton al konato aŭ drinkas kun aliaj. Ĉar tio estis probabla, ŝi ne volis hasti hejmen kun la hundo antaŭ ol tute mallumiĝos. Ŝi vole nevole atendis lin anstataŭe ĉe la ŝtona kajo.

Pli poste tiuj du drakboatoj trans la rivero jam remis en la transan rivereton kaj malaperis. La spektantoj de la konkurso preskaŭ tute disiris. Jam lumiĝis lampoj de bordeloj en palafitdomoj kaj aŭdiĝis operkantado al akompano de tamburado kaj muzikiloj. En aliaj domoj aŭdiĝis laŭta bruo de fingrodivena ludo en drinkado. Sur kelkaj ĵonkoj ankritaj sub palafitdomoj oni preparis manĝaĵoj kaj aŭdigis sibladon, kiam ili ŝutis pecojn de verdaj legomoj kaj rafanoj en bolantan oleon en frititujo. La rivero jam malklare vidiĝis en nebulo. Ŝajnis, ke nur unu blanka anaso naĝis en ĝi kaj nur unu naĝanto ĉasis la anason.

Cuicui ankoraŭ ne forlasis la kajon, kredante, ke ŝia avo revenos kunporti ŝin al la hejmo.

La operkantado pli laŭtiĝis en palafitdomo. Sub ĝi aŭdiĝis parolo inter boatanoj en ĵonko. Unu el ili diris:

“Jinting, aŭskultu. Via amatino akompanas komercistojn el la orienta Siĉŭano per operkantado kaj drinkado. Mi vetas je mia fingro, ke ĝi estas ŝia voĉo!”

La alia boatano diris:

“Kiam ŝi akompanas ilin per operkantado kaj drinkado, ŝi pensas pri mi. Ŝi scias, ke mi estas ĉi tie sur la ĵonko!”

La unua aldonis:

“Kun sia korpo en alies brakumo, ŝi ankoraŭ pensas pri vi? Provu tion.”

“Jes, mi provu,” la alia diris. Kaj li fajfis kaj faris strangan geston. Je tio la kantado sur la supra etaĝo ĉesis. La du boatanoj ridis pro tio. La duopo daŭrigis sian babiladon pri ĉio de la virino spicitan per multaj krudaj kaj vulgaraj vortoj. Cuicui ne kutimis akcepti tiajn vortojn, sed ŝi ne povis foriri. Laŭ la rakontado de boatano, la patro de la virino sur la supra etaĝo estis mortigita

per dek sep ponardpikoj sur Mianhua-montdeklivo. Tiam la absurda penso “Se la avĉjo mortus?” okupis sian menson dum momento.

Kiam la du boatanoj babiladis, la blanka anaso en la rivero malrapide alnaĝis al la kajo, kie Cuicui staris. Ŝi pensis: “Se vi plu alproksimiĝas, mi vin kaptos!” Kaj ŝi kviete atendis, sed kiam la anaso distis ĉirkaŭ tridek futojn proksime, aŭdiĝis ies ridoj kaj vokado al la boatanoj. En la akvo troviĝis alia homo, kiu jam kaptis la anason, alnaĝante per akvotretado al la bordo. Aŭdinte lian vokadon, la boatano sur la ĵonko malklare kriis:

“Moŝto la Dua, Moŝto la Dua, vi vere estas brila. Vi jam kaptis kvin, ĉu ne?”

“Tiu ĉi anaso estas tre ruza. Nun ĝi estas mia,” la naĝanto respondis.

“Nun vi kaptis anasojn kaj kaptos virinojn certe per la sama kapablo.”

La naĝanto, ne dirinte plu, remis per siaj manoj kaj piedoj al la bordo. Kiam li surbordiĝis akve gutante, la hundo apud Cuicui bojis kelkfoje, kvazaŭ avertante la naĝanton. Tiam la naĝanto rimarkis la knabinon. Ĉar neniu alia signo de homoj vidiĝis sur la kajo, li demandis al ŝi:

“Kiu vi estas?”

“Mi estas Cuicui.”

“Kiu estas Cuicui, do?”

“Nepino de la pramisto ĉe la Verda Rivereto.”

“Kion vi faras ĉi tie?”

“Mi atendas mian avon ĝis li revenos kaj kunportos min hejmen.”

“Vi atendas, sed li ne revenos, ĉar li certe drinkis kaj ebriiĝis en la urbeta barako kaj oni jam portis lin al la hejmo.”

“Li ne faris tion. Se li promesis, li certe revenos.”

“Ne atendu lin ĉi tie. Iru al mia hejmo, al la prilumita supra etaĝo. Atendu ĝis via avo venos serĉi vin, ĉu bone?”

Cuicui ekhavis miskomprenon pri lia bona intenco inviti ŝin al la supra etaĝo. Je ekpenso pri la hontindaĵoj de la virino pribabilitaj de tiuj boatanoj, ŝi miskonsideris, ke la viro invitis ŝin al la etaĝo, kie virino operkantas. Ŝi neniam ĵetis insultojn al homoj, sed pro sia longatempa atendado al sia avo, ŝi jam fariĝis tre maltrankvila. Kaj kiam ŝi estis persvadata iri supren, ŝi konsideris, ke ŝi estas insultita, kaj ŝi mallaŭte diris:

“Diablo prenu vin friponon!”

Kvankam ŝi diris tion duonvoĉe, la viro jam kaptis tiujn vortojn. Laŭ la voĉo li povis juĝi, ke ŝi estas juna, kaj li ridete diris:

“Kio, vi eĉ ĵetis insulton al mi! Se vi ne volas suriri la etaĝon, restu ĉi tie. Kiam granda fiŝo el la akvo mordos vin, ne levu kriojn!”

“Tio ne koncernas vin, se granda fiŝo mordos min,” ŝi kontraŭdiris.

La hundo, kvazaŭ komprenante, ke ŝi estas tiranita, denove ŭa-ŭa-bojis. Eklevinte la blankan anason en la mano, la viro ektimigis la hundon, kaj li iris en la apudriveran straton. La hundo volis sin ĵeti al li pro lia timigo, ŝi kriis:

“Hundeto, kial vi bojas kontraŭ la ĝusta persono!”

Ŝi volis diri al ĝi, ke tiu frivola viro ne meritas ĝian bojadon, sed la viro komprenis alian bonan sencon, ke ŝi volas ĝin ne boji al bonulo. Li malaperis, impertinente ridante.

Pli poste iu, kiu elvenis el la apudrivera strato, tenante torĉon faritan el eluzita bambua kablo, vokis ŝian nomon por serĉi ŝin. Kiam li aliris al ŝi, ŝi tamen ne konis lin. Li diris, ke la maljuna pramisto jam rehejmeniris kaj ne povis kunporti ŝin, tial li konfidis mesaĝon al pramito tuj

revenigi ŝin. Aŭdinte, ke li estas sendita de Avo, ŝi sekvis la viron antaŭirantan kun torĉo. La hundo kuris jen antaŭen jen malantaŭen de ŝi kaj ili iris laŭ la urbemuro al la direkto de la pramejo. Irante, ŝi demandis al torĉotenanto, kiu diris al li, ke ŝi estas ĉe la bordo. Li respondis, ke Moŝto la Dua diris tion al li. Li estis lia servisto. Post kiam li akompanos ŝin al la hejmo, li devos reveni al la apudrivera strato.

“Kiel Moŝto la Dua scias, ke mi estas ĉe la bordo?” ŝi demandis.

La viro ridete diris:

“Kiam li revenis post kaptado de anasoj en la rivero, li renkontis vin sur la kajo. Li diris, ke li bonintence invitis vin al la domo por atendi vian avon, sed vi insultis lin!”

“Kiu estas Moŝto la Dua?” ŝi mallaŭte demandis iom surprizite.

La viro ankaŭ iom surprizite diris:

“Ĉu vi eĉ ne konas lin? Li estas Moŝto la Dua Nuosong en nia apudrivera strato! Li estas Yue Yun! Li volas, ke mi akompanu vin hejmen!”

Moŝto la Dua Nuosong estis tre konata nomo en la regiono de Chadong.

Je ekpenso pri tiuj krudaj vortoj, kiujn ŝi diris al li, ŝi sentis kaj surpriziĝon kaj hontemon. Dirante nenion plu, ŝi sekvis la torĉotenanton.

Trairinte la pasejon de la monteto, ili vidis la lamplumon en la hejmo trans la rivero. Vidinte la torĉon de transe, la maljuna pramisto tuj alveturigis la pramboaton per tirado. Tirante la kablون, Avo raŭke demandis:

“Ĉu vi estas Cuicui?”

Ŝi ignoris sian avon kaj duonvoĉe diris:

“Mi ne estas Cuicui, mi ne estas Cuicui. Cuicui jam estas formanĝita de granda karmo en la rivero.”

Kiam ŝi enboatiĝis, la torĉotenanto foriris. Avo, tenante la kablون de la boato, demandis:

“Kial vi ne respondis al mia voko, Cuicui? Ĉu vi koleras kontraŭ mi?”

Starante sur la pruo, ŝi ankoraŭ restis senparola. Ŝia plendemo kontraŭ ŝia avo jam malaperis, tuj kiam ŝi elboatiĝis, eniris la domon kaj vidis la maljunulon kuŝanta ebria. Tamen alia afero, kiu ne koncernis ŝian avon, silentigis ŝin la tutan nokton.

5.

Du jaroj forpasis.

Dum ĉi tiuj du jaroj du Mezaŭtunaj Festoj ne prezentis la plenlunon por spektado. Pro tio ne okazis la sceno laŭ difinita tempo, ke gejunuloj vigilis por ĝui la lunon kaj kanti laŭ la kutimo de la limregiono, kaj al Cuicui tiuj du festoj impresis eksterordinare banale kaj seninterese. Kiel kutime, dum la Printempa Festoj de tiuj du jaroj oni povis spekti en la barakoj de soldatoj la leondancadon kaj drakdancadon ludatajn de vilaĝanoj el diversaj vilaĝoj. En la ekzercejo de garnizono oni prezentis ekscitigajn aktivadojn akompanatajn de tamburado kaj gongado por bonvenigi printempon. Nokte de la dekkvina de la unua lunmonato la soldatoj, kiuj ludis leondancon kaj drakdancon en la urbeto, iris torsonudaj tien kaj ĉi tien inviti fajraj-prezentadojn. En la barakoj, ĉe rezidejo de impostkolekta estro kaj antaŭ kelkaj grandaj butikoj en la apudrivera strato oni anticipe preparis bambuajn tubojn kaj kavigitajn palmotrunkojn kaj multe martele plenigis ilin per salpetro, karbo kaj sulfuro por fari fajraĵojn. Bravaj kaj amuzemaj soldatoj kun nuda torso alvenis, prenante lanternojn kaj tamburante. Petardoj eksplodis kaj pluve falis el la

pintoj de longaj bambuaj stangoj sur la ŝultrojn kaj dorsojn de tiuj drakdancantoj. Urĝaj tamburado kaj gongado plivigliĝis la scenon kaj ekscitis la spektantojn. Kelkan tempon post petardoeksplozado oni bruligis fuzeojn de fajraĵoj alligitaj al la piedoj de benkoj ĉe la fino de la aperta tereno. Komence blanka lumo sible ŝprucis kaj iom post iom ĝi ekbruis, eligante timigan sonon kiel tigroj aŭ tondro. La blanka lumo pafiĝis en aeron alte je du cent futoj, kaj kiam ĝi falis, ĝi disŝutis sparkojn kaj fajrerojn en plena aero. La soldatoj, kiuj ludis drakdancon, faris rondojn en fajreroj kaj ignoris ilin. Cuicui kaj ŝia avo ankaŭ vidis tian spektaklon kaj tenis la bruplenan impreson en la memoro, sed ŝi ne sciis, kial la impresio ne estas tiel dolĉa kaj bela kiel tiu de okazintaĵo, kiun ŝi spertis dum tiu Drakboata Festo.

Por ne forgesi tiun okazintaĵon Cuicui kune kun sia avo, dum la pasintjara Drakboata Festo, iris spekti la konkurson de drakboatoj en la apudrivera strato por duona tago. Kiam ili estis ekster de ĝojo en spektado, pluvo subite falis kaj tramalsekigis la vestojn de ĉiuj spektantoj. Por ŝirmi sin kontraŭ pluvo Avo, la nepino kaj la hundo hastis supren al la palafitdomo de Sunsun kaj kunpremiĝis ĉe murangulo. Iu, kun benko sur la ŝultro, preteriris ilin, kaj Cuicui rekonis en li la torĉotenanton, kiu akompanis ŝin hejmen lastjare. Ŝi diris al Avo:

“Avĉjo, li estas tiu, kiu akompanis min hejmen lastjare. Kiam li antaŭiris kun torĉo en la mano, li vere ŝajnis bandito el monto!”

Tiam Avo tenis sin silenta. Kiam li returnis kaj iris antaŭ Avon, tiu ekkaptis lin, ridete dirante:

“Ho, kia homo vi estas! Mi invitis vin al mia hejmo por drinkado, sed vane. Ĉu vi timas, ke mi mortigos tian gravulon kia vi per venena vino!”

Tiu ekridis, kiam li vidis la maljunan pramiston kaj Cuicui.

“Cuicui, vi jam plenkrekis! Moŝto la Dua diris, ke granda fiŝo voros vin, sed nun tiuj gandraj fiŝoj en ĉitea rivero ne povas vin engluti.”

Senparola Cuicui nur ridetis, kunpremante la lipojn.

Ĉifoje, kvankam ŝi aŭdis la nomon “Moŝto la Dua” el la buŝo de tiu banditsimila servisto, ŝi tamen ne vidis lin mem. El la interparolo inter Avo kaj la servisto, ŝi komprenis, ke Moŝto la Dua pasigas la feston ĉe Verdonda Rapidfluejo ses cent liojn malprokasime en malsupra baseno. Kvankam ŝi ne vidis lin, ŝi tamen konatiĝis kun Moŝto la Unua kaj ties patro Sunsun, famulo en la regiono. Post kiam Moŝto la Unua kunportis hejmen la anason, kiun li kaptis en la rivero, la maljuna pramisto donis laŭdojn al la graso anaso dufoje, tiel ke Sunsun volis sian filon transdoni la anason al Cuicui. Ĉar li sciis, ke Avo kaj la nepino vivas tre malfacile kaj eĉ ne povas prepari zongzi-ojn¹⁰ por la festo, li donacis al ili multe da konusformaj zongzi-oj.

Kiam la fama superreganto de la kajo babilis kun Avo, Cuicui, ŝajnigante sin rigardi la riveran pejzaĝon, klare kaptis ĉiun vorton de la interparolo. Tiu famulo laŭdis Cuicui pro ŝia beleco, demandis pri ŝia aĝo kaj ĉu ŝi jam edziniĝis. Kun ĝojo Avo ankaŭ multe laŭdis ŝin. Ŝajnis, ke Avo ne permesis al aliaj zorgi pri ŝia edziniĝo, tial li fermis sian buŝon je ekmencio pri la afero de ŝia edziniĝo.

Hejmenirante, Avo brakumis la blankan anason kaj aliajn donacojn kaj Cuicui antaŭiris, tenante torĉon. Ili ambaŭ antaŭeniris laŭ la urbemuro kun rivero ĉe alia flanko. Avo diris:

“Sunsun vere estas bonkora kaj tre grandanima. Moŝto la Unua ankaŭ estas bonulo, kaj ĉiuj liaj familianoj estas bonkoraj!”

“Ĉiuj liaj familianoj estas bonkoraj. Ĉu vi konas ĉiujn el ili?” Cuicui demandis.

¹⁰ *Zongzi-o: piramidoforma manĝaĵo farita el glueca rizo envolvita en bambuajn aŭ fragmitajn foliojn, kiun ĉinoj manĝas dum la Drakboata Festo.*

Tamen Avo ne vere komprenis, kion ŝi celis. Pro granda ĝojo li ridete diris:

“Cuicui, se Moŝto la Unua proponos sian edziĝon al vi per svatistino, ĉu vi konsentos?”

“Avĉjo, ĉu vi freneziĝas! Mi koleros kontraŭ vi, se vi mencios plu la aferon!” ŝi plendis.

Kvankam Avo ne plu parolis pri tio, tamen en la koro li ankoraŭ ludis kun tiaj ridindaj kaj nebonaj ideoj. Kun kolero ŝi fuŝe svingis la torĉon al ambaŭ flankoj de la vojo kaj malĝoje antaŭen marŝis.

“Ne faru ĝenon. Se mi stumblos en la riveron, la anaso sin liberigos de mia mano!”

“Mi ne ŝatas tiun anasaĉon!”

Avo komprenis, pro kio ŝi malĝojas. Kaj li ekĉantis arion de rudristo, kiu stimulas la veturadon de ĵonko, kiam ĝi veturas sur rapidaj fluoj. Kvankam li kantis per raŭka voĉo, li eligis la kantvortojn glate kaj klare. Aŭskultante al lia kantado, ŝi ne ĉesigis sian iradon antaŭen. Subite ŝi haltis kaj demandis:

“Avĉjo, ĉu via ĵonko nun veturus tra Verdonda Rapidfluejo?”

Avo diris nenion kaj daŭrigis sian kantadon. Ili ambaŭ ekmemoris, ke Moŝto la Dua sur sia ĵonko pasigas la feston ĉe la Verdonda Rapidfluejo, sed unu el ili ne komprenis, kio troviĝas en alies memoro. Ili silente iris la vojon al sia hejmo. Kiam ili atingis la pramejon, la anstataŭanto, kiu jam albordiĝis la pramboaton, atendis ilin. Veturinte trans la rivereton kaj enirinte la kabanon, ili senŝeligis kaj frandis zongzi-ojn. Post tio la anstataŭanto volis reiri al la urbeto. Cuicui tuj bruligis torĉon por li, tiel ke li povu prilumi la vojon per ĝi. Kiam li surgrimpis la monteton post veturado trans la rivereton, Avo kaj Cuicui rigardis lin sur la boato. Ŝi diris:

“Avĉjo, rigardu, tiu ‘montbandito’ jam surgrimpis la monteton!”

Avo, tirante la kablon, kontemplan la maldensan nebulon sur la rivereto, kvazaŭ vidinte ion, kaj eligis malpezan elspiron. Kiam Avo silente tiris la boaton al la transa bordo, li volis, ke ŝi surbordiĝu unue, kaj li atendis ĉe la boato, ĉar li sciis, ke vilaĝanoj, kiuj spektis la konkurson en la urbeto, devos reiri hejmen en mallumo.

6

Iutage la maljuna pramisto iom disputis kun la veturanto, kiu estis papervendisto, rifuzante akcepti lian monon, kaj tiu insiste donis monon al li. Ŝajnis, ke la maljunulo eksentis sin ofendita ĝuste pro la teniĝo de la veturanto, kiu volis doni monon. La pramisto seriozmiene kolere kaj devigis lin enpoŝigi la monon. La veturanto vole nevole tenis la monon en la mano. Kiam la boato albordiĝis kaj li saltis sur la bordon, li disŝutis la monerojn sur la boaton kaj ridete forhastis. Pro tio, ke la maljunulo devis tirkfiksi la boaton, por ke aliaj veturantoj surbordiĝu, li ne povis reteni lin, kaj kriis al sia nepino sur la monteto:

“Cuicui, Cuicui, retenu tiun papervendiston. Ne permesu al li foriri.”

Ne sciante, kio okazis, ŝi kaj la hundo iris bari la unuan elboatiĝinton. Tiu ridete diris:

“Ne baru al mi la vojon!...”

Kiam ili disputis, la dua komercisto aliris kaj diris al ŝi, kio okazis. Komprenante la aferon, ŝi tiris la baskon de la papervendiston, nur dirante:

“Ne foriru! Ne foriru!”

Por esprimi sian subtenon la hundo bojadis ĉe ŝi. La aliaj komercistoj ridis kaj la vojo estis ŝtopita por trairado dum momento. Avo anhelante alvenis kaj perforte ŝovis la monerojn en lian

manon kaj metis faskegon da tabako en la korbon vektoportatan de la vendisto. Kunfrotante siajn manojn, Avo ridete diris:

“Foriru! Iru vian vojon!”

Tiuj pramveturintoj foriris ridante.

“Avĉjo, mi supozis, ke tiu ŝtelis vian aĵon kaj kverelis kun vi!” ŝi diris.

Avo diris:

“Li donis al mi plurajn monerojn. Mi tute ne volis tiun monon! Mi diris al li, ke mi ne akceptas monon, kaj li disputis kun mi. Kia senraciulo!”

“Ĉu vi redonis la tuton al li? Ŝi demandis.

Kunpremante siajn lipojn, Avo ekskuis la kapon, ruze ŝajnigante sin triumfe ridetmiena. Li elprenis la solan kupran moneron, kiun li restigis en sia zono, kaj donacis ĝin al ŝi. Li aldonis:

“Li tenas la faskegon da tabako donacitan de mi, kaj li povas fumi ĝin tutvoje ĝis Zhengan-urbeto!”

En malproksimeco aŭdiĝis “peng-peng”-sonoj de tamburoj. La hundo streĉis siajn orelojn por aŭskulti. Cuicui demandis al sia avo, ĉu li aŭdis la sonojn. Kolektinte sian atenton, li rekonis la sonojn kaj diris:

“La Drakboata Festo ree alvenas, Cuicui. Ĉu vi ankoraŭ memoras pri la grasa anaso, kiun Moŝto la Unua Tianbao donacis lastjare? Matene, kiam Moŝto la Unua kaj grupo da homoj, kiuj vojaĝas al la orienta Siĉŭano, veturis per la pramboato, li ankoraŭ menciis vin. Vi certe forgesis tiaman pluvadon. Se ni iros ĉifoje, ni devos hejmenreveni tenante torĉon. Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke ni ambaŭ prilumis la revenan vojon per torĉo?”

Tiam ŝi pensis pri ĉiuj okazintaĵoj en la Drakboata Festo antaŭ du jaroj, sed kiam ŝia avo elmetis tiun demandon, ŝi mienis iom kolere. Skuante la kapon, ŝi intence diris:

“Mi ne povas rememori. Mi ne povas rememori.”

Fakte tio, kion ŝi volis esprimi, estis: “Kiel mi ne povus rememori?!”

Avo komprenis, kion ŝi celis. Li aldonis:

“Antaŭ du jaroj estis tre interese. Vi sola atendis min ĉe la bordo kaj eĉ ne sciis, ĉu hejmeniri aŭ ne. Mi pensis, ke vi jam estus englutita de granda fiŝo!”

Je mencio de la pasintaĵo ŝi eksplodis per ridado.

“Ĉu vi pensis, ke granda fiŝo kapablas min engluti? Tiujn vortojn alia homo diris kontraŭ mi kaj mi transdiris tion al vi! Tiun tagon vi vere esperis, ke Avo loĝanta en la urbeto formanĝus la botelkukurbon de vino! Kiel malbonan memoron vi havas!”

“Nun mi estas maljuna kaj havas terure malbonan memoron. Cuicui, vi jam plenkreskis. Vi sola kuraĝas iri urbeten kaj ne timas, ke granda fiŝo vin englutus.”

“Mi estas sufiĉe plenkreska por prizorgi la pramboaton.”

“Maljunulo devas prizorgi la pramboaton.”

“Maljunulo devas ripozi.”

“Via avo ankoraŭ kapablas bati tigron. Mi ne estas maljuna!” dirante, li fleksis sian brakon kaj penis montri sian kunpremitan muskolon forta kaj juna. Li daŭrigis: “Se vi kredas, Cuicui, mordu ĝin.”

Senparola ŝi strabe rigardis sian avon. En malproksimeco aŭdiĝis muziko de ŝona-oj¹¹, kaj ŝi sciis, kion ĝi signifas kaj el kiu direkto ĝi venas. Ŝi volis, ke ŝia avo elboatiĝu kune kun ŝi kaj tiru la boaton al la bordo proksima al la hejmo. Por plifruue rigardi la procesion kun geedziĝa

¹¹ *Ŝona-o*: akrasona blovinstrumento iom simila al hobojo.

palankeno, ŝi eĉ grimpis suben de la pagodeto malantaŭ la kabano por rigardi. Post nelonge alvenis la procesio: du ŝona-ludantoj, kvar fortikaj vilaĝanoj, malplena palankeno, junulo surhavanta novan veston, kiu aspektas kiel filo de oficiro, knabo tiranta du kaprojn, poto da vino, skatolo da kukoj el glueca rizo, kaj vektoportanto de donacoj. Kiam ili enboatiĝis, ankaŭ Cuicui kaj ŝia avo enpramiĝis. Avo tiris per kablo la boaton, dum Cuicui starigis sin ĉe la palankeno por observi la mienon de ili ĉiuj kaj esplori kvastojn sur la palankeno. Ĉe alborde de la boato la junulo simila al la filo de oficiro elprenis el sia brodita subvesto malgrandan pakajon el ruĝa papero kaj enmanigis ĝin al la maljuna pramisto. Laŭ la loka moro, Avo vole nevole ĝin akceptis. Post tio Avo demandis al la junulo, kie la novedzino loĝas, kio estas ŝia familia nomo kaj kio estas ŝia aĝo. Tuj kiam la ŝona-ludantoj surbordiĝis, ili brue blovis la muzikilojn kaj tiu grupo da homoj surgrimpis la monteton kaj foriris. Avo kaj Cuicui restis en la boato, sed iliaj koroj kvazaŭ postsekvis la sonojn de la muzikiloj kaj post longa vojpeco ili revenis al iliaj korpoj.

Pesante la ruĝan pakajon, Avo diris:

“Cuicui, la novedzino en Songjiabao-vilaĝo estas nur dekkvin-jara.”

Cuicui komprenis, kion ŝia avo volas diri, kaj ignorante lin, ŝi kviete komencis kablorigi la boaton.

Kiam ili veturis ĉe la bordon antaŭ sia kabano, ŝi kuris al la hejmo por preni la ŝona-on kun duoblaj bambuaj tuboj, petinte, ke ŝia avo ludis ĝin per la ario *Panjo Akompanas Filinon* al ŝi. Ŝi kaj la hundo kuŝiĝis sur la granda roko en ombro kaj rigardis la nubojn sur la ĉielo. La tago plilongiĝis. En oni-ne-scias-kia tempo Avo endormiĝis, ankaŭ Cuicui kun la hundo.

Ĉapitro 3

7

Antaŭ tri tagoj de la Drakboata Festo, Avo kaj Cuicui jam anticipis interkonsentis, ke Avo prizorgos la pramboaton, dum Cuicui kaj la hundo iros al la palafitdomo de Sunsun spekti la spektaklon. Unue ŝi ne konsentis kaj poste jesis. Sed la duan tagon ŝi reprenis sian promeson, konsiderante, ke ili ambaŭ spektos la spektaklon aŭ ili ambaŭ prizorgos la pramboaton. Avo komprenis, ke tio estas la rezulto de luktado inter ŝiaj ludemo kaj amo. Tio ne eblas, se li malhelpas ŝian ludemon. Li ridete diris:

“Kio okazis al vi, Cuicui? Ni jam faris decidon, sed vi renversis ĝin. Tio ne kongruas al la kondutado de ni lokanoj de Chadong. Ni devas plenumi nian decidon, sed ne hezitu. Mia memoro ne estas tiel malbona, ke mi tuj forgesis, kion vi jam promesis!”

Kvankam li tion diris, videble li tamen konsentis pri ŝia ideo. Li nur iom malĝojis pro ŝia troa zorgemo. Vidinte sian avon ne paroli, ŝi diris:

“Se mi foriros, kiu akompanos vin?”

“Vi foriros, kaj la boato akompanos min.”

Kuntirinte siajn brovojn, ŝi diris kun amara rideto:

“La boato akompanos vin, aĥ, aĥ, la boato akompanos vin. Avĉjo vi vere estas...”

Li pensis: “Iun tagon vi forlasos min.”, sed li ne kuraĝis menciigi tiun aferon. Dummomente li ne trovis eĉ unu vorton por diri. Pro tio li iris al la bedo pririgardi ŝenoprazojn kaj ŝi lin sekvis.

“Avĉjo, mi decidus ne iri. Mi lasu la boaton iri kaj mi akompanos vin anstataŭ ĝi!”

“Bone, Cuicui, se vi ne iros, mi iros. Kun ruĝa floro sur la brusto, mi, kiel provinca ansero, iros urben rigardi la urban pejzaĝon!”

Ili ambaŭ longe ridis pro lia spritaĵo.

Dum Avo sarkis la grundon por ŝenoprazoj, ŝi derompis dikan ŝenoprazon kaj fajfis per ĝi. Iu vokis sur transa bordo por peti pramveturon. Antaŭ ol Avo respondis, ŝi jam kuris malsupren, saltis en la boaton kaj tiris la transversan kablaron trans ambaŭ bordoj por veturigi la vokanton. Tirante la boaton, ŝi vokis al Avo:

“Avĉjo, kantu, daŭre kantu.”

Avo ne plu kantis. Starante sur la alta roko, li nur svingis la manon senparola.

Li havis ion sur la koro zorgoplene. Lia nepino jam plenkreskis.

Tagon post tago ŝi pli kaj pli maturiĝis. Kiam io sensiva menciigis, ŝiaj vangoj ruĝiĝis. Tempo plenkreskigis ŝin, kvazaŭ urĝante ŝin ŝultroporti respondecon pri alia afero. Ŝi ŝatis rigardi novelzinon kun plene pudrita vizaĝo, babili pri rakontoj pri novelzinoj, enŝovi sovaĝajn florojn sur la kapon kaj aŭskulti kantadon. Ŝi jam povis kompreni la implicitan sencon el la kantoj de Chadong-regiono. Kelkfoje ŝi ŝajne aspektis iom soleca. Ŝi emis sidi sur roko kaj kontemplan nubon aŭ stelon. Se Avo demandis al ŝi:

“Kion vi pripensas, Cuicui?”

Kun iom da hontemo, ŝi mallaŭte respondis:

“Mi rigardas anasojn interbatantajn!” Laŭ la loka kutimo tio signifis “Cuicui nenion pripensas.”

Ŝi demandis al si en la koro: “Kion vi vere pripensas, Cuicui?” Ankaŭ ŝi mem respondis en la koro: “Miaj pensoj multas kaj flugas malproksimen, tre malproksimen, sed mi mem ne scias, kion mi pripensas.”

Vere ŝi ja pensis, sed ne sciis, kion ŝi pripensas. Ĉar ŝi jam estis plene matura kaj nature “stranga afero” regule okazis al ŝi ĉiumonate, tio pliigis al ŝi pensojn kaj songojn.

Avo komprenis, kion tio signifas al knabino, ankaŭ li ekhavis ian ŝanĝiĝon en la menso pro tio. Jam sepdek jarojn li vivis en la naturo, tial li ne kapablis pro sia aĝo trakti tiujn naturajn aferojn en bona ordo. Ŝia plenkreskiĝo memorigis al li pri kelkaj paseoj kaj li denove sukcesis trovi ion el la okazaĵoj dum pasintaj tempoj.

La patrino de Cuicui iam havis saman aspekton kiel ŝi: kun longaj brovoj, grandaj okuloj kaj sane ruĝeta haŭto. Ŝia obeema konduto vekis amemon de familianoj. Kaj ankaŭ ŝi scipovis, kiel trakti bagatelajn aferojn kaj kiam montri sian ĝojan mienon kun okulumo, tiel ke ŝi plaĉas al la superuloj de la familio kaj igis ilin eksenti ŝian nemankeblecon. Tamen malfeliĉo okazis al ŝi. Ŝi konatiĝis kun tiu soldato, kaj fine ŝi mortis kune kun li, forlasinte la patron kaj filinon. En la okuloj de la maljuna pramisto tiuj aferoj kulpigis nenium kaj nur “Ĉielo” pekis. Neniam Avo de Cuicui ne buŝe plendis pri la Ĉielo, sed interne li neniel konsentis pri la malfeliĉa fato. Estis vere maljuste, ke li ricevis sian malfeliĉan porcion! Tio estis la afero, kiun li ne devis forĵeti kaj vole nevole toleris!

Sed nun estis Cuicui ĉe li. Se al ŝi okazus la sama sorto de ŝia patrino, ĉu la grandaĝa pramisto povus flegi ŝian idon plue? Ĉio dependas de la Ĉielo! Ĉar li jam maljuniĝis, tempis por li ripozi. Li jam travivis ĉiujn suferojn kaj malfeliĉon, kiujn ĉiuj bonkoraj vilaĝanoj eble spertis. Se ekzistus Dio en alto kaj li havus manojn por manipuli ĉion, evidente estus juste kaj racie, ke Dio unue reprenus Avon kaj poste lasus la junan nepinon ricevi la porcion de feliĉo aŭ malfeliĉo en la vivo, difinitan de la sorto.

Tamen Avo ne pensis tiamaniere. Li kovis zorgojn pri Cuicui. Kelkfoje li kuŝis sur la roko ekster la pordo kaj pensis, rigardante la stelojn. Li opiniis, ke lia morto baldaŭ alproksimiĝas. Ĝuste pro tio, ke ŝi jam plenkreskis, tio pravas, ke li vere estas maljuna. Ĉiaokaze li devas fari bonajn aranĝojn por ŝi. Ĉar ŝia patrino restigis ŝin al li kaj nun tiu jam plenkreskis, lia tasko finiĝos, nur se li transdonos ŝin al unu homo! Al kiu? Kia homo ne suferigos ŝin?

Antaŭ kelkaj tagoj kiam Moŝto la Unua, la filo de Sunsun veturis per pramboato, li babilis kun Avo. La unuaj vortoj de tiu malkaŝema kaj sincera estis:

“Maljuna oĉjo, via Cuicui aspektas bela, vere kiel avalokiteŝvaro. Post unu aŭ du jaroj, se mi havos oportunon okupiĝi pri komercaj aferoj en Chadong anstataŭ flugi ĉien kiel korvo, mi nepre venos al la bordo kaj kantos al Cuicui ĉiuvespere.”

Avo laŭde respondis al tiu memkonfeso per ridoj. Kablo tirante la boaton, li fiksas siajn malgrandajn okulojn sur Moŝton la Unuan. Tiu aldonis:

“Cuicui estas tre delikata. Mi timas, ke ŝi nur taŭgas aŭskulti al kantado de Chadong-regiono, sed ne fari hejmaferojn kiel edzinoj de nia loko. Mi volas amatinon, kiu povas aŭskulti mian kantadon, kaj des pli mi bezonas la edzinon, kiu povoscias mastrumi en la hejmo. Kiel proverbo diras, ‘Oni volas ĉevalon galopi, sed ne manĝigas ĝin per herboj.’ Ha, mi estas tia tipo!”

Avo malrapide turnis la boaton kaj alboardigis ĝian pobon. Post tio li diris:

“Moŝto la Unua, tia afero okazos! Atendu kaj vidu!”

Avo ne klare eksplikis “tian aferon”. Kiam la junulo foriris, Avo remaçis tiujn elkorajn vortojn de la juna viro, kaj li sentis sin kaj çagrena kaj çoja. Se li konfidis Cuicui al la viro, çu tiu estos taüga por prizorgi ŝin? Se li vere konfidis ŝin al li, çu ŝi konsentos?

8

Pluvetis frumatene de la kvina de la kvina lunmonato. Pro akvoŝveliçgo sur la supra baseno la riverakvo plene fariçgis pizverda. Avo, kiu volis fari açetojn por la festo, iris la vojon al la urbeto, surportante mantelon plektitan el palmaj fibroj, kun korbo, botelkukurbo por enteni vinon kaj dusako kun sescent cendoj en çgi sur la ŝultro. Çar tiu tago estis festo, tre multis vilaçanoj, kiuj, leviçinte tre frue, iris al la urbeto por vendi varojn aŭ fari açetojn. Post kiam Avo foriris, Cuicui en akompano de la hundo prizorgis la pramboaton. Kun nove plektita bambuçapelo sur la kapo, ŝi ir-reirigis la veturantojn fojon post fojo. La hundo sidis sur la pruo kaj tuj saltis sur la bordon por buŝpreni la ŝnurfinon, çiufoje, kiam la boato albordiçgis, kio amuzis la veturantojn. Ankaŭ kelkaj veturantoj el vilaçoj kunportis hundojn, sed tiuj hundoj çiam fariçgis obeemaj çirkaŭ sia mastro, kiam ili forlasis la hejmon, kiel la proverbo diras: “La hundo fariçgas nekapabla, kiam çgi forlasis sian hejmon”. Çe ekveturo la flava hundo aliri al fremda hundo kaj ekflaris çgin. Se Cuiui donis al çgi okulumon, çgi ŝajne komprenis ŝin kaj ne kuraçgis fari çgenojn. Albordiçinte, çgi plenumis la taskon tiri la ŝnuron, kaj poste vidinte la fremdan hundon suriri la monteton, çgi persekutis çgin aŭ mallaŭte bojis kontraŭ çgia mastro. Tiam Cuicui kriis iom kolere al çgi:

“Hundaço, hundaço, kial vi kondutas tiel freneze? Vi ankoraŭ havas aferon por fari. Ne forkuru!”

Kaj çgi rapide rekuris sur la boaton kaj sençese flaradis tien kaj çi tien. Ŝi skoldis:

“Kian frenezaçon vi faris! Kiu instruis al vi tiel agi! Rapide kuŝu tien!”

La hundo ŝajne tute komprenis, kion ŝi diris, kaj reiris al la loko, kie çgi antaŭe restis, aŭ eligis mallaŭtajn bojojn, kvazaŭ çgi memorus ion.

Pluvo sençese falis kaj nebulo vualis la surfacon de la rivereto. Kiam Cuicui estis senokupa, ŝi imagis, kiajn aferojn ŝia avo jam faris tiun tagon. Ŝi sciis, kiajn homojn li renkontis, kion li diris al ili, en kia stato troviçgas çe la urbeto pordego tiun tagon, kaj kio okazis en la apudrivera strato. Ŝi imagis tiel klare kiel ŝi vidis per propraj okuloj. Ŝi ankaŭ konis la temperamenton de sia avo. Kiam li renkontis siajn konatojn, çu grumojn çu kuiristojn en la barako, li emis eldiri festan saluton al ili:

“Mi deziras al vi satmançadon kaj satdrinkadon hodiaŭ, via moŝto!”

La konato respondis: “La samon al vi, pramisto!”

Se la konato kontraŭdiris: “Çu mi povas satmançi kaj satrinki? Mi ne povas satigi nek ebriigi min nur per kvar uncoj da viando kaj du tasoj da alkoholaço!”

Pro tiuj vortoj Avo certe sincere invitis lin drinki sufiçe çe la Verda Rivereto. Se konato dum tiu momento volis trinki buŝplenon da alkoholaço el lia botelkukurbo, la maljuna pramisto, kiu neniam sin montris avarema, tuj enmanigis al li la botelkukurbon. Post trinkado la konato el la barako lekis siajn lipojn kaj laŭdis la alkoholaçon, tiel ke li estis devigita trinki çgin la duan fojon. Pro lia regalo al liaj konatoj, la alkoholaço pli malmultiçgis, ke li devis reiri al la vinbutiko por plenigi la botelkukurbon. Cuicui ankaŭ sciis, ke Avo iros al la kajo por babili kun boatanoj de la çonko, kiu iris kontraŭflue kaj ankris çe la kajo antaŭ unu aŭ du tagoj, demandante pri la prezoj de rizo kaj salo en bazaroj de malsupra baseno. Kelkfoje li klinis sin kaj ŝovis sin en la holdon

odorantan je laminario, loligo, oleo, vinagro kaj kuirfumo de lignobruligo. La boatanoj elprenis manplenon da jujuboj el vazeto kaj donis ilin al li. Post kelka tempo, kiam Avo revenis hejmen kaj Cuicui faris plendojn, tiuj jujuboj sukcesis repacigi ilin. Estis certe, ke, kiam li iris sur la apudrivera strato, multaj vendistoj de butikoj donacis al li zongzi-oj aŭ aliajn aĵojn, kiel respekton al la sindonema kaj devkonscia pramisto. Kvankam li kontestis: “Tiom da aĵoj disrompos miajn maljunajn ostojn, se mi portos ilin”, li tamen devis preni iom por esprimi sian dankemon. Kiam li iris aĉeti viandon ĉe buĉisto, tiu rifuzis akcepti lian monon. Se tiu ĉi buĉisto ne akceptis lian monon, por ne akiri senpagan viandon, Avo preferis turni sin al la alia. La buĉisto diris:

“Kial vi estas tiel obstina, avĉjo? Mi ne volas fari malbonon al vi.”

Sed tio ne eblis por Avo, ĉar li opiniis, ke ili lukras nenion alian ol monon de sango kaj ŝvito. Se ili vere ne akceptis lian monon, li anticipe kalkulis la monon, abrupte ĵetis ĝin en grandan kaj longan bambutubon por mono kaj ekkaptinte la viandon, foriris. Konante lian temperamenton, la buĉisto emis elekti bonan parton de porko kaj intence pesis pli multe ol li volis. Vidinte tion, Avo tuj protestis:

“Ho, mi ne volas la bonon, kiun vi faras al mi, mastro! La viando de porka femuro estas uzata por friti kun tranĉaĵoj de loligo. Ne trompu min! Mi volas la viandon ĉe porka kolo, grasan kaj gluecan, kiu taŭgas al mi pramisto por stufi kun rafanpecoj kaj manĝi kune kun alkoholaĵo!”

Kun viando en mano, li nombris la monon antaŭ ol pagi, kaj petis al la buĉisto nombri refoje. Sed tiu tute ne donis atenton al li kaj simple tinte ĵetis la monerojn en la longan bambutubon. Post tio Avo foriris eĉ kun tre ĉarma rideto. Vidinte lian konduton, la buĉisto kaj aliaj aĉetantoj ridis nereteneble...

Cuicui ankaŭ sciis, ke Avo faros viziton al Sunsun loĝanta en la apudrivera strato.

Ŝi rememoris ĉion, kion ŝi vidis dum la du festoj de pasintaj du jaroj, kaj ŝi sentis grandan ĝojon. Ŝajnis al ŝi, ke nun troviĝis io, kio similis la nekaptetblan flavan sunfloron, kiun ŝi viziis, kiam ŝi fermis siajn okulojn. Tio aperis klare antaŭ ŝiaj okuloj, sed neatingebla kaj nekaptetbla.

Ŝi pensis: “Ĉu vidiĝas tigroj ĉe Bajjiguan?” ŝi ne sciis, kial ŝi subite ekpensis pri Bajjiguan, kiu estis loknomo en la meza parto de Youshui-rivero, malproksime de Chadong je pli ol du cent lioj.

Poste ŝi vagis al alia penso: “Tridek du homoj remas per ses juloj, kaj kiam la ĵonko veturas kontraŭ fluo, oni hisas grandan velon konsistantan el cent pecoj da blanka tolo. Kiel ridinde, se tiu granda ĵonko traveturas Dongting-Lagon...” Ŝi fakte ne sciis, kiom vastas Dongting-Lago, nek vidis tiom grandan ĵonkon. Des pli ridinde, ke ŝi mem eĉ ne sciis, kial ŝi ekpensis pri tio!

Grupo da homoj alvenis pramiĝi, inter kiuj troviĝis vektoportantoj, oficovojaĝantoj, kaj krome patrino kaj ŝia filino. La patrino estis en blua vesto malmole lav-amelita, dum la filino, kun du ruĝe pudritaj vangoj, surmetis novan veston, kiu ne tre bone sidis al ŝi. Ili faros viziton al sia parenco en la urbeto kaj spektos la konkurson de drakboatoj. Post kiam ĉiuj enboatiĝis, Cuicui, fiksrigardante tiun knabinon, kablote veturigis la boaton trans la rivereton. En ŝiaj okuloj la knabino aspektis ĉirkaŭ dektri-aŭ-dekkvar-jara dorlotita kreitaĵo, kiu ŝajne neniam forlasis sian patrinon. Ŝi surportis pintkapajn ŝuojn nove ciritajn, sed makulitajn per koto, kaj pantalonon el purpurece junverda ŝtofo. Vidinte, ke Cuicui rigardas ŝin, ŝi ankaŭ fiksrigardis Cuicui per paro da okuloj similaj al kristalaj globetoj. Ŝi sin montris iom timida, sinĝena kaj samtempe nedireble aminda. La patrino demandis al Cuicui pri ties aĝo. Ridetante, Cuicui ne volontis respondi, sed anstataŭe demandis al la knabino, kian aĝon ŝi havas ĉijare. Aŭdinte ŝian patrinon diri, ke ŝi estas dektri-jara, Cuicui ne retenis sian rideton. Videble laŭ ilia eksteraĵo ili estis patrino kaj filino el

riĉa familio. Okulmezurante la knabinon, Cuicui trovis kun iom da envio, ke ŝi surhavas paron da tordplektitaj arĝentaj braceletoj blanke brilantaj. Kiam la boato albordeĝis, la pasaĝeroj iris sur la bordon unu post alia. La virino elpoŝigis kupran moneron, ĝin enmanigis al Cuicui kaj foriris. Tiam Cuicui eĉ forgesis la regulon difinitan de sia avo, nek dirinte dankon nek redoninte la moneron. Ŝi nur stupore rigardis tiun knabinon inter la homgrupo. Kiam la grupo da pasaĝeroj estis transgrimpontaj la monteton, Cuicui subite postkuris hasteme kaj redonis la moneron al la virino sur la montsupro. La virino diris:

“Mi donacis ĝin al vi!”

Cuicui diris nenion kaj nur skuis sian kapon. Antaŭ ol la virino aldonis ion, ŝi jam forkuris al la pramboato.

Kiam ŝi suriris la boaton, iu krie petis pramiĝi trans la bordo kaj ŝi tiris la boaton transen. Ĉifoje estis sep pasaĝeroj, inter kiuj troviĝis aliaj du knabinoj. La duopo speciale surportis purajn vestojn same por spektado al boatkonkurson. Tamen ili ne estis tre belaspektaj. Pro tio Cuicui des malpli forgesis la antaŭan knabinon.

Tiutage tre multaj pasaĝeroj, precipe knabinoj estis pli multaj ol en ordinaraĵoj. Tirante kablon por transigi la pramboaton, Cuicui gravuris en sian memoron tiujn bonajn, groteskajn, belaspektajn kaj kun ruĝaj okulokadroj. Kiam ne homoj petis pramiĝi kaj Avo ne alvenis, ŝi fojrefoje rememoris la eksterajn de tiuj knabinoj. Ŝi softe ĉantis:

*“Tigroj en la monto mordas homojn,
La fraŭlino de l’ oficiro estas ja la unua viktimo.*

...

*La plejaĝa franjo surportas harpinglon oran,
La pliaĝa franjo surhavas arĝentan braceleton,
Nur mi juna franjo havas nenion por ornami,
Mi beligas min nur per sojfaba ŝoso ĉe orelo.”*

La pasaĝeroj el la urbeto, kiuj iros al vilaĝo, vidis, ke ĉe drinkejo la maljuna pramisto altrudas sian botelkukurbon al juna boatano por regali lin per la alkoholaĵo ĵus aĉetita de li. Kaj ili rakontis tion al Cuicui. Ŝi mokridis, ke Avo paradus sian malavarecon en malĝusta tempo kaj en malĝusta loko. Post kiam la pasaĝeroj foriris, ŝi, sidante sur la boato, mallaŭte zumis la kanton, kiun sorĉisto ĉantis en decembro por plenumi voton kaj bonvenigi feojn:

*Feoj kaj dioj, rigardu la homojn ĉi tie!
Ili ja estas honestaj, sanegaj kaj junaj.
La plenkreskuloj kapablas vintrinki, labori kaj dormi;
Tiuj infanoj kapablas plenkreski, rezisti ja kontraŭ malsat’ kaj malvarmo;
Bovoj iliaj plugemas, kaprinoj naskemas, kokinoj, anasoj kovemas;
Inoj iliaj povscias prizorgi infanojn, kantadi kaj trovi amaton!*

*Feoj kaj dioj, sobiru kaj staru duflanken.
Brava soldat’ jen surrajdas ĉevalon,
La generalo mantenas la vipon el fero!*

*Feoj kaj dioj, sobiru ja lante el nuboj!
Se sur azeno, jen sidu stabile,
Se piediri, do zorgu pri via paŝado!*

*Longa feliĉo ŝuldiĝas al dioj,
Bona vetero favoras sub feoj,
Frandaj manĝaĵoj jam pretas,
Porko kaj kapro rostiĝas sur fajro!*

*Kelkaj gravuloj en la historio
Estis tiranoj antaŭ sia morto,
Ili kondukis malbone aŭ bone.
Nun ne maldecas por ili alveni festenen!
Manĝu trankvile, vintrinku aplombe,
Tago serena jen taŭgas por vi transveturi.
Kiam ebriaj vi kune reiros al hejmo.
Kanti mi por vi daŭrigos!*

La kantvoĉo sonis ne nur milde, sed ankaŭ iom morne en ĝojo. Post kantado ŝi eksentis radion da tristeco. Ŝia penso flugis al la sceno de fajro kaj tamburado en la kampoj por danki diojn ĉe la fino de aŭtuno.

En malproksimo leviĝis sonoj de tamburado. Ŝi sciis, ke tiam jam lanĉiĝis en la riveron la drakboatoj kun linioj vermiljone pentritaj. Delikata pluveto ankoraŭ falis senĉese kaj nebulo malalte pendis super la surfaco de la rivereto.

9

Kiam Avo revenis, jam estis proksime al la tempo por tagmanĝi. Kun multe da aĵoj en la manoj aŭ sur la ŝultroj li transgrimpis la monteton kaj tuj vokis al Cuicui, ke ŝi veturigu la boaton trans la rivereton por renkonti lin. Vidinte multajn homojn jam iri al la urbeto, ŝi senhelpe dronis en maltrankvileco. Aŭdinte vokadon de Avo, ŝi tuj vigliĝis kaj akutvoĉe respondis:

“Avĉjo, avĉjo, mi alvenas!”

Kiam la maljunulo enboatiĝis, li demetis la ŝarĝojn sur la pruon. Helpante ŝin tiri la kablون, li infanece montris al ŝi rideton kun la mieno modesta kaj hontema.

“Vi brulas de maltrankvileco, Cuicui, ĉu ne?”

Ŝi devintus plendi kontraŭ li, tamen ŝi respondis:

“Avĉjo, mi scias, ke vi invitis alian al drinkado sur la apudrivera strato. Vi certe havis ĝojan tempon.”

Konsciante, ke li tre ŝatas sin distri sur la strato, ŝi volus diri tiujn vortojn al li, sed timante, ke tio humiligus lin kaj li furioze krius, ŝi retenis tiujn vortojn.

Okulmezurinte la aĵojn sur la pruo, ŝi trovis, ke mankas la botelkukurbo de vino, kaj ŝi sible ridetis.

“Avĉjo, vi estas vere malavara. Vi invitis la moŝton kaj boatanojn al drinkado kaj vi eĉ englutis la botelkukurbon en la ventron!”

Ridetante li hasteme klarigis:

“Ne, ne. La botelkukurbo estis retenita de via onklo Sunsun. Li vidis min inviti aliajn al drinkado kaj diris al mi: ‘Hoj, hoj, vi pramisto, tio ne eblas. Ĉar vi ne havas vinfarejon, kial vi prodigas la vinon tiamaniere! Donu ĝin al mi kaj mi trinkos ĝis la lasta gutto.’ Li vere diris: ‘Mi

trinkos ĝis la lasta gutoj. Mi donis la botelkukurbon al li. Mi divenas, ke li ŝerce faris tion. Ĉu li malhavas alkoholaĵon en la hejmo? Cuicui, diru al mi..."

"Ĉu vi pensas, avĉjo, ke li vere volis trinki vian vinon kaj faris ŝercon kun vi?"

"Do, kion vi volas diri?"

"Trankviliĝu. Li certe konsideris, ke vi regalas aliajn per alkoholaĵo en malĝusta loko, kaj li retenis vian botelkukurbon, ne lasante aliajn forkonsumi vian alkoholaĵon. Post kelka tempo li sendis redoni ĝin al vi. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas? Kian cerbon vi havas!..."

"Ho, vere, ke li faros tion!"

Dum ili babilis, la boato jam albordiĝis. Ŝi unue helpis al Avo transporti la aĵojn kaj ŝi nur prenis tiun fiŝon kaj la koloran dusakon. La mono jam elĉerpiĝis en la dusako kaj troviĝis nur pako da sukeraĵo kaj paketo da sezamaj kukoj anstataŭe. Apenaŭ ili transportis la aĉetitaĵojn al la hejmo, kiam iu krie petis pramiĝi de transa bordo. Li volis, ke ŝi gardu la viandon kaj legomojn kontraŭ vaganta kato, kaj li konkure malsupreniris al la bordo por plenumi la peton. Post nelonge li kaj la pasaĝero eniris la domon, brue babilante. La pasaĝero estis sendita por redoni la botelkukurbon. Aŭdiĝis la voĉo de Avo:

"Vi divenas prave, Cuicui. Li vere sendis redoni ĝin!"

Antaŭ ol ŝi iris al la kuirforno, Avo kaj junulo kun bruna vizaĝo kaj larĝaj ŝultroj eniris la domon.

Ŝi kaj la gasto ridetis, tiel ke Avo havis tempon por diri plu. La juna gasto ridete rigardis ŝin. Ŝi ŝajne komprenis, kial ŝi estas rigardata de la gasto, kaj ŝi iris al la forno por fari fajron. Tiam alia ĉe la bordo krie petis pramiĝi kaj ŝi haste kuris el la domo al la boato. Ŝi transigis la pasaĝerojn kaj tuj ricevis peton de aliaj. Pluvetis, tamen la pasaĝeroj tre multis kaj ŝi veturigis ilin en tri sinsekvaj fojoj. Plenumante transigon sur la boato, ŝi pensis pri la interesaĵoj de Avo. Ŝi ne sciis, kial la sendito el la urbeto, kiu redonis la botelkukurbon, ŝajnis ŝia konato. Kvankam ŝi vidis en li konaton, ŝi tamen ne memoris, kie ili renkontiĝis vidalvide. Ŝi ne volis ĝeni sin per tiu vizitanto, tial ŝi nature ne povis diveni prave, kiu li estas.

Starante sur roko, Avo laŭte vokis:

"Cuicui, Cuicui, suprenvenu por iom ripozi. Akompanu la gaston por kelka tempo!"

Kiam ne troviĝis veturantoj, ŝi volis reiri hejmen kaj fari fajron por kuirado. Sed ŝi ne volis supreniri pro la vokado de sia avo.

La gasto demandis al Avo, ĉu tiu iros al la urbeto kaj spektos la boatkonkurson. La maljunulo respondis, ke li devas zorgi pri la pramboato. Ili ambaŭ babilis pri aliaj aferoj. Fine la gasto venis al la temo, kiu pezis sur lia koro:

"Oĉjo, Cuicui jam plenkreskis. Kiel bela ŝi aspektas!"

La maljunulo ekridetis. "Li havas la saman opinion de sia pliĝa frato. Vere malkaŝema junulo," li pensis. Tamen li elbuŝigis:

"Moŝto la Dua, nur vi indas laŭdojn en ĉi tiu loko. Oni diras, ke vi estas belaspekta! 'Brava leopardo en monto, bela fazano en arbaro' estas bonaj vortoj, per kiuj oni laŭdas vin!"

"Sed tio ne estas trafa."

"Tre trafa! Mi aŭdis de boatano, ke lastfoje kiam vi eskortis la ĵonkon, ĝi suferis akcidenton ĉe la rapidfluejo Baijiguan kaj vi savis tri homojn en rapida fluo. Kaj tranoktante ĉe la rapidfluejo, vi estis viditaj de la virinoj de tiu vilaĝo kaj ili kantadis ekstere de via ŝedo tra la tuta nokto. Ĉu tio estas vera?"

“Ne estis virinoj, kiuj kantadis, sed lupoj, kiuj hurlis. Tie abundas lupoj kaj ili serĉis ŝancon vori nin! Ni bruligis grandan fajron, kiu timigis ilin, tiel ke ni ne estis voritaj de ili!”

La maljunulo ekridetis:

“Pli bone! Tiuj vortoj ankoraŭ estas veraj. Lupoj voras nur junulinojn, infanojn kaj dekok-jarajn belaspektajn junulojn, sed ne kadukulojn kia mi!”

Moŝto la Dua diris:

“Oĉjo, vi jam vivas dudek mil tagojn ĉi tie. Oni diras, ke ni vivas sub la favora stelo kaj nia loko produktos famulon. Kial ankoraŭ ne aperas tia famulo?”

“Ĉu vi diris, ke certe tia famulo produktiĝos en la loko sub la favora stelo? Mi opinias, ke se tia famulo ne produktiĝos en fora loko kia la nia, tio ne gravas. Jam sufiĉas, ke ni havas saĝajn, honestajn, bravajn kaj laboremajn junulojn. Via patro kaj vi du fratoj jam igis nian lokon multe glora!”

“Bone dirite, oĉjo. Ankaŭ mi havas la saman opinion. Nia loko ne produktas malbonulojn, sed bonulojn kia vi. Kvankam vi estas maljuna, vi, simila al fortika nanmuo¹², vivas ĉi tie firme kaj stabile, kun temperamento malkaŝema kaj grandanima. Kia raraĵo!”

“Ne parolu pri mi kadukulo. Mi jam sperti mian porcion da sunbakado, pluvbatado, longaj vojaĝadoj kaj pezaj ŝarĝoj. Mi iam plenigis mian ventron per riĉaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj ankaŭ mi suferis malsaton kaj malvarmon. Baldaŭ mi kuŝos sub la malvarma grundo kiel manĝaĵoj por vermoj. Vi junuloj ĝuos ĉion en la mondo. Klopodu kaj la vivo ne vanigos vin. Ankaŭ vi ne vanigos la vivon!”

“Oĉjo, vi ja estas modelo en laborado por ni. Ni junuloj ne aŭdacus vanigi nian vivon!”

Post kelktempa babilado, la junulo volis foriri. La maljunulo vokis al Cuicui ĉe la pordo, volante, ke ŝi revenu prepari manĝaĵojn, kaj li anstataŭos ŝin por zorgi pri pramado. Ŝi ne volis surbordiĝi, kaj la gasto jam enboatiĝis. Kiam ŝi tirmovis la boaton, Avo ŝajnigis sin plendema, dirante:

“Cuicui, se vi ne suprenvenos, ĉu mi mem fariĝu dommastrino por prepari manĝaĵojn?”

Ĵetinte straban ekrigardon al la gasto, ŝi trovis, ke li alkröĉiĝas al ŝi per siaj okuloj. Ŝi deturnis sian vizaĝon kaj kun lipoj kunpremitaj memfide tiris la transversan kablön trans ambaŭ bordoj, ke la boato malrapide moviĝis al la transa bordo. Starante sur la pruo, la gasto alparolis ŝin:

“Post manĝado, ĉu vi kaj via avo kune iros spekti la konkurson de drakboatoj?”

Ŝi vole nevole respondis:

“Mia avo jam diris, ke li ne iros. Se li irus, neniu prizorgus la pramboaton.”

“Kaj vi?”

“Se avĉjo ne iros, ankaŭ mi ne.”

“Ĉu vi ankaŭ prizorgos la pramboaton?”

“Mi akompanos mian avon.”

“Mi sendos prizorgi la pramboaton anstataŭ vi ambaŭ, ĉu bone?”

Pum! La nazo de la boato jam frapiĝis kun la bordo kaj ĝi albordiĝis. Moŝto la Dua faris eksalton kaj starigis sin sur la deklivo, dirante:

“Mi vin ĝenas, Cuicui!... Kiam mi atingos la hejmon, mi sendos anstataŭi vin. Rapidu manĝi. Kaj vi ambaŭ venos al mia hejmo por spektado al boatkonkurso. Hodiaŭ multas spektantoj. Ili certe estigos ekscitiĝon!”

¹² *Nanmuo: Phoebe nanmu*

Ŝi ne povis kapti la bonintencon de la fremdulo, nek kompreni, kial li insistis, ke ili ambaŭ spektos la konkurson en lia hejmo. Ekridetante kun la buŝeto fermita, ŝi reveturigis la boaton. Kiam ŝi atingis la bordon ĉe sia kabano, ŝi vidis, ke li ankoraŭ staras sur la transa monteto, kvazaŭ atendante ion, sed ne tuj foriros. Enirinte la kabanon, ŝi iris al la forno kaj faris fajron. Enŝovante humidajn pajlojn en la fornon, ŝi explore demandis al Avo, kiu estis provanta la alkoholaĵon en la botelkukurbo redonita de la gasto:

“Avĉjo, tiu homo diris, ke li sendos anstataŭi vin, por ke ni ambaŭ spektu la konkurson. Ĉu vi iros aŭ ne?”

“Ĉu vi ĝojas, ke vi iros?”

“Mi ĝojas, se ni ambaŭ iros. Tiu homo estas bonkora. Ŝajnas, ke mi ie renkontis lin. Kiu li estas?”

Avo pensis: “La afero iras bone. Li ankaŭ konsideras, ke vi estas bona!” Kun rideto li diris:

“Ĉu vi ne memoris, ke iu minacis lasi gandan fiŝon mordi vin ĉe la bordo de la rivero antaŭ du jaroj, Cuicui?”

Ŝi jam komprenis, sed afektis nekomprenemon kaj demandis:

“Kiu li estas?”

“Jen pensu kaj divenu.”

“Kiel mi povus? Multas homoj kaj mi ne povas diveni, kiu li estas.”

“La dua filo de Sunsun, superreganto de la kajo. Li konas vin, dum vi eĉ ne konas lin!”

Li trinketis alkoholaĵon per malgranda engluto. Li mallaŭte diris, kvazaŭ laŭdante ne nur la vinon, sed ankaŭ tiun homon:

“Bone, bonege. Kia bonŝanco!”

Aŭdiĝis kriadado por pramiĝi sube de la deklivo antaŭ la kabano. Ankoraŭ dirante “Bone, bonege...”, la maljuna avo hastis al la boato por transveturo.

Ĉapitro 4

10

Kiam ili prenis manĝon, aŭdiĝis kria peto por transveturo. Cuicui hastis al la boato antaŭ sia avo. Ĝis ŝi atingis la transan bordon, ŝi eksciis, ke la petanto estis la boatano, kiun Sunsun sendis anstataŭi ilin. Ekvidinte ŝin, li diris:

“Moŝto la Dua volas, ke vi iros tuj post manĝado. Li jam malsupreniris al la rivero.”

Kaj kiam li vidis Avon, li ripetis:

“Moŝto la Dua volas, ke vi iros tuj post manĝado. Li jam malsupreniris al la rivero.”

Streĉante la orelojn, oni povis aŭdi la intensiĝantajn tambursonojn, el kiuj oni povis imagi, ke tiuj tre mallarĝaj drakboatoj rekte tranĉis la akvon de la rivero kaj restigis belajn longajn liniojn da surfoj sur la rivera surfaco!

La alvenanto rifuzis trinki teon kaj jam pretigis lin sur la pruo. Kiam Cuicui kaj Avo manĝis, Avo invitis lin al drinkado kaj li nur skuis la kapon por rifuzi la inviton. Avo diris:

“Mi ne volas iri, Cuicui. Vi iros kune kun la hundo, ĉu bone?”

“Se vi ne iros, mi ankaŭ ne!”

“Se mi iros?”

“Mi ne volus iri, sed mi volontas akompani vin.”

Ridetante, li diris:

“Do vi akompanos min, Cuicui. Bone, vi akompanos min!”

Kiam Avo kaj lia nepino atingis la bordon de la riverego, tie jam kunpuŝiĝis homoj. La pluveto jam ĉesiĝis, sed la tero ankoraŭ estis malseka. Li volis, ke ŝi iru al la palafitdomo de Sunsun por spektado al la boatkonkurso, sed ŝi pensis, ke la bordo estis pli bona loko. Post nelonge, kiam ili staris sur la bordo, la sendito de Sunsun irigis ilin. La palafitdomo jam plenis je homoj. La patrino kaj ŝia filino el riĉula familio, kiujn Cuicui priantis en la boato dum pramiĝo, estis bone traktataj de la familio Sunsun kaj okupis la plej bonan fenestron por spektado. Je ekvido de Cuicui, la knabino diris al ŝi:

“Alvenu, alvenu!”

Kun iom da timideco Cuicui iris kaj sidiĝis sur la benkon malantaŭ ili, kaj Avo foriris.

Avo ne volis spekti la konkurson, sed li estis trenita de konato al la loko malproksima je duona lio sur supra baseno por pririgardi akvomuelilon en nove konstruita muelejo. La maljuna pramisto tre interesiĝis pri la akvomuelilo. En malgranda pajlkabano situanta ĉe la piedo de monto kaj rigardanta al la rivero troviĝis granda ronda ŝtonslabo fiksita al la transversa akso kaj oblikve metita en ŝtona trogo. Kiam la kluzo estis malfermita, fluoj sin ĵetis kontraŭ la subteran radon kaj la ŝtonslabo rapide turniĝadis supre. La mastro, kiu ĝin manipulis, verŝis krudan rizon en la trogon, elprenis jam muelitajn rizgrajnojn, metis ilin en la kribrilon ĉe murangulo kaj elkribris branon. La brano sterniĝis ĉie sur la tero kaj kovris la blankan tukon volvantan la kapon de la mastro. Kiam la vetero estis bela, la mastro plantis rafanojn, verdajn legomojn, ajlojn kaj ŝenoprazojn en la parceloj antaŭ kaj malantaŭ la muelejo. Kiam la flu-trogo paneiĝis, li senpantalone enakviĝis en la riveron kaj masonis rulŝtonojn por ripari la elfluejon. Se la tereno de la muelejo estis bone aranĝita, li povis konstrui malgrandan fiŝan lageton, tiel ke li povis akiri fiŝojn senpene, kiuj memvole eniĝis

en la lageton, kiam la rivero ekŝveliĝis. Videble, estis pli interese kaj ŝanĝoplene prizorgi muelejon ol funkciigi pramboaton. Sed se pramisto volus havigi al si muelejon, tio estus neebla fantazio, ĉar tia posedaĵo ĝenerale apartenis al loka riĉulo. Kiam la konato kondukis lin al la muelejo, li jam diris al li pri la posedanto de la muelejo. Babilante, ili rondiris por pririgardi.

Piedfrapante la novan muelilon, la konato diris:

“Tiuĵ homoj loĝantaj en Zhongzhai-vilaĝo en alta monto ŝatas aĉeti proprietaĵojn ĉe la rivera bordo. Ĝi apartenas al ĉefkomandanto Wang de Zhongzhai-vilaĝo. Ĝi kostis al li sepcent grapolojn da moneroj!”

Rulante siajn malgrandajn okulojn, la maljunulo envie aprezis kaj okulmezuris ĉion ĉi tie. Balancadante la kapon, li donis tre decajn komentojn al ĉiuj objektoj en la muelejo. Poste ili ambaŭ sidiĝis sur nelakitan benkon. La konato parolis pri la estonteco de la muelejo, ŝajne kiel doto de la filino de la ĉekomandanto. Li do ekpensis pri Cuicui kaj pri la afero, kiun Moŝto la Unua konfidis al li. Li demandis:

“Kiom da jaroj via Cuicui havas ĉijare, oĉjo?”

“Apenaŭ dek kvin jarojn.”

Dirinte tiujn vortojn, la maljunulo kalkulis mense la pasintajn jarojn.

“Kiel kapabla tiu dekkvar-jarulino estas! Kiu edzinigos ŝin, tiu estas bonŝanculo!”

“Bonŝanculo? Ŝi ne havos tian doton kia muelejo. Ŝi havas nenion krom si mem.”

“Ne parolu pri senhaveco. Ambaŭ manoj de utila homo valoras kiel kvin muelejoj. Luoyang-Ponton konstruis Lu Ban¹³ per siaj propraj manoj!...”

La konato babilis kun Avo pri tio kaj alio, kaj fine li ekridis.

Ankaŭ la maljunulo ekridis, pensante: “Kia absurdaĵo! Mi ne kredas, ke Cuicui povus konstrui la ponton per siaj ambaŭ manoj.”

Post kelka tempo la konato aldonis:

“La junuloj de Chadong havas akrajn okulojn por elekti al si edzinon. Oĉjo, se vi ne prenos tion serioze, mi diros al vi ŝercon.

“Kia ŝerco?” demandis la maljunulo.

“Se vi ne ofendiĝos, oĉjo, vi povos preni tion kiel veron.”

Kaj poste li rakontis al la avo pri tio, kiel Moŝto la Unua publike laŭdis Cuicui kaj petis al li sondi la opinion de Avo pri la afero. Fine li priskribis al Avo la iaman dialogon inter si kaj Moŝto la Unua.

“Mi demandis: ‘Moŝto la Unua, ĉu vi diris la veron aŭ ŝercon?’ Li respondis: ‘Vi iru sondi la opinion de la maljunulo. Mi ŝatas Cuicui, mi volas ŝin. Mi diras la veron!’ Mi diris: ‘Mi ne havas lertan langon. Se la maljunulo vangfrapos min, se mi tion diros?’ Li diris: ‘Se vi timas lian vangopfrapon, do unue vi ŝerce diros tion kaj li ne vangofrapos vin!’ Do, oĉjo, mi diris tion al vi kiel ŝercon. Kiam li revenos el la orienta Siĉŭano je la naŭa de la monato, pensu, kiel mi respondos al li?’”

La maljunulo ekpensis pri tio, kion Moŝto la Unua persone diris al li lastfoje. Li kredis, ke liaj vortoj estas elkoraj, kaj ankaŭ sciis, ke Sunsun, lia patro ankaŭ ŝatas ŝin. Li eksentis ĝojon. Sed laŭ loka moro svatanto devas, kunportante pakaĵon da kukoj, iri al la koncernata hejmo kaj serioze elmeti la peton. La maljuna pramisto diris:

“Kiam li revenos, vi diros al li: ‘Ŝakludo havas regulojn: ĉaro kaj ĉevalo moviĝas en malsamaj manieroj. Se Moŝto la Unua volos esti ĉaro, lia patro devos sendi svatanton serioze elmeti la peton al

¹³ Lu Ban (507-444 a.K.), fama arkitekto.

mi. Se li volos esti ĉevalo, li mem starigos sin sur la transa montsupro kaj kantados por Cuicui dum tri kaj duona jaroj.”

“Se la kantado da tri kaj duona jaroj povus tuŝi la koron de Cuicui, oĉjo, do mi mem kantos de morgaŭ.”

“Ĉu vi opinias, ke mi ne konsentos, se Cuicui mem konsentos?”

“Mi ne opinias tiel. Oni konsideras, ke se vi konsentos, Cuicui ne povos doni rifuzon.”

“Ne parolu tiele. Tio koncernas ŝin!”

“Eĉ se tio estas ŝia propra afero, oni devas ricevi vian konsenton. Laŭ mia opinio, kantadi sub la suno kaj luno por tri kaj duona jaroj estas malpli valora ol via konsento!”

“Do, aŭskultu al mi. Ni agu tiamaniere. Kiam li revenos, diru al li, ke li klarigos tion al sia patro. Miaflanke, mi unue eltiros ŝian opinionon. Se ŝi pensas tion pli inda iri kune kun la kantonto, kiu kantados dum tri kaj duona jaroj, do vi konsilos al Moŝto la Unua, ke li iru la zigzagan vojon.”

“Bone. Kiam mi vidos lin, mi diros al li: ‘Moŝto la Unua, tiun ŝercon mi jam diris al la maljunulo. Por honeste diri tio dependas de via sorto.’ Vere tio dependas de lia sorto. Tamen mi komprenas, ke lia sorto ankoraŭ estas tenata en via mano.”

“Kion vi diris! Se mi povas decidi tiun aferon, mi jam frue donis al li promeson.”

Post kiam la duopo finis babiladon, ili iris pririgardi la triholdan ĵonkon nove aĉetitan de Sunsun. Samtempe en la palafitdomo de Sunsun prezentiĝis alia okazaĵo.

Kvankam Cuicui sidis ĉe la knabino el riĉula familio kaj okupis bonan lokon, kie ŝi povis klare vidi la riveron tra la fenestro, ŝi tamen sentis sin maltrankvila. La spektantoj, kiuj kunpuŝiĝe rigardis la riverscenojn ĉe aliaj fenestro, ŝajne ofte direktis sian rigardon al Cuicui kaj aliaj. Kaj iuj el la spektantoj eĉ afektis havi aferon por fari kaj iris de la fino de la domo al la alia tute por klare pririgardi Cuicui kaj ŝiajn kunsidantojn. Ŝi sentis sin ĝenecon kaj volis forkuri per ia preteksto. Post nelonge je kanonado sur la rivero kelkaj boatoj startis de la transa bordo kaj rekte direktis sin al cis bordo. Komence kvar boatoj remiĝis preskaŭ flankeo-ĉe-flanke tre rapide kiel kvar sagoj sur la rivero. Duonvoje du el ili iom antaŭis kaj pli poste unu el la du antaŭirantaj boatoj superis la alian. Kiam ĝi atingis la lokon kontraŭ la pordego de impostkolektejo, sonis la duafoja kanonado. Ĉe tio la venko estis aljuĝita al la drakboata teamo remita de loĝantoj en la apudrivera strato. Por celebri la venkon oni bruligis petardojn kaj brue batis tamburojn. Ĉie ĉe la bordo kaj en palafitdomoj oni samtempe ĝoje kriadis por gratuli la venkintojn. Cuicui rimarkis, ke la junulo kun ruĝa tuko sur la kapo, kiu starante sur la pruo, svingis flageton por kuraĝigi la boaton antaŭen, estis Moŝto la Dua, kiu estis sendita redoni la botelkukurbon al Avo ĉe Verda Rivereto. La okazaĵo antaŭ tri jaroj revenis al ŝia menso. “Granda fiŝo mordos vin!” “Tio ne koncernas vin, se granda fiŝo mordos min!” “Hundeto, kial vi bojas kontraŭ la ĝusta persono!” Tiam ŝi ekpensis pri la hundo, kiu forkuris oni ne scias kien. Ŝi forlasis la sidlokon kaj serĉis ĝin ĉie en la domo, portempe forgesante la homon starantan sur la pruo.

Serĉante sian hundon en homamaso, ŝi aŭskultis al babilado de aliaj spektantoj.

Virino kun larĝa vizaĝo demandis:

“Kiu estas tiuj sidantaj en la avantaĝa loko por spekti tra la meza fenestro de la domo de Sunsun?”

Alia virino diris:

“Ŝi estas la filino de vilaĝa gentlemano Wang de Zhongzai-vilaĝo en la monto. Ili diris, ke ŝi venis spekti la konkurson, kaj fakte pririgardi la homon kaj samtempe esti pririgardata de aliaj! Ŝi havas bonan sorton kaj honoron sidi tie!”

“Kiun ŝi pririgardas? De kiu ŝi estas pririgardata?”

“Ho, ĉu vi ankoraŭ ne komprenas? Tiu vilaĝa ĝentlemano volas esti boparenco de la familio Sunsun.”

Kiu estos ŝia venonta edzo? Moŝto la Unua aŭ Moŝto la Dua?”

“Oni diras, ke li estas Moŝto la Dua. Atendu kaj vi povos vidi, ke li suprenvenos por renkonti sian venontan bopatrino!”

Alia virino intermetis:

“Estos bonege, se tiu afero estos decidita! La filino havas muelejon kiel doton, kiu pli valoras ol dek jardungitoj”

Aŭdiĝis la demando:

“Kio estas la opinio de Moŝto la Dua? Ĉu li ŝatas la ideon?”

Iu mallaŭte diris:

“Moŝto la Dua jam diris, ke li ne volas pririgardi la filino, kaj antaŭ ĉio li ne volas fariĝi la mastro de la muelejo.”

“Ĉu vi aŭdis lin persone diri tion?”

“Mi aŭdis pri tio. Oni diras, ke Moŝto la Dua korinklinas al knabino, kiu sin okupas per pramado.”

“Li ne estas tiel stulta kiel idioto. Ĉu li ne volas muelejon, sed pramboaton?”

“La Ĉielo scias! Ĉiu havas sian propran guston. En liaj okuloj la pramboato estas pli valora ol muelejo.”

Babilante, ili nur rigardis al la rivero, sed neniu el ili turnis sian kapon kaj donis atenton al Cuicui malantaŭ ili.

Kun brulanta vizaĝo ŝi iris al alia loko kaj aŭdis aliajn du babilantojn mencii tiun aferon, dialogante:

“Ĉio jam estas bone aranĝita. Nur mankas la konsento de Moŝto la Dua.”

“Nur rigardu la fortostreĉon de Moŝto la Dua kaj vi divenas, ke al li la forton donis virgulino sur la bordo!”

Kiu estas la virgulino, kiu ekscitas Moŝton la Duan? Aŭdinte tion, Cuicui ekhavis iom da malkvieto en la koro.

Cuicui estis iom tro malaltkreska por vidi la surriveran konkurson trans la ŝultroj de antaŭstarantoj. Ŝi nur aŭdis intensiĝantajn sonojn de tamburado kaj alproksimiĝantan akklamadon sur la bordo. Ŝi eksciis, ke la drakboato de Moŝto la Dua estas preterpasanta ĝuste sube de la palafitdomo. La spektantoj ankaŭ plengorĝe kriadis kaj intermikse vokadis la nomon de Moŝto la Dua. Ĉe la flanko de la edzino de la vilaĝa ĝentlemano oni bruligis malgrandajn petardojn. Subite aŭdiĝis alispeca mirplena kribruo kaj multaj homoj eldomiĝis kaj iris en la direkto al la bordo. Ŝi ne sciis, kio okazis, kaj konfuzite hezitis, ĉu ŝi devos sidi sur la antaŭa sidloko aŭ daŭre staras malantaŭ la dorsoj de aliaj spektantoj. Vidinte, ke iu alportas pleton plene kun zongzi-oj kaj fajnaj kukoj al la sinjorino kaj ŝia filino de la vilaĝa ĝentlemano por gustumo, ŝi decidis ŝovi sian vojon tra la homamason el la domo por vidi sur la bordo anstataŭ iri al tiu riĉa sinjorino kaj ŝia filino. Malsuprenirante al la bordo tra la pasejo apud salvendejo, ŝi paŝis inter palisoj sub la palafitdomo kaj renkontis homamason kun Moŝto la Dua kapvestita per ruĝa tuko. Okazis, ke pro mispaŝo li falis en la riveron kaj sukcesis elakviĝis. Kvankam ŝi flanken staris, la alvenantoj vole nevole tuŝis ŝin kubuto kontraŭ kubuto pro mallarĝeco de la pasejo. Je ekvido de Cuicui, Moŝto la Dua demandis:

“Cuicui, vi alvenis. Ĉu via avo ankaŭ alvenis?”

Ŝi tenis sin silenta pro la brulanta vizaĝo, pensante: “Kien mia hundo forkuris?”

Li refoje demandis:

“Kial vi ne spektas supre en nia palafitdomo? Mi jam aranĝigis al vi bonan sidlokon.”

Ŝi tamen pensis: “Kiel stranga afero preni muelejon kiel doton!”

Ne povante devigi ŝin reiri, li forlasis ŝin. Kiam ŝi atingis la bordon, ŝia koreto jam plenis de io nebuleca. Ĉu tio estas ĉagreno? Ne! Ĉu malĝojo? Ne! Ĉu ĝojo? Ne! Kio do ĝojigas la knabinon? Ĉu kolero? Vere jes. Ŝi ŝajne sentis, ke ŝi koleras kontraŭ unu homo aŭ kontraŭ si mem. Tre multis homoj sur la bordo, eĉ en malprofunda akvo ĉe la kajo, sur mastoj kaj boattegmentoj, kaj sur la palisoj. Ŝi parolis al si mem:

“Kio bona indas mian rigardadon en tiel granda homamaso?”

Komence ŝi konsideris, ke ŝi povos trovi sian avon en iu boato, sed serĉante kelkan tempon, ŝi vidis lian spuron nenie. Kiam ŝi puŝis sian vojon al la bordo, ŝi tuj vidis sian hundon kun unu el la servistoj de Sunsun rigardi la spektaklon en malplena boato fore de la bordo je ĉirkaŭ dek futoj. Ŝi akutvoĉe alvokadis la hundon kaj ĝi, levinte la kapon kaj rigardinte ĉirkaŭen, abrupte sin ĵetis en riverakvon kaj naĝis al ŝi. Kiam ĝi aliris al ŝi, ĝi svingis sian tramalsekigitan korpon kaj senĉese saltetadis. Ŝi diris:

“Sufiĉe! Ne kondu tu kiel frenezulo! Vi ne volas renversi la boaton, kial vi salte enakviĝis?”

Ŝi kaj la hundo iris serĉi la avon. Antaŭ lignovendejo en la apudrivera strato ili hazarde renkontiĝis kun li.

La maljuna pramisto diris:

“Cuicui, mi jam vizitis bonan muelejon kun nova muelŝtono, nova norio kaj novaj pajloj sur la tegmento! La baraĵo retenas fluon tre rapidan. Kiam la kluzo malfermiĝas, la norio turniĝadis kiel turbo.”

“Kiu estas ĝia posedaanto?” ŝi afekte demandis.

“Posedanto? Ĝi apartenas al ĉekomandanto Wang en la monto. Mi aŭdis, ke li fordonos ĝin kiel la doton de sia filino. Kiel lukse! Nur konstruado kostis sep cen grapolojn da moneroj, ne inkluzive de ventmuelilo kaj aliaj aparatoj!”

“Kiu edzinigos lian filinon?”

Rigardante ŝin, li seke ridis, dirante:

“Cuicui, granda fiŝo mordos vin, granda fiŝo mordos vin.”

Ĉar ŝi jam sciis pri tio, ŝi ŝajnis sin nekomprenebla kaj demandis al li:

“Kiu alproprigos la muelejon, avĉjo?”

“Yue Yun, Moŝto la Dua!” Dirinte tion, li parolis al ŝi: “Kelkaj envias, ke Moŝto la Dua gajnos la muelejon, dum aliaj envias, ke la muelejo obtenos Moŝton la Duan!”

“Kiu envias lin, avĉjo?”

“Mi,” dirante, li ekridetis.

“Vi estas ebria, avĉjo,” ŝi diris.

“Via avĉjo estas nek ebria nek freneza... Ni iru al la bordo kaj spektu, kiel oni disŝutos anasojn en la riveron,” diris la avo. Kaj li ankoraŭ volus aldoni: “Se Moŝto la Dua kaptos anason, li certe donacos ĝin al ni.”

Antaŭ ol li eldiris tion, Moŝto la Dua alvenis kaj ridete starigis sin antaŭ ŝin. Ŝi ankaŭ ridetis.

La triopo reiris al la palafitdomo.

11.

Vere homo kunportis donacojn al Verda Rivereto, kie troviĝis la hejmo de Cuicui. Sunsun, superreganto de kajo sendis svatiston peti de la pramisto la edziniĝon de lia nepino. La maljunulo hasteme pramveturigis la senditon kaj kune iris en sian domon. Cuicui estis senŝeliganta pizguŝojn kaj ne donis atenton al la venanto. Sed kiam la venanto elbuŝigis “gratulon, gratulon” tuj je transiro de la sojlo, io kaptis ŝian koron. Ne plu kuraĝante resti ĉe la pordo, ŝi afektis forpeli kokojn el la legoma ĝardeno kaj, svingante bambuan kanon, mallaŭte huŝadis. Ŝi kuris al la blanka pagodeto.

Post kelktempa babilado la venanto senpere transdiris la opinion de Sunsun kaj la maljunulo ne sciis, kiel respondi, nur kunfrotante siajn kalplenajn manojn konfuzite. Ŝajnis al tiu, ke tio ne vere okazus. Lia mieno kvazaŭ diris “Bone, bonege.” Fakte li eligis neniun vorton.

Post kiam la venanto finparolis, li petis la opinion de la maljunulo. Kapbalancante, tiu ridete diris:

“Estas tre bone, ke Moŝto la Unua sendas svatiston. Sed mi devas demandi, kian opinion ŝi mem havas pri tio.”

Post kiam la sendito foriris, la avo staranta sur la pruo vokis al Cuicui por malsuprenveni al la bordo por interkonsiliĝi.

Kun korbo da pizguŝoj ŝi enboatiĝis kaj demandis al Avo per dolĉa voĉo:

“Kian aferon vi havas, avĉjo?”

Nenion dirinte, li, kun la blankhara kapo iom flanken klinita, nur ridete rigardis Cuicui por longa tempo. Sidiĝinte sur la pruo, ŝi klinis sian kapon kaj senŝeligis la guŝojn, aŭskultante al ĉirpado de orioloj en bambuaro. Ŝi pensis: “Tagoj ankoraŭ multas kaj ankaŭ la vortoj de Avo.” Ŝia koro leĝere batis.

Post momento li diris:

“Cuicui, ĉu vi scias, kion la venanto celis?”

“Mi ne scias.” Tion dirinte, ŝi ruĝiĝis ĝis la kolo.

Rigardante ŝian mienon, li sciis, kion ŝi pripensas en la koro. Direktante sian rigardon al malproksimo, li viziis tra nebulo ŝian patrinon antaŭ dek kvin jaroj kaj eksentis eksterordinaran mildecon interne. Li mallaŭte parolis al si:

“Ĉiu boato havas kajon por ankriĝi kaj ĉiu birdo neston por ripozi.”

Ekpensante pri la pasintaĵoj de ŝia patrino, li eksentis obtuzan kordoloreton, sed li altrudis kontraŭvolan rideton.

Dume ŝi pensis pri multaj aferoj pro la ĉirpado de orioloj kaj kukoloj kaj pro susurado de hakfaligo de bambuoj en la valo: mordado de tigo al homo, montkantado por reciprokaj sakroj, la kvadrata fosaĵo en paperfarejo, fera fluidaĵo el fandforno en ferfarejo... Ŝajnis, ke ŝi volis remaĉi ĉion, kion ŝi aŭdis kaj vidis, por forgesi la aferon altrudititan antaŭ la okuloj. Tamen ŝi ekhavis iom da miskompreno.

Avo diris:

“Cuicui, Sunsun sendis svatiston elmeti proponon edzinigi vin kiel lian bofilinon kaj peti mian konsenton. Miaparte, mi estas maljuna kaj forpasos post du aŭ tri jaroj. Ĉu konsenti aŭ ne konsenti, tio ne koncernas min. Tio estas via propra afero. Pensu pri tio kaj faru vian decidon. Se vi volos, via edziniĝo plenumiĝos. Se ne, tio ne gravas.”

Ne sciante, kion fari, ŝi provis teni sin aplomba kaj timeme rigardis Avon. Ŝi estis tro hontema por demandi pri io kaj alio, kaj kompreneble ne facile por ŝi doni respondon.

Avo aldonis:

“Moŝto la Unua estas promesplena kaj kondutas honeste kaj donema. Vi estas bonŝanca edziniĝi al li.”

Fine ŝi venis al la kompreno, ke la svatiĝanto estas Moŝto la Unua! Ne levinte la kapon, ŝi ankoraŭ senŝeligis guŝojn, kun brue batanta koro kaj brulanta vizaĝo. Ŝi aŭtomate jetis malplenajn guŝojn en la riveron kaj rigardis ilin fordrivi senhaste kun riverakvo, sentante sin ankaŭ multe senhasta kiel tiuj guŝoj.

Vidinte ŝin resti senparola, Avo ekridetis kaj diris:

“Cuicui, ne gravas fari konsideron kelkajn tagojn. Luoyang-Ponto ne estis konstruita en sola tago, sed en multaj tagoj. Lastfoje kiam lia servisto babilis kun mi pri tio, mi jam diris al li: ‘En ŝakludo ĉaro kaj ĉevalo moviĝas laŭ sia propra regulo. Se li volas agi kiel ĉaro, do lia patro faru decidon kaj sendos svatiston por geedziĝo en serioza maniero. Se li volas agi kiel ĉevalo, do li devos stari sur la alta roko de transa bordo kaj kantadi al vi dum tri kaj duona jaroj. Se vi ŝatas la movmanieron de ĉevalo, mi kredas, ke li kantos fervorajn kantojn sub la suno kaj mildajn kantojn sub la luno ĝis li sputos sangon pro sia diskrevinta gorĝo.’”

Senparola ŝi volus plori interne, sed ne povis pro manko de motivo. Lia plua parolo direktiĝis al la morto de ŝia patrino. Post kelktempa rakontado, la maljunulo falis en silenton. Ŝi ŝtele deturnis la kapon iom flanken kaj en liaj okuloj jam pleniĝis larmoj. Ŝi surprizite kaj timeme demandis:

“Kio okazis al vi, avĉjo?”

Viŝante siajn okuloj per siaj grandaj manplatoj silente, li infanece ekridklukis, saltis sur la bordon kaj iris hejmen.

Kun malordaj pensoj en la menso ŝi volus postsekvi lin, sed ne kuraĝis.

En vetero serena post pluvo la suno bakis la homajn ŝultrojn kaj dorsojn per pli da forto. Fragmitoj kaj salikoj ĉe akvorando, kaj legomoj en la ĝardeno ĉiuj kreskis en prospero kun iom da sovaĝa vivforto. Inter herbtufoj verdaj akridoj fluge pafiĝis tien kaj alien sible per siaj flugilsvingoj. Novnaskitaj cikadoj sur banĉoj ĉirpis pli kaj pli laŭte, kvankam ne tiel oreplacē. En malhele smeraldaj bambuoj inter du montoj oriole kaj kukoloj alterne pepadis. Ŝi sentis, rigardis, aŭskultis kaj samtepe pensis: “Avĉjo jam estas sepdek-jara... Kantado dum tri kaj duona jaroj... Kiu donacis tiun blankan anason?... Bona ŝanco akiri la muelejon... Kiun la bonŝanca muelejo akiros?...”

En stuporo ŝi abrupte stariĝis, tiel ke la duonkorbo da pizguŝoj verŝiĝis en la riverakvon. Elakviginte la korbon, ŝi aŭdis la vokadon por pramiĝo sur la transa bordo.

Ĉapitro 5

12

La sekvan tagon kiam Cuicui duafoje estis pridemandita de Avo pri ŝia decido, ŝi, kun brue batanta koro, malgraŭe mallevis sian kapon kaj pinĉrompis ŝenoprazajn tigojn. Ridetante, li pensis: “Mi iom atendu. Se ni babilus plu, ŝi ruinigus ĉiujn plantaĵojn sur la parcelo.” Kaj samtempe li trovis ion bizaran en ilia babilado kaj ne plu daŭrigis ĝin. Regante siajn vortojn, li turnis sin per malsprita ŝerco al la alia afero.

Pli kaj pli varmiĝis. Proksime al junio des pli varmiĝis. La maljuna pramisto elmovis polvokovritan nigran argilan vazegon el angulo de la kabano kaj faris rondan kovrilon per kelkaj tabulpecoj dum sia senokupa tempo. Kaj plie li faris lignan tripiedon kaj skrape elfaris dikan bambuan tubon, kiun li ligis per liano kaj metis ĉe la vazego kiel ĉerpilon de te-akvo. Ekde kiam la vazego estis movita antaŭ la pordon ĉe akvorando, ĉiumatene Cuicui boligis grandan kaldronon da akvo kaj verŝis ĝin en la vazegon. Kelktempe ŝi metis iom da tefolioj kaj alitempe karbitajn rizaĵojn ankoraŭ brulantajn. La maljunulo kutime preparis herbradikojn kaj arbŝelojn kiel kuracilojn kontraŭ sunfrapo, ventrodoloro kaj haŭtveziketoj. Li metis tiujn kuracilojn en la plej okulfrapa loko de la domo. Kiam li trovis pasaĝerojn en nebona sano, li bonintence devigis ilin preni lian kuracilon kaj diris al ili la originon de tiuj kuraciloj (Li nature ellernis la preskribojn de armeaj kuracistoj en la urbeto kaj sorĉistoj.). Kun nudigitaj brakoj tuttage, li stabile staris sur la pruo. Ofte li ne portis kapveston kaj liaj mallongaj blankaj haroj arĝente brilis sub la suno. Kiel ordinare Cuicui sin tenis gaja kaj kantante kuris ĉirkaŭ la kabano. Kiam ŝi ne moviĝis, ŝi amuzis sin per blovado de bambua tubeto sub la arba ombro antaŭ la kabano. Avo ŝajne forgesis la geedziĝ-proponon de Moŝto la Unua kaj Cuicui nature ankaŭ forgesis ĝin jam frue.

Sed post nelonge la svatisto revizitis ilin por sondi, kiel ili reagis al la propono. Kiel antaŭe Avo puŝis al Cuicui la decidon, ĉu la afero plenumiĝos aŭ ne, kaj sendis lin for. Post baldaŭ li interkonsiliĝis kun Cuicui, sed produktiĝis nenia rezulto.

La maljunulo ne povis diveni, kie troviĝas la netranĉebla nodo en la afero. Nokte kiam li kuŝis sur la lito, li ofte dronis profunde en pensoj kaj ekhavis malklaran komprenon, ke Cuicui amas Moŝton la Duan, sed ne Moŝton la Unuan. Ĉe tio li ekridetis, sed li altrudis la rideton pro timo. Fakte li iom afliktiĝis, ĉar li subite sentis, ke Cuicui similas sian patriron en ĉiuj flankoj, li ekhavis malklaran senton, ke eble ili havas la saman sorton. Amaso da pasintaĵoj svarmis en lian menson. Ne plu dormiĝinte, li iris eksteren, rigardis la stelojn sidante sur la alta roko ĉe la rivero kaj aŭskultis al ĉirpado de griloj kaj aliaj insektoj. Estis longa tempo, antaŭ ol li sukcesis endormiĝi.

Tion Cuicui tute ne rimarkis. Dumtage ŝi ludis ĝojplene, laboris kaj samtempe okupiĝis pri io mistera, kio galopis en ŝia malgranda koro, sed tuj je noktigo ŝi falis en dolĉan dormon.

Tamen ĉio ŝanĝiĝis post tempdaŭro. La paca kaj trankvila vivo de tiu familio estis tute disrompita pro serio da okazaĵoj en sekvantaj tagoj.

En la familio de Sunsun, Nuosong, Moŝto la Dua, informiĝis pri la afero de Tianbao, Moŝto la Unua, kaj la plijuna frato ankaŭ malkaŝis al la pliaĝa frato tion, kio pezas sur lia koro. Okazis, ke ambaŭ ili enamiĝis al la nepino de la maljuna pramisto samtempe. Al lokanoj tio ne estis rara. Kiel

loka proverbo diris, “Fajro povas bruliĝi ĉien, akvo povas flui ĉien, la suno kaj luno povas prilumi ĉion kaj amo povas vagi ĉien.” La filo de la riĉa superreganto enamiĝis al la nepino de malriĉa pramisto, sed tio ne povis fariĝi sensacia novaĵo. Ekzistis problemo, ĉu tiuj du fratoj devus fari sangan luktadon kiel rivaloj laŭ la loka moro por decidi, kiu devas preni ŝin kiel sian edzinon.

Kompreneble la du fratoj ne povis iri al la ekstremo por fari luktadon pro amo, nek humile cedi sian amatinon al la alia, kiel poltronoj en la urbeto ridinde faris. La duopo pririgardis la novan ĵonkon de sia familio fabrikitan en boatfarejo sur la supra baseno. Apud la nova ĵonko la pliaĝa frato montris al sia frato sian korinklinemon al sia amatino kaj aldonis, ke lia amo enradikiĝis antaŭ du jaroj. Kun rideto la plijuna frato plu aŭskultis. Laŭlonge de la bordo ili iris al la nova muelejo de la vilaĝa ĝentlemano Wang. La pliaĝa frato diris:

“Fraĉjo, estas bone por vi fariĝi la bofilo de tiu ĉefkomandanto kaj havigi al vi muelejon. Dume miaparte, se la afero sukcesos, mi devos inviti la maljunan pramiston por funkciigi pramboaton. Mi ŝatas la geedziĝon. Kaj mi planas aĉeti du montojn ĉe Verda Rivereto kaj mi vaste plantos bambuojn en mia tereno, kiuj ĉirkaŭos mian regnon!”

Aŭskultante, lia frato, kun lunarko-forma falĉilo en mano, laŭvole hakis herbojn kaj arbojn apud la vojo. Kiam ili atingis la muelejon, li haltis kaj diris al sia pliaĝa frato:

“Ĉu vi kredas, ke tiu knabino jam havas amaton?”

“Mi ne kredas.”

Ili du eniris la muelejon.

La plijuna frato diris:

“Vi ne devas... fraĉjo, mi donu al vi alian demandon. Se mi ne volos gajni ĉi tiun muelejon, sed intencas havigi al mi tiun pramboaton jam de du jaroj, ĉu vi kredas tion?”

Aŭdinte tion, la Unuan trafis surpriziĝo. Ĵetinte ekrigardon al Nuosong, la Dua, sidanta sur la transversa aksostango, li sciis, ke li ŝerce diris tion. Iom alirinte al li, li frapetis lian ŝultron kaj volis tiri lin de la stango. Kompreninte la aferon, li ekridetis. Li diris:

“Mi kredas, ke vi diris la veron!”

Rigardante al la Unua, la Dua honeste diris:

“Kredu min, fraĉjo. Tio estas vera. Mi jam frue ekhavis tian ideon. Se ŝi kaj ŝia avo konsentos, malgraŭ malkonsento de nia familio, mi jam pretas alproprigi tiun pramboaton! Kaj kio estas via intenco?”

“La patro jam akceptis mian ideon. Li sendis peti edziniĝon de la nepino de la pramisto por mi!”

Kiam la Unua menciis la peton, ŝajnis al li, ke la Dua volis moki lin, kaj li eksplikis, kial sendi svatiston. Ĉar la maljuna pramisto proponis du vojojn: la vojo de ĉaro kaj tiu de ĉevalo en ŝakludo. Do mi elektis la vojon de ĉaro. Tio estas sendi svatiston por proponi la amligon al ŝi.

“Kio estas la rezulto?”

“Nenia klara rezulto. Ĉar la maljunulo havas oston en la gorĝo kaj ne povas diri klare.”

“Se vi prenas la vojon de ĉevalo?”

“La maljunulo diris, ke se li elektos preni la vojon de ĉevalo, mi devos stari sur la alta roko trans la bordo kaj kantadi dum tri kaj duona jaroj. Se mia kantado kortuŝos Cuicui, ŝi fariĝos mia edzino.”

“Tio ne estas malbona ideo!”

“Jes ja. Balbutulo ne povas bone paroli, sed li povas bele kanti. Sed tio kaptas min, ĉar mi estas birdo plektitaj per bambuaj lamenoj, sed ne kantema birdo. Diablo scias, ĉu li edzinigos sian nepinon al kantema akvomuelilo aŭ al inda viro!”

“Kion vi faros pri tio?”

“Mi volas postuli al la maljunulo, ke li donu la definitivon respondon. Veran respondon. Se mi ne sukcesos, mi malsupreniros per ĵonko al Taoyuan. Se mi sukcesos kaj eĉ li volos, ke mi zorgu pri la pramboato, ankaŭ mi konsentos.”

“Kaj kanti?”

“Vi estas lertulo en kantado, la Dua. Se vi volos kanti kiel birdo, agu laŭ via plaĉo. Mi ne ŝtopus vian buŝon per ĉevalaj fekaĵoj.”

Vidinte tian mienon de sia frato, la Dua eksciis, kiom da ĉagreno lia pliaĝa frato spertas pro la afero. Li konas lian temperamenton, kiu reprezentas krudan malkaŝemon de la lokanoj de Chadong. Tiu povas grandanime fari ĉion el la koro por tiu, kiun li ŝatas, kaj por tiu, kiun li subtaksas, li povas seriozmiene disputi kun tiu, eĉ se tiu estas lia propra patrinflanka onklo. Kompreneble la Unua volis preni la vojon de ĉevalo, kiam li fiaskis sur la vojo de ĉaro. Sed kiam li aŭdis la malkaŝeman rimarkon de sia frato, li eksciis, ke nur la Dua estas kvalifikita preni la vojon de ĉevalo, kaj li mem estas nenio kompare kun la Dua. Pro tio li sentis iom da kolero kaj indigno nekaŝeblaj.

La Dua elpensis ideon, ke ili ambaŭ iros al Verda Rivereto kaj kantos en luna nokto. Sen alies scio, kiu estas kiu, ili alterne kantos. Kiu gajnos la respondon la unua, tiu povos daŭrigi per siaj lipoj, kiuj jam venkis super tiuj de la alia, servadon al la nepino de la maljuna pramisto. La Unua ne lertis en kantado. Kiam lia vico venis, la Dua kantis anstataŭ li. Estis tre juste, ke ili ambaŭ decidis sian feliĉon depende de sia ŝanco. Kiam la propono estis elmetita, la Unua ne volis, ke la Dua kantos anstataŭ li, kvankam li ne povoscias kanti. Sed la Dua, romantika kiel poeto, obstine volis sian fraton praktiki tiun metodon. Li insistis, ke ĉio estos iom justa, se nur ili faros tion.

Konsiderinte tiun ideon de sia frato, la Unua faris amaran rideton.

“Diable! Mi ne estas kantema birdo, sed mi eĉ volas mian fraton anstataŭ min kiel kanteman birdon! Bone, ni agu tiamaniere. Ni alterne kantos. Kaj mi ne volas, ke vi helpas min. Mi mem faros tion. Strigo en arbaro, kvankam ĝi ne havas oreplaĉan voĉon, ankoraŭ kantas plue por akiri sian edzinon, ne petante alies helpon!”

Farinte la decidon, ili kalkulis la tagojn: hodiaŭ estas la dekkvara, morgaŭ la dekkvina kaj postmorgaŭ la deksesaj kaj postaj sinsekvaj tri tagoj estas lunplenaj. Jam mezsomeriĝis. Estis nek varme nek malvarme. Vestite en blanka veŝto, ili grimpis sur altan rokon prilumitan de la luno kaj laŭ la loka kutimo honeste kaj serene kantadis por tiu flavbelulino. Kun rosoj falintaj, ili raŭkiĝis pro kantado kaj rapidis hejmen sub la malkreskanta luno aŭ iris al tiuj konataj muelejoj funkciaj tagnokte por dormeti en varma grentenejo ĝis tagiĝo. Ĉio estis nature aranĝita. Kvankam ili ambaŭ ne tre sciis, kio estos la rezulto, ili prenis tion tre nature. Do ili decidis, ke ekde tiu nokto ili daŭrigu la konkurson agnoskitan de la loka kutimo.

13

Vesperkrepuskiĝis. Sidante ĉe la piedo de la blanka pagodeto malantaŭ la kabano, Cuicui rigardis la maldensajn nubojn ruĝetajn bakitajn de la subira suno sur la ĉielo. La dekkvara de la lunmonato okazis bazartago de Zhongzhai. Multaj komercistoj en la urbeto iris tien aĉeti

produktaĵojn de la monto. Ankaŭ multis la veturantoj de pramboato kaj Avo senripoze okupiĝis pri ir-reira veturado de la pramboato. Proksime al vesperiĝo birdoj ŝajne ripozis, sed nur kukoloj ĉirpadis senhalte. Ŝtonoj, grundo, herboj kaj arboj, kiuj estis bakitaj de la suno dumtage, tiam elspiris varmon. En la aero ŝvebis odoroj de grundo, herboj, arboj kaj insektoj. Rigardante la ruĝajn nubojn sur la ĉielo kaj aŭskultante malordajn voĉojn de la komercistoj ĉe la pramejo, Cuicui sentis ioman tristecon en la koro.

La vespero estis milda, bela kaj kvieta kiel kutime. Se oni spertis ĉion antaŭ la okuloj, delikata tristeco same ilin kaptis en la vespero. Do tia tago fariĝis suferiga. Ŝajnis al Cuicui, ke io mankis. Vidinte la tagon forpasi, ŝi volis alkroĉiĝi al nova afero, sed vane, ĉar ŝi ne povis elporti tian banalan vivon.

“Mi volus veturi per ĵonko malsupren al Taoyuan-gubernio kaj pluen al Dongting-Lago, por ke la avo serĉu min tra la tuta urbeto, batante gongon kaj kun torĉo en la mano.”

Ŝi ŝajne afektis koleri kontraŭ Avo kaj senbride vagigis sian penson pri tiu neebila afero. Ŝi eĉ imagis, kiel Avo, post ŝia foriro, vane serĉadas ŝin ĉie, kaj kiel li senhelpe kuŝas sur la pramboato poste.

Pasaĝeroj kriadas:

“Transigu nin, transigu nin, maljuna oĉjo. Kial vi ne donas atenton al ni!”

“Kial ne! Cuicui foriris malsupren al Taoyuan-gubernio!”

“Kion fari do?”

“Kion fari? Prenu tranĉilon, metu ĝin en pakajon kaj veturu per malsuprenira boato por mortigi ŝin!”...

Kvazaŭ ŝi vere aŭskultus tian dialogon, Cuicui timiĝis. Akutvoĉe vokadante sian avon, ŝi kuris de la altaĵo al la pramejo. Kiam ŝi vidis lin kablitori la boaton en la mezon de la rivereto kaj aŭdis pasaĝerojn ĝoje babili en la boato, ŝia koreto ankoraŭ brue batis.

“Avĉjo, avĉjo, tiru la boaton returnen!”

Ne komprenante, kion ŝi celas, li supozis, ke ŝi volas anstataŭi lin. Li respondis:

“Momenton, Cuicui, mi tuj reiros!”

“Ĉu vi ne tiros ĝin returnen?”

“Mi tuj reiros!”

Sidante ĉe la bordo, ŝi rigardis ĉion vualitan de la krepusko sur la rivereto. Vidinte, ke unu el la pasaĝeroj bruligis fajrilon por fumi kaj frapetis la pipon kontraŭ la boatrandon por faligi tabakcindron, ŝi subite ekploris.

Kiam Avo albordigis la boaton, li vidis ŝin stulte sidanta ĉe la bordo. Li demandis, kio okazis al ŝi, sed ŝi ne donis respondon. Li urĝis ŝin reiri hejmen por prepari manĝon. Pensante dum kelka tempo, ŝi trovis sian ploron tre ridinda. Ŝi sola reiris al la kabano kaj faris fajron en peĉnigra forno. Poste ŝi suriris la altan rokon antaŭ la kabano kaj revokis sian avon al la hejmo. Sed li, kiel devkonscia pramisto, ne volis surbordiĝi, ĉar li sciis, ke tiuj pasaĝeroj haste reiras al la urbeto por vespermanĝo kaj li ne devas lasi ilin vane atendi sur la bordo, eĉ unu pasaĝeron. Starante sur la pruo, li diris al ŝi, ke li reiros hejmen por manĝo post ol veturigi la lastan homon trans la rivereton.

Ŝi duafoje petis sian avon, sed li ignoris ŝin. Sidante sur la roko, ŝi sentis grandan ĉagrenon.

Noktiĝis. Granda lampiro fulme flugis preter Cuicui, kun vosto blue brilanta. Ŝi pensis: “Mi vidu, kiel malproksimen vi povas flugi.” Kaj ŝiaj okuloj sekvis la brilon de la insekto. Tiam kukolo denove ekkukuis.

“Kial vi ne suprevenas, avĉjo? Mi volas vin!”

Aŭdinte ŝian koketan voĉon kun iom da plendemo, li respondis per kruda tono:

“Mi tuj aliros, Cuicui!”

Kaj samtempe li parolis al si: “Se via avo forpasos, Cuicui, kion vi faros estonte?”

Enirinte, li nur vidis fajrolumon en la kuirejo en malluma kabano, kaj ŝi kovris siajn okulojn per la manoj, sidante sur malalta benko ĉe la forno.

Alirinte al ŝi, li trovis, ke ŝi jam ploras longatempe. Dum la tuta posttagmezo li tiradis la boaton per fortostreĉo kun kurbigita dorso kaj eksentis moliĝon kaj doloron je manoj kaj talio. Kiel kutime, tuj kiam li revenis hejmen, li devus flari la bonodoron de melonpecoj kaj legomoj kuiritaj en kaserolo kaj vidi ŝian figuron kurantan tien kaj ĉi tien por aranĝi vespermanĝon en lamplumo. Tamen tiutaga situacio iom malsamis.

Li diris:

“Cuicui, vi ploras pro mia malfrueco. Ĉu tio decas? Se mi mortus?”

Ŝi tenis sin senparola.

Li aldonis:

“Ne ploru. Kiel plenkreskulo, ne ploru, kion ajn malfavoran vi renkontas. Estu kuraĝa kaj firma, tiel ke vi indas vivi plu en la mondo!”

Demovinte siajn manojn el la okuloj, ŝi alpremis sin al la avo, dirante:

“Mi ne ploras plu.”

Dum manĝado li rakontis al ŝi kelkajn interesajn historietojn, en kiuj li menciis ŝian patrinon. En la lumo de olelampo ili prenis la manĝon. Pro laceco de laborado la maljuna pramisto trinkis duonbovlon da alkoholaĵo, kio bonhumorigis lin. Kaj li suriris la altan rokon kune kun ŝi kaj rakontis al ŝi historietojn sub la lunlumo. Vere ŝin ravis tiuj historietoj pri la malmola karaktero de ŝia kompatinda patrino.

Brakumante siajn genuojn kaj alpremante sin al sia avo sub la lunlumo, ŝi petis de li multajn informojn pri sia kompatinda patrino. Intertempe ŝi eligis elspiron, kvazaŭ io pezus sur ŝia koro. Por formovi tiaĵon ŝi eligis la elspiron, sed ne sukcesis ĝin ekmovi.

La luno disverŝis sian arĝentan lumon ĉien, sed la bambuaj tufoj sur la monto aspektis nigraj. Inter herboj apud ili ĉirpado de insektoj aŭdiĝis tie kaj tie. Okaze oriolo oni ne sciis de kie eligis trilojn, kaj post momento ĝi ŝajne sensis la meznokton kaj siajn nedecajn trilojn, kaj denove endormiĝis kun fermitaj okuletoj.

Bonhumore li daŭrigis sian rakontadon. Li menciis, ke la moro de kantado en la urbeto fame furoris en limregionoj de Siĉŭano kaj Guiĝoŭo antaŭ dudek jaroj, kaj ankaŭ ŝia patro estis la plej bona kantanto, kiu povis utiligi diversajn metaforojn por prezenti la senton de amo kaj malamo. Li rakontis, kiel ŝia patrino ŝatis kantadon kaj antaŭ ol ili konatiĝis, antifone kantis kun ŝia patro, kiam unu el ili hakfaligis bambuojn sur monttalio kaj la alia tiradis boaton sur la rivereto.

Ŝi demandis:

“Kaj poste?”

Li respondis:

“Tio estas longa rakonto. La grava afero en tio estas, ke vi naskiĝis pro tia kantado.”

Ĉapitro 6

14

La maljunna pramisto endormiĝis pro laceco kaj Cuicui ankaŭ falis en dormon pro laciga plorado. Ŝi ne povis forgesi, kion la avo rakontis. En sonĝo ŝia animo ekflosas en bela kantvoĉo, kvazaŭ leĝere ŝvebus tien kaj ĉi tien. Ŝi supreniras la blankan pagodeton, eniras la legoman ĝardenon, enboatiĝas kaj ree pafiĝas ĉirkaŭ la mezo de apika rokklifoj... kion ŝi volas fari do? Pluki saksifragon! Dumtage kiam ŝi tiradas la boaton, ŝi kutime kaplevite rigardas tiun grasan saksifragon sur la rokklifoj alta je tridek al kvindek futoj. En ordinaraj tagoj ŝi ne povas pluki ĝin, sed nunmomente ŝi povas elekti ĝian plej grandan folion kiel ombrelon.

Ĉio okazis, kiel la avo rakontis. Cuicui konfuzkape kuŝis sur la pajlolito kun kontraŭmoskita vualo el kruda knaba tolo, sentante, ke la sonĝo estas la plej bela kaj plej dolĉa. Dume la avo kuŝis sur la lito maldorme, streĉante siajn orelojn por aŭskulti al la kantanto sur la alta roko trans la rivereto tra la tua nokto. Li sciis, kiu estas la kantanto. Li sciis, ke tio estas la unua movo de ŝaka ĉevalo de Tianbao, Moŝto la Unua, el la apudrivera strato. Li aŭskultadis ĉagreniĝe kaj ĝoje. Pro laceco de dumtaga plorado, Cuicui profunde dormis. Li ne vekis ŝin.

Ĉe tagiĝo de la sekva tago, ŝi kaj ŝia avo ellitiĝis. Ŝi lavis sian vizaĝon per riveretakvo por forigi la tabuon, ke oni ne devas rakonti sian sonĝon matene. Kaj tuj poste ŝi iris al la avo kaj rakontis sian lastnoktan sonĝon.

“Avĉjo, vi parolis pri kantado hieraŭ. En sonĝo mi vere aŭdis la plej orelpaĉan kantadon, molan kaj melodian. Mi ŝajne sekvis tiun kanton kaj flugis ĉien. Mi flugis al la monttalo trans la bordo kaj plukis grandan faskon da saksifragoj kaj donis ĝin al mi ne scias kiu. Mi dormis tre bone. La sonĝo estas vere interesa!”

La avo ridetis milde kaj simpatie, sed li ne diris al ŝi la aferon, kiu vere okazis dumnokte.

Li pensis: “Estas pli bone sonĝi la tutan vivon. Estas iuj homoj, kiuj eĉ sonĝas, ke ili oficas kiel ĉefministro aŭ akiris ĝuangjŭan-on¹⁴.”

Supozante, ke tiu, kiu kantis lastnokte, estas Tianbao, Moŝto la Unua, la avo ordonis al Cuicui zorgi pri la pramboato, kaj pretekstis sendadon de drogherboj al la urbeto por informiĝi pri la kantanto. Vidinte Moŝton la Unuan en apudrivera strato, li ekkaptis la junulon kaj ĝoje diris:

“Moŝto la Unua, vi ne nur prenas la vojon de ĉaro, sed ankaŭ tiun de ĉevalo. Kia ruzulo vi estas!”

Tamen la maljunulo fuŝis la aferon. Li prenis tiun, kiu kantis lastnokte, por Moŝto la Unua. Lastnokte la du fratoj iris kune al Verda Rivereto. Ĉar la pliaĝa frato havis la avantaĝon sendi svatiston al la maljunulo, li neniel volis kanti kaj li devigis sian fraton kanti la unua. Post kiam la plijuna frato ekkantis, li ne kuraĝis malfermi sian buŝon, ĉar li sciis, ke li ne povas rivali kontraŭ li. La kantvoĉo, kiun la avo kaj lia nepino aŭdis, tute eliĝis el la buŝo de Nuosong, Moŝto la Dua. Kiam la Unua akompanis sian fraton hejmen, li jam decidis foriri de Chadong kaj veturigi laŭflue la nove lakitan ŝonkon de la familio por forgesi ĉion ĉi tion. Tiam li pretis iri al la bordo kaj rigardi ŝarĝadon al la nova ŝonko. Vidinte lian flegman mienon, la maljunulo ne komprenis, kion li volas

¹⁴ Ĝuangjŭan-o: titolo ricevita de tiu, kiu gajnis la unuan lokon en la plej alta imperia ekzameno.

esprimi. Li do faris okulumon al li ridinde, ke tiu afektas flegmon kaj ke li volas doni al li mesaĝon.

Donante frapeton al li, la maljunulo mallaŭte diris:

“Vi kantis tre bone. Iu askŭltis al vi en la sonĝo. Via kantvoĉo kunportis ŝin malproksimen, tre longan vojon! Vi estas la plej bona kantanto en nia loko.”

Rigardante al la petolema vizaĝo de la maljunulo, Moŝto la Unua softe diris:

“Lasu! Donu vian trezoran knabinon al la kantbirdo.”

Tiuj vortoj konfuzis la maljunulon. Moŝto la Unua iris laŭ la pasejo inter palafitdomoj al la bordo kaj lin sekvis la maljuna pramisto. Kiam ili atingis la kajon, tiu nova ĵonko estis ŝargata. Multaj vazoj de oleo kuŝis sur la bordo. Boatano estis plektanta pajlajn ŝnurojn por fari kontaŭndan ŝirmaĵon uzotan sur ĵonkorando, kaj iu alia estis ŝmiranta remiltabulojn per sebo. La maljunulo demandis al la ŝnurfaranto en sunlumo, kiam la ĵonko ekiros malsupren kaj kiu eskortos ĝin. La demandato montris Moŝton la Unuan. Kunfrotante siajn manojn, la maljunulo diris:

“Aŭskultu, Moŝto la Unua. Mi diru al vi serioze, ke vi ne pravas laŭ movado de ŝaka ĉaro, sed se vi prenos la vojon de ŝaka ĉevalo, vi eble sukcesos!”

Montrante la fenestron, li diris al la maljunulo:

“Vidu tien, avĉjo. Vi volas la kantbirdon kiel via bonepon. Li estas tie!”

Levinte la kapon, la maljunulo vidis, ke Moŝto la Dua estas ordiganta fiŝreton ĉe la fenestro.

Kiam li revenis al la pramboato ĉe Verda Rivereto, Cuicui demandis al li:

“Avĉjo, kun kiu vi kverelis? Kiel pala vi aspektas!”

Li ekridetis. Tamen li diris neniun vorton al ŝi pri la afero okazinta en la urbeto.

15

Per la nove lakita ĵonko, Moŝto la Unua veturis malsupren laŭflue, forlasinte sian fraton Nuosong en la hejmo. La maljunulo pensis, ke lastfoje Moŝto la Dua estis la kantanto kaj certe oni povos aŭdi lian kantvoĉon en postaj tagoj. Tuj kiam noktiĝis, li intence turnis la paroltemon kaj sugestis al Cuicui aŭskulti al la nokta kantado. Post vespermanĝo ili sidis hejme. Pro tio, ke la kabano estis proksima al la rivereto, moskitoj zumadis tuj ĉe vesperiĝo. Cuicui bruligis plektaĵon el artemizioj kaj svingis ĝin ĉe anguloj de la ĉambro por forpeli moskitojn. Post kelka tempo kiam ŝi konsideris, ke la fumo de artemizioj jam plene saturis la aeron, ŝi metis la fumantan plektaĵon sur la teron antaŭ la lito kaj sidiĝis sur la tabureton por aŭskulti al sia avo. Kiam li rakontis historietojn, li sagace deturnis la temon al kantado. Poste li demandis al ŝi:

“Cuicui, la kanto en via sonĝo povus igi vin surgrimpi altan rokklifon por pluki saksifragojn. Se iu vere venos al alta rokklifo kaj kantos tie por vi, kion vi faros?” Li diris tiujn vortojn kiel ŝercon.

Ŝi ankaŭ ŝerce respondis:

“Se iu kantos, mi aŭskultos. Kiom longe li kantos, mi aŭskultos tiom longe!”

“Tiom longe kiom tri kaj duona jaroj?”

“Se lia kantado estos orelplaĉa, mi aŭskultos por tri kaj duona jaroj.”

“Tio ne estas justa.”

“Kial ne justa? Ĉar li kantos por mi, ĉu li ne volos, ke mi aŭskultos al li dum longa tempo?”

“Oni diras, ke legompladoj bezonas gustumantojn kaj kantado aŭskultantojn. Lia kantado celas, ke vi komprenas lian intencon!”

“Komprenas lian intencon, avĉjo?”

“Nature li intencas elverŝi sian koron al vi! Se vi ne komprenus tion, ĉu estus same aŭskulti al kantanta birdo?”

“Kion do, se mi komprenas lian koron?”

Peze pugnobatante sian femuron, li ridete diris:

“Cuicui, vi estas saĝa, kaj mi stulta. Ne koleru kontraŭ mi pro miaj krudaj vortoj. Mi parolas senpripense. Nun mi diru kelkajn ŝercajn vortojn kaj vi aŭskultos ilin kiel ŝercon. Mi jam menciis la aferon, ke Tianbao, Moŝoto la Unua, sendis svatiston peti vian edziniĝon. Tamen mi legis vian mienon, ke vi ne volantas, ĉu? Sed se lia frato kantas al vi por peti vian manon, kiel vi opinias?”

Surprizite, ŝi mallevis sian kapon, ĉar ŝi ne komprenis, kiel vera la ŝerco estas, nek certis, kiu fabrikis tiun ŝercon.

Avo demandis:

“Diru al mi, kiun el ili du vi preferas.”

Kun rideto ŝi mallaŭte diris per la tono kun iom da petemo:

“Ne babilaĉu pri la ŝerco, avĉjo.”

Ŝi stariĝis.

“Se tio estas la vero?”

“Avĉjo, vi vere estas...”

Dirinte tion, ŝi pretis eliri.

“Mi ŝerce diris, ĉu vi koleras kontraŭ mi?” li diris.

Ŝi ne kuraĝis koleri kontraŭ li. Alirinte al la sojlo, ŝi ŝanĝis la paroltemon:

“Rigardu al la luno sur la ĉielo. Kiel granda ĝi estas!”

Dirante, ŝi trapasis la sojlon kaj sin banis en delikata lunlumo. Post momento ankaŭ Avo eldomiĝis. Ŝi sidiĝis sur la rokon, kiun la arda suno bakis dumtage kaj kiu nun ankoraŭ ellasis varmon restantan. Avo diris:

“Cuicui, ne sidu sur la varma roko. Tio kaŭzos al vi furunkojn sur la postaĵo.”

Sed palpinte la rokon, li ankaŭ sidiĝis sur ĝin.

La luno elverŝis tre mildan lumon kaj maldensa blanka nebulo flosis sur la rivereto. Tiutempe se iu kantus sur transa bordo kaj iu antifone respondus sur cisa bordo, estus tre bele. Ŝi ankoraŭ ludis en la memoro la ŝercon de li ĵus diritan. La avo ne estis surda kaj li tre klare diris tiujn vortojn. Unu el la du fratroj kantas en tia nokto, kion li volas fari? Ŝi ŝajne atendis la kantvoĉon kaj tenis sin silenta longatempe.

Sidante sub la luno, ŝi ja volis aŭskulti al kantado. Sur la transa bordo aŭdiĝis nenia voĉo krom ĉirpa refrenoj de insektoj en herboj. Enirinte la kabanon, ŝi palpe elprenis la bambuan tubeton kaj blovis ĝin en lunlumo. Trovinte, ke ŝi ne bone ludis ĝin, ŝi enmanigis ĝin al la avo por ludado. La maljunulo, alpremite ĝin al la buŝo vertikale, ludis ĝin per longa ario, kiu moligis ŝian koron.

Sidante alpreme al li, ŝi demandis:

“Kiu estis la unua, kiu elfaris tian tubeton, avĉjo?”

“Certe estis la plej gaja homo, ĉar li donis multe da ĝojo al aliaj. Sed ŝajne estis la plej malgaja homo, kiu elfaris ĝin, ĉar li samatempe malĝojigis aliajn.”

“Ĉu vi ne ĝojas, avĉjo? Ĉu vi koleras kontraŭ mi?”

“Mi ne koleras. Se vi estas ĉe mi, mi sentas grandan ĝojon.”

“Se mi forkuros?”

“Vi ne forlasos vian avon.”

“Se vere okazos tia afero, kion vi faros, avĉjo?”

“Se tiel, mi veturigos ĉi tiun pramboaton por serĉi vin.”

Ŝi eligis siblan rideton.

“Rapidfluejoj Fengtan, Citan ne danĝeraj estas,

Minacas des pli Kirlejo Raojilong ja ekzistas.

Malfacile oni forlasas Kirlejon tra ondluloj,

Atendas ilin Rapidfluo Qinglang ja kun huloj.

Ĉu vi iam diris, ke la akvo de tiuj lokoj furiozas kiel frenezulo?”

“Tiakaze mi vere agos frenezule, Cuicui, ĉu mi timos tiajn grandajn ondojn de tiuj lokoj?” la avo respondis.

Serioze pripensante tion, ŝi diris:

“Mi certe ne foriros, avĉjo. Sed ĉu vi foriros? Ĉu vi estos perforte forkaptita aliloken?”

Silenta li ekpensis pri tiaj aferoj, kiaj forkaptado de la morto.

Meditante pri la situacio post kiam li estos forkaptita de la morto, li stupore rigardis la stelon en la sudo sur la ĉielo. Li pensis: “En julio kaj aŭgusto forpasas falsteloj sur la ĉielo. Ĉu homoj povas morti en julio aŭ aŭgusto?” Li ankaŭ pensis pri la interparolo kun Moŝto la Unua en la apudrivera strato, pri la muelejo kiel doto donota de la ĉefkomandanto de Zhongzhai-vilaĝo, pri Moŝto la Dua kaj pri amaso da aliaj aferoj. Li sentis iom da konfuziteco en la menso.

Subite Cuicui diris:

“Avĉjo, kantu kanton al mi, ĉu bone?”

Li kantadis dek kantojn. Apogante sin al li, ŝi aŭskultis kun fermitaj okuloj. Kiam Avo ĉesis kanti, ŝi parolis al si:

“Mi plukis alian faskon da saksifragoj.”

La kantoj, kiujn la avo kantis, estis aŭskultitaj de li tiun nokton.

16

Moŝto la Dua havis ŝancojn kanti, sed li ekde tiam ne venis al Verda Rivereto por kantado. Du tagoj pasis, kaj en la tria tago la maljunulo ne plu povis regi sin. Li iris al la apudrivera strato en la urbeto serĉi la junulon. Ĉe la enirejo de la strato, li renkontis la svatanton, Grumo Yang, kiu volis eliri el la urbeto, kondukante mulon. Vidinte la maljunan pramiston, li kaptis lin, dirante:

“Oĉjo, mi havas informon por diri al vi. Hazarde vi alvenas!”

“Kio?”

“Tianbao, Moŝton la Unuan trafis io malfeliĉa ĉe Rapidfluejo Citan, kiam li veturis malsupren laŭflue. Li falis en kirlakvon tie kaj dronis. Matene Sunsun ricevis la mesaĝon kaj onidire Moŝto la Dua rapidis tien.

La informo vangofrape peze batis lin. Li ne kredis, ke la informo estas vera. Tamen li ŝajnis sin aplomba kaj diris:

“Ĉu Moŝto la Unua dronis? Mi neniam aŭdis, ke la anaso dronas en la akvo.”

“Sed la anaso vere dronis...Mi aprobas vian malproksimvidan opinion ne permesi lian svatiĝon al via nepino.”

Laŭ vortoj de Yang, la maljunulo dubis la verecon de la informo, sed laŭ lia mieno li kredis, ke tio estas vera. Li triste diris:

“Kia malproksimvida opinio? Tio estas providenco! Ĉio okazas laŭ la providenco...”

Kiam li diris tiujn vortojn, lia koro pleniĝis de emocioj.

Disiĝinte de Yang, la maljunulo hastis al la apudrivera strato por pruvi la fidecon de lia informo. Antaŭ la pordo de Sunsun oni bruligis paperoferaĵojn por la mortinto kaj aliaj babilis en aro apude. Alirinte al ili, li aŭdis ilin babilon pri la afero menciitan de Yang, sed kiam ili vidis lin malantaŭ si, ili ŝanĝis la paroltemon kaj intence babilis pri la olea prezo en la malsupra baseno. La maljunulo sentis sin maltrankvila kaj volis demandi al boatano, kun kiu li estis familiara.

Kelkan tempon poste Sunsun revenis kun serioza mieno. Tuj kiam la grandanima kaj justama mezaĝulo, kiu ŝajne penis elturniĝi el la malfeliĉa afero, vidis la maljunulon, li diris:

“Maljuna oĉjo, ni nuligu la aferon inter ni. Tianbao jam dronis, ĉu vi jam sciiĝis pri tio?”

Kunfrotante la manojn, la maljunulo diris, kun ruĝiĝintaj okuloj:

“Aĥ, tio estas vera! Ĉu tio okazis hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ?”

La alia, kiu ŝajnis hastis returnen por kunporti novaĵon, intermetis:

“Je tagmezon de la deksesaj. Nia ĵonko grundiĝis sur ŝtonego kaj la akvo entrudiĝis en la pruo. Moŝto la Unua volis deteni la ĵonkon de la ŝtonego per hokstango kaj li estis elĵetita en la akvon.”

“Ĉu vi vidis lin fali en la akvon propraokule?” demandis la maljunulo.

“Ankaŭ mi falis en la akvon kune kun li!”

“Kion li diris?”

“Ne tempon li havis por diri ion. Li nenion diris dum la tuta veturado.”

Ekskuinte la kapon, la maljunulo ŝtele ĵetis rigardon al Sunsun. Sciinte, kio pezas sur lia koro, Sunsun diris:

“Oĉjo, ĉio dependas de la Ĉielo. Lasu do. Ĉe mi estas bona alkoholaĵo alportita de Daxingchang. Kunportu iom hejmen.”

Lia servisto alportis bambuan tubon da alkoholaĵo, kun aleŭrita folio kovranta la aperturon de la tubo, kaj enmanigis ĝin al la maljunulo.

Tenante tubon de vino en la mano, li, kun klinita kapo, iris tra la straton al la kajo, kie Tianbao enĵonkiĝis antaŭ tri tagoj, por pririgardi. Tie la mulo de Grumo Yang ruliĝadis sur sabloj, dum li mem refreŝigis sin sub la salika ombro. La maljunulo aliris al li kaj invitis lin gustumi la alkoholaĵon de Daxingchang. Post iom da drinkado ilia humuro ŝajne pliboniĝis. La maljuna pramisto diris al Yang, ke Moŝto la Dua iris al Verda Rivereto kaj kantadis tie dum la nokto de la dekkvara de la monato.

Aŭdinte tion, Yang diris:

“Oĉjo, ĉu vi konsideras, ke, se Cuicui ŝatas Moŝton la Duan, li devos edzinigi ŝin...”

Antaŭ ol li finis sian parolon, Nuosong, Moŝto la Dua malsuprenvenis de la strato. La junulo aspektis preta fari longan vojaĝon kaj je ekvido de la maljuna pramisto, li turnis sin kaj volis foriri. Yang vokis al li:

“Moŝto la Dua, venu! Ni havas vorton por diri al vi!”

Tiu haltis kaj malbonhumore demandis al Yang, kian vorton li havas. Ekrigardis la maljunan pramiston, Yang diris:

“Venu! Mi havas vorton por diri al vi!”

“Kia vorto?”

“Mi aŭdis, ke vi jam foriris... Alvenu kaj mi diros al vi. Mi ne forglutus vin!”

Nuosong, kiu plenis je vigleco, kun bruna vizaĝo kaj larĝaj ŝultroj, altrudis rideton. Kiam li eniris la ombron de saliko, la maljuna pramisto, por moderigi la atmosferon, diris, montrante la novan muelejon malproksiman en supra baseno:

“Moŝto la Dua, mi aŭdis, ke tiu muelejo estos via. Se vi estos ĝia mastro, ĉu vi volus, ke mi gardu ĝin?”

Moŝto la Dua ŝajne ne komprenis la intencon de lia demando kaj li tenis sin senparola. Vidinte, ke ili ambaŭ sin trovas en embaraso, Yang diris:

“Kion vi faros, Moŝto la Dua? Ĉu vi volas veturi malsupren laŭflue?”

Kapjesinte, la junulo diris nenion kaj foriris.

Suferinte lian flegmon, la maljunulo malĝoje reiris al Verda Rivereto. Kiam li suriris la pramboaton, li afektis preni tion malserioze kaj diris al Cuicui:

“Cuicui, io sensacia okazis en la urbeto. Tianbao, Moŝto la Unua, veturis per ŝonko entenanta oleon al Chenzhou kaj malbonŝance falis en akvon kaj dronis ĉe Rapidfluejo Citan.”

Al tiu informo ŝi tute ne donis atenton komence, ĉar ŝi ne kaptis ĝian sencon. Li daŭrigis:

“Cuicui, tio estas vera. Lastfoje Grumo Yang, la svatanto, kiu vizitis nin, diris, ke mi estas tre malproksimvida, ĉar mi ne permesis vian edziniĝon al Moŝto la Unua.”

Ĵetinte straban ekrigardon al li, ŝi vidis liajn ruĝajn okulojn kaj certis, ke li jam drinkis. Kaj krome ŝi sciis, ke li havas malĝojan mienon certe pro io pezanta sur la koro. Ŝi pensis: “Kiu kolerigis vin?” Kiam la pramboato alboridiĝis, Avo, kun nenatura rideto, iris al la kabano. Ŝi gardis la boaton kaj ne aŭdis lian voĉon dum longa tempo. Kiam fine ŝi rapidis al la hejmo por pririgardi, Avo estis plektanta rimenetojn de pajlaj sandaloj, sidante sur la sojlo.

Vidinte lian strangan mienon, ŝi kaŭriĝis ĉe li.

“Kio estas al vi, avĉjo?”

“Tianbao vere mortis! Moŝto la Dua koleras kontraŭ ni. Li konsideras, ke ni kaŭzis la okazintaĵon de lia familio!”

Iu kriis por pramiĝo kaj Avo hastis elen. Sidante sur pajloj ĉe angulo de la kabano, ŝi sentis sin konfuzita. Ŝi atendis kaj atendadis, sed Avo ankoraŭ ne revenis. Ŝi ekploris.

Ĉapitro 7

17

Ŝajnis, ke Avo kovis koleron kontraŭ iu. Malpliigis la rideto sur lia vizaĝo kaj ankaŭ lia zorgemo al Cuicui. Ŝi ŝajne rimarkis, ke ŝia avo jam ne montris tiom da amemo al ŝi kiom antaŭe, sed ŝi ne komprenis kial. Tamen tio estis nur efemera. Kun paso de tempo ĉio pliboniĝos. Ili ambaŭ ankoraŭ okupiĝis pri pramigo kiel kutime. Nur ili ekhavis malsamajn konceptojn pri la vivo, kvazaŭ estiĝus breĉo inter ili, neniel plenigebla. Kiam Avo iris al la apudrivera strato, li ankoraŭ ricevis bonan traktadon de Sunsun, la superreganto de la kajo, sed evidente tiu ne forgesis la kaŭzon de la morto de sia filo. Moŝto la Dua kovris ses cent liojn de Beihe al Chenzhou por serĉi la kadavron de sia frato laŭlonge de la bordo, sed vane. Li vole nevole gluis afiŝojn pri serĉado ĉe diversaj doganejoj kaj revenis al Chadong. Antaŭ nelonge kiam li ekvojaĝis al la orienta Siĉŭanon por pretigi varojn, li renkontis la maljunan pramiston ĉe pramejo. Vidinte la junulon, la maljuna pramisto, kiu ŝajne jam forgesis la pasintan okazaĵon, alparolis lin.

“Moŝto la Dua, estas penige fari longan vojaĝon al la orienta Siĉŭano sub la junia ardanta suno, ĉu ne?”

“Por vivteni min, eĉ se fajrego brulus super mia kapo, mi devus ekiri!”

“Por vivteni vin! Ĉu manĝaĵo mankus al vi, Moŝto la Dua!”

“Eĉ se ne mankus al mi manĝaĵo, mia patro diras, ke la junuloj ne devus esti nenifaranto en la hejmo!”

“Ĉu via patro fartas bone?”

“Li povas manĝi kaj labori. Li ne fartas malbone.”

“Pro la morto de via frato via patro aspektas multe marasma kaj malvigla!”

Aŭdinte tion, la junulo mutiĝis kaj nur rigardis la blankan pagodeton malantaŭ la kabano de la maljunulo. Li ŝajne ekmemoris pri la paseo de tiu nokto, dronante en granda ĉagreno. La maljunulo ĵetis timeman rigardon al la junulo. Rideto naĝis al lia vizaĝo.

“Moŝto la Dua, Cuicui diras, ke ŝi sonĝis en maja nokto...”

Dirante, li ĵetis alian ekrigardon al la junulo. Vidinte, ke li montris nek surpriziĝon nek malŝaton, la maljunulo daŭrigis:

“Ŝi havis strangan sonĝon, ke ŝi leviĝis pro ies kantvoĉo, ŝvebis al alta roklifo kaj tie plukis faskon da saksifragoj!”

La junulo turnis sian kapon flanken kaj altrudis amaran rideton, pensante, ke la maljunulaĉo vere povas afekti sin. Tio, pri kio li pensis, ŝajne riveligis en lia amara rideto kaj estis vidata de la maljunulo. La pramisto demandis:

“Ĉu vi ne kredas, Moŝto la Dua?”

“Kial ne? Ĉar mi stulte kantadis sur tiu roklifo tra la tuta nokto!” diris la junulo.

Embarasite pro liaj neatenditaj veraj vortoj, la maljunulo balbute diris:

“Tio estas vera... tio estas malvera...”

“Kial ne vera? Tianbao mortis, ĉu tio ne estas vera?”

“Sed...sed...”

La maljunulo volus certiĝi pri tio, kio okazis tiun nokton, sed kiam li komencis fari rakontadon, li jam uzis eraran metodon, tiel ke Moŝto la Dua miskomprenis lin. Apenaŭ li volis laŭlitere rakonti tiunoktan okazaĵon, la boato albordiĝis. La junulo eksaltis sur la bordon kaj volis foriri. Sur la pruo la maljunulo konfuzite diris:

“Atendu momenton, Moŝto la Dua. Mi havas vorton por diri al vi. Vi ĵus menciis...ke vi stulte kantadis, ĉu ne? Vi fakte ne estas stulta. Via kantado vere igis aŭskultantojn stultaj!”

Kvankam la junulo haltis, li mallaŭte diris:

“Sufiĉe. Ne plu diru tion.”

La maljunulo diris:

“Moŝto la Dua, mi aŭdis, ke vi preferas la pramboaton ol la muelejon. Tion Grumo Yang diris al mi. Ĉu tio ne estas vera?”

“Kion do, se mi volas la pramboaton?” demandis la junulo.

Vidinte lian mienon, la maljunulo eksentis ĝojon. Li nereteneble laŭte vokis al Cuicui, ke ŝi malsuprenvenu al la bordo de la rivereto. Sed li ne sciis, ĉu ŝi intence ne eldomiĝas aŭ iris aliloken. Dum longa tempo li ne vidis ŝian figuron nek aŭdis ŝian voĉon por longa tempo. Atendinte kelkan tempon, Moŝto la Dua rigardis lian kondutadon senparola. Kun rideto li grandpaŝe sekvis la portiston, kiu vektoportis du korbojn kun piz-vermiĉeloj kaj sukeraĵoj.

Transgrimpinte la monteton ĉe Verda Rivereto, ili ambaŭ iris laŭ la zigzaga vojeto inter bambuoj. Tiam la portisto diris:

“Nuosong Moŝto la Dua, mi juĝas laŭ la aspekto de la pramisto, ke li tre ŝatas vin!”

Moŝto la Dua sin tenis silenta. La portisto aldonis:

“Moŝto la Dua, li demandis al vi, ĉu vi volas la muelejon aŭ la pramboaton. Ĉu vi vere fariĝos lia bonepo kaj transprenos lian pramboaton?”

Moŝto la Dua ekridetis. La portisto daŭrigis:

“Moŝto la Dua, se mi estus vi, mi volus la muelejon. La taga profito de muelejo estas sep ŝeng-oj¹⁵ da rizo kaj tri doŭ-oj¹⁶ da brano.”

Moŝto la Dua diris:

“Kiam mi revenos, mi petos al mia patro sendi svatanton por vi al Zhongzhai-vilaĝo, tiel ke vi povos gajni la muelejon. Miaparte, mi pensas, ke la pramboato bone konvenas al mi. Nur tiu maljunulo estas postulema kaj nedecidema, alie Moŝto la Unua ne mortus.”

Vidinte Moŝton la Dua foriri, la maljuna pramisto sentis malĝojon pro tio, ke Cuicui ankoraŭ ne alvenis. Kiam li reiris hejmen, li trovis ke ŝi forestas. Post kelka tempo, ŝi, kun korbo en la mano, revenis el de la monteto. Frumatene ŝi jam eliris kolekti bambuŝosojn.

“Cuicui, mi vokis vin longan tempon, sed vi ne aŭdis!”

“Pro kio vi vokadis min?”

“Unu pasaĝero...konato kaj mi parolis pri vi... Mi vokis vin, sed vi ne respondis!”

“Kiu li estas?”

“Divenu, Cuicui. Li ne estas fremdulo... Vi konas lin!”

Ekpensante pri la dialogo en bambuaro, kiun ŝi ĵus kaptis, ŝi ruĝiĝis kaj sin tenis silenta dum longa tempo.

La maljunulo demandis:

“Kiom da bambuŝosojn vi kolektis, Cuicui?”

¹⁵ *Ŝeng-o*: tradicia ĉina mezurunuo de kapacito por greno, valoranta unu litron proksimume.

¹⁶ *Doŭ-o*: tradicia ĉina mezurunuo de kapacito por greno, egalanta dek ŝeng-ojn.

Ŝi elverŝis ĉion el la korbo sur la teron: nur ĉirkaŭ dek bambuŝosoj kaj faskego da saksifragoj. Li jetis ekrigardon al ŝi kaj ŝi forkuris kun ruĝiĝintaj vangoj.

18

Monato forpasis kviete. La kordoloro de ĉiuj homoj ŝajne resaniĝis dum la longaj someraj tagoj. Estis varmege. Ĉiuj povis fari nenion alian ol ŝviti kaj trinki malvarman vinon. Ŝajnis, ke nenio pri amo restis en la koro de homoj. Cuicui siestis en la ombro de la pagodeto sur la malvarmeta altaĵo ĉiutage. En la bambuaj tufoj inter du montoj troviĝis diversspecaj birdoj, kies ĉirpado moligis ŝian koron, ŝvebigis ŝin en la sonĝo kaj igis ŝin fari tre absurdajn sonĝojn.

Tio ne estas homa peko. Poetoj povas verki volumon post volumon da poemoj nur pro ia bagatelo, skulptistoj povas skulpti versimilajn homajn figurojn nur sur unu ŝtonpeco kaj pentristoj povas produkti magie allogajn kolorajn pentraĵojn nur per la koloroj de verde, ruĝo kaj grizo. Kiu el ili ne povas krei tiujn mirindaĵojn aŭ pro ia rideto, kiun li sopiras, aŭ pro ia brovokuntiriĝo, kiu restas en lia memoro? Tamen Cuicui ne povis per parolturnoj aŭ ŝtonoj esprimi siajn amon aŭ malamon sur alia objekto, sed nur galopigi sian menson sur absurda afero. El la konfidenco ŝi ofte gajnis ekscitecon de surprizo kaj ĝojo. La neprognozebla estonteco multe skuis ŝiajn sentojn, sed ne povis kaŝi sian sekreton de sia avo.

Liaparte, Avo havis klaran penson pri ĉio ŝia, sed fakte li ankaŭ estis senscia homo. Li certis, ke ŝi ne malŝatas Moŝton la Duan, sed li ne sciis, kia li estas lastatempe. Kvankam la maljunulo renkontis flegmon de Sunsun kaj lia dua filo, li ne senkuraĝiĝis.

“Estas dece, ke ni devas fari bonajn aranĝojn. Ĉio dependas de la sorto!” li tiel pensis kaj samtempe asertis, ke estas longa tempo antaŭ ol plenumi la bonan aferon. Eĉ liaj taglumaj ŝonĝoj estis multe pli senbazaj kaj fantaziaj ol tiuj de lia nepino. Li petis de lokaj pasaĝeroj la informojn pri la vivo de Moŝto la Dua kaj lia patro kaj montris sian zorgemon al ili kiel al la familianoj. Estis strange, ke li eĉ timis vidi la duopon pro tio. Kiam la maljunulo vidis ilin, li kunfrotis siajn manojn laŭ sia kutimo kaj tute perdis sian aplombecon. Dume Moŝto la Dua kaj lia patro sciis, kio kasiĝas en lia koro, sed la malhela ombro de la mortinto jam estis triste inkrustita en ilia menso. Pro tio ili ŝajnis sin nekompreneblaj pri tio, kion la maljunulo pripensas, kaj vivis plu senŝanĝe kiel antaŭe.

Avo ne sonĝis nokte, sed kiam li babilis kun Cuicui matene, li parolis:

“Cuicui, lastnokte mi havis teruran sonĝon!”

“Kian teruran sonĝon vi havis?” ŝi demandis.

Afekte pensante pri la sonĝo kaj rigardante ŝiajn vizaĝeton kaj longajn brovojn, li rakontis la sonĝon, kiun li faris en taglumo. Por nenecese diri, liaj tiuj sonĝoj ne estis tiel teruraj kiel li priskribis.

Ĉiuj riveroj fluas en la maron. Kvankam liaj paroloj vagis malproksimen pri aliaj temoj komence, finfine li tamen iris al la afero, kiu ruĝigis ŝian vizaĝon. Kiam ŝi montris iom da malĝojo kaj embaraso, la maljunulo ŝajne timigite kaj haste faris klarigojn kaj kaŝis la veron de liaj paroloj per aliaj nekoncernaj vortoj.

“Tio ne estas mia intenco, Cuicui. Mi estas maljuna kaj konfuzmensa. Multas ridindaĵoj en miaj paroloj.”

Sed kelkfoje ŝi eĉ kviete aŭskultis plu al liaj ridindaj kaj malordaj paroloj ĝis ŝi fine ekridetis, kunpremante la lipojn.

Ankaŭ ŝi abrupte elbuŝigis:

“Vere vi estas iom konfuzmensa, avĉjo!”

Aŭdinte tion, li ne plu eligis voĉon. Li volus diri: “Mi havas amason da aferoj en mia koro”, sed antaŭ ol li eldiris tion, li estis alvokita de pasaĝeroj, kiuj bezonis pramiĝon.

Pro varmega vetero, la pasaĝeroj, kiuj alvenis de malproksime, vektoportante ŝarĝojn pezajn je sepdek ĝis okdek ĝinoj, ne volis tuj enboatiĝi kaj haltis por refreŝigi sin ĉe la rivereto. Kaŭrante ĉe la vazego piede de la rokego, ili trinkis malvarman teon kaj kunĝuis pipfumadon, babilante kun la pramisto. Multajn senbazajn rakontojn el ilia buŝo la maljuna pramisto eĉ tute akceptis. Kelkfoje la pasaĝeroj, ŝatante la puran riverakvon, lavis siajn piedojn kaj bani sin ĉe la rivereto. Ju pli longe ili sidis, des pli multe ili babilis. La maljunulo transdiris tiujn vortojn al sia nepino kaj ŝi rikoltis multon el tiuj babiloj: altiĝo kaj malaltiĝo de varaj prezoj, la kostoj de veturado per portseĝo aŭ boato, kiel flosistoj manovras dek remstangojn tra rapidfluo, kiel la virinoj sen vinditaj piedoj bruligi opion por gastoj sur la boato, k.s.

Nuosong, Moŝto la Dua, revenis al Chadong, eskortante varojn el la orienta Siĉŭano. Proksime al vesperiĝo, Avo kaj Cuicui prizorgis plantidojn de rafanoj en la legoma ĝardeno. Pro longa siestado, ŝi sentis sin iom soleca. Ŝajne aŭdinte la vokadon por pramiĝo, ŝi tuj iris al la bordo de la rivereto. Kiam ŝi malsupreniris laŭ la kota ŝtuparo, ŝi vidis du homojn stari ĉe la kajo. Ili dorsoj tre klare distingiĝis en la lumo de la subiranta suno. Ili estis Nuosong, Moŝto la Dua kaj lia servisto! Multe surprizite, ŝi, kiel besteto vidis ĉasiston, forfuĝis en la bambuajn tufojn sur la monto. Kiam tiuj atendantoj, je paŝbruo, turnis sian kapon kaj sciigis, kio okazis. Post kelktempa atendado, ankoraŭ ne vidiĝis pramisto. Ili vole nevole alvokis plengorĝe la pramiston.

Aŭdinte klaran vokadon, la maljuna pramisto ankoraŭ kaŭris kaj nombris la plantidojn de rafanoj en la ĝardeno, trovinte tion ridinda. Kiam li vidis Cuicui foriri, li sciis, ke Cuicui certe sciis, kiu estas la prameto, kaj li intence ne donis atenton. Pro tio, ke Cuicui estis juna kaj ne mastris la boaton, se ili petis al ŝi, sed se ŝi ne konsentis, ili povis fari nenion alian ol pete krii plengorĝe. La servisto vokadis kelkfoje, sed vidinte nenion alveni, li ĉesis krii kaj diris al Moŝto la Dua:

“Kio okazis! Ĉu la maljunulo malsaniĝis kaj nur Cuicui sola prizorgas la pramboaton?”

Moŝto la Dua diris:

“Ni atendu plu. Tio estas nenio!”

Kaj ili atendis plu. Dum ili kviete atendis, la maljunulo en la ĝardeno pensis: “Ĉu li estas Moŝto la Dua?” Kvazaŭ timante, ke li kolerigos ŝin per sia interveno, li restis kaŭanta senmove.

Post alia tempdaŭro aŭdiĝis vokado el la bordo. Ĉifoje la vokado malsamis kaj ĝi estis voĉo de Moŝto la Dua. Ĉu li koleras? Ĉu li atendas tro longe? Ĉu ili kverelis? Kun malordaj pensoj li kuris al la bordo. Kiam li atingis la bordon, li vidis du homojn jam enboatiĝis kaj unu el ili estis Moŝto la Dua. La maljunulo mirplene kriis:

“Aĥ, vi revenis, Moŝto la Dua!”

Malbonhumore la junulo respondis:

“Mi revenis... Kio okazis al vi! Mi atendis longan tempon, sed neniu vidiĝis por veturigi la pramboaton!”

“Mi pensis...”

La maljunulo rigardis ĉirkaŭen kaj ne vidis spuron de Cuicui. Kiam li vidis la hundon alkuri el la bambua tufo, li sciis, ke ŝi jam suriris la monton. Kaj li ŝanĝis la paroltemon:

“Mi pensis, ke vi jam pramiĝis transen.”

“Pramiĝi transen! Se vi ne ĉeestus en la boato, kiu kuraĝus tiri la boaton?”

Kiam la servisto diris tion, akvobirdo fluge tranĉis la akvon.

“Birdoj jam reiris al sia nesto. Kaj ni devas hasti hejmen por vespermanĝo!”

“Ankoraŭ frue. Estos frue, kiam vi atingos la apudriveran straton,” dirante, la maljunulo saltis sur la pruan kaj parolis en si: “Ĉu vi ne volas heredi ĉi tiun pramboaton!” Li ektiris la kablون kaj la boato ekiris de la bordo.

“Moŝto la Dua, vojaĝo estas peniga...”

Dum la maljunulo parolis, la junulo aŭskultis senesprime kaj senemocie. Kiam la boato albordiĝis, la junulo kaj lia servisto vektoportanta du korbojn foriris grimpi la monteton. Tio impresis la maljunulon flegme. Malantaŭ ilia dorso la maljunulo firme pugnis la manon, svingis ĝin trifoje kaj minace muĝetis. Post tio li tiris returnen la boaton.

19

Cuicui forkuris en bambuan arbareton kaj la maljuna pramisto ne enboatiĝis dum longa tempo. En la okuloj de Nuosong tio estis malfavora signo al li. Kvankam tio, kion la maljuna pramisto diris, implicis, ke la afero estos sukceso, lia evitema parolo tamen ne povus certigi la sukceson. Kiam Nuosong ekpensis pri sia frato, li miskomprenis la intencon de la maljunulo. Li sentis iom da kolero kaj ĉagreniĝo. Tri tagojn post kiam li revenis hejmen, sendito de Zhongzhai-vilaĝo venis por informiĝi pri lia edziĝo, kaj loĝis en la domo de Sunsun. La sendito demandis al Sunsun, ĉu Moŝto la Dua intencas akcepti la novan muelejon, kaj Sunsun al Nuosong demandis ties opinion pri la svatado.

Nuosong diris:

“Paĉjo, se vi aparte vi opinias, ke aldoniĝos muelejo kaj bofilino en via familio kaj vi sentos ĝojon, do vi akceptos la svatadon. Sed se vi konsideras tion por mi, mi devas bone pensi pri tio. Mi decidu post kelkaj tagoj. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi akceptos muelejon aŭ pramboaton. Eble mia sorto decidus, ke mi estas permesata zorgi pri la pramboato!”

La sendito batis tiujn vortojn en sian kapon kaj reiris al Zhongzhai-vilaĝo fari raporton. Kiam li iris al la pramejo kaj vidis la pramiston, je ekpenso pri tio, kion Moŝto la Dua diris, li vole nevole montris sian rideton. Sciiĝinte, ke li devenis de Zhongzhai-vilaĝo, la maljuna pramisto demandis, kial tiu venis al Chadong.

La diskreta sendito diris:

“Mi havas nenion por fari ĉi tie. Mi nur fari viziton al Sunsun kaj babilis kun li kelkan tempon.”

“Vi ne povas veni ĉi tien sen misio. Vi certe babilis pri io!”

“Kelkajn vortojn ni ja interŝanĝis.”

“Pri kio vi babilis?”

La sendito ne plu respondis, sed la maljuna pramisto demandis:

“Mi aŭdis, ke homo de via Zhongzhai-vilaĝo volas donaci la muelejon ĉe la rivero kaj sian filinon al Sunsun. Ĉu tio promesas ian esperon?”

Kun rideto la sendito diris:

“La afero estas interkonsentita. Mi jam demandis al Sunsun kaj li tre volontas boparenciĝi kun la homo de Zhongzhai-vilaĝo. Ankaŭ mi demandis al la junulo...”

“Kio estas lia opinio?”

“Li diris: ‘Antaŭ mi troviĝas muelejo kaj pramboato. Antaŭe mi volus la pramboaton kaj nun mi decidis voli la muelejon.’ La pramboato estas movema kaj ĝi ne estas tiel fiksa kiel la muelejo. Tiu junulo vere lertas en kalkulado.”

La sendito estis makleristo en riza merkato. Lia parolo estis tre deca. Li klare sciis, kion “la pramboato” aludas, sed li ne malkaŝis la fakton. Vidinte, ke la maljuna pramisto movetis siajn lipojn kaj volis diri ion, la sendito tuj diris antaŭ li:

“Ĉio dependas de la sorto, homoj povas fari nenion. Oni ne povas imagi, ke Moŝto la Unua de Sunsun, kun imponaj trajtoj, eĉ kompatinde dronus en la rivero!”

Tiuj vortoj donis pikon al la koro de la maljunulo kaj li retenis, kion li volis diri. Post kiam la sendito surbordiĝis kaj foriris, la maljunulo stulte staris sur la pruo por longa tempo. Rememorante la flegman mienon de Moŝto la Dua, li naskis ankoraŭ pli grandan malĝojon.

Cuicui tre ĝoje ludis ĉe la piedo de la pagodeto. Ŝi suriris altan rokon supre de la rivereto kaj vokis al sia avo, ke li kantas. Vidinte, ke ŝia avo ne donas al ŝi atenton, ŝi plendeme malsupreniris al la bordo. Tie ŝi vidis sian avon en granda deprimiĝo kaj ne sciis kial. Kiam ŝi alvenis, je ekvido de ŝia ĝoja mieno sur la sun-brunigita vizaĝo, li montris krudan rideton. Vidinte, ke estas pasaĝero kun ŝarĝo sur la ŝultro, li silente kablitoris la boaton al transa bordo kaj kiam la boato sin trovis meze de la rivereto, li laŭte ekkantis. Post kiam li prame veturigis la homon transen, li saltis sur la bordon kaj aliris al Cuicui, ankoraŭ kun kruda rideto, kovrante sian frunton per la mano.

Ŝi demandis:

“Kio okazas al vi, avêjo? Ĉu vi estas sunfrapita? Iru en ombron por kelka ripozo. Mi zorgu pri la pramboato!”

“Zorgu pri la pramboato. Bone, mi metu la boaton sub vian zorgon!”

Verŝajne la maljunulo estis sunfrapita. Li havis la senton de sufokeco. Kvankam li ŝajnis sin aspekti en bona sano antaŭ la vizaĝo de sia nepino, li sola reiris hejmen, pikis siajn brakojn kaj femurojn per disrompita porcelanpeco, ellasis iom da nigra sango kaj kuŝiĝis sur la liton por dormo.

Zorgante sola pri la boato, Cuicui sentis strangan ĝojon. Ŝi pensis: “Avêjo ne kantis por mi, sed mi povas kanti!”

Ŝi kantis multajn kantojn. Kuŝante enlite kun fermitaj okuloj, la maljunulo aŭskultis ĉiujn kantvortojn, kun malordaj pensoj. Li sciis, ke tio ne estas serioza malsano, kiu povas najligi lin al la lito, kaj morgaŭ li povos leviĝi el la lito. Li volos iri urbeten kaj fari pririgardon sur la apudrivera strato. Kaj li ekpensis pri multaj aliaj aferoj.

Sed la sekvan tagon, kvankam li povis leviĝi el la lito, li sentis pezan kapon. Li vere malsaniĝis. Cuicui fariĝis pli konsiderema. Ŝi preparis dekoktaĵon kaj devigis sian avon eltrinki, plukis kelkajn ajlotigojn en la legomĝardeno malantaŭ la kabano kaj maceris ilin en rizsupon kiel moderigajn kuracilojn. Zorgante pri la boato, ŝi trovis tempon kaj reiris hejmen vidi Avon kaj demandi al li pri tio kaj alio. Li diris nenion, nur suferante de sekreto. Post tri tagoj li eĉ sukcesis resaniĝi. Promenante ĉirkaŭ la kabano, li trovis sin ankoraŭ multe pli bona tra la tuta korpo. Kun unu afero sur la koro li pretis iri al la apudrivera strato en la urbeton. Ŝi deadmonis lin iri urben, ĉar ŝi povis vidi, ke li ne havas urĝajn aferojn kaj nenecese iros urben tiun tagon.

Kunfrotante siajn manojn, la maljunulo konsideris, ĉu li devas eldiri la kialon. Rigardante ŝiajn brunan pintan vizaĝon kaj brilplenajn okulojn, li eligis elspiron. Li diris:

“Mi havas urĝan aferon kaj mi devas iri hodiaŭ!”

Kun amara rideto ŝi diris:

“Kian urĝan aferon vi havas? Ĉu vi iros...”

La maljunulo konis ŝian temperamenton. Aŭdinte ŝian koleran tonon, li ne insistis iri. Demetinte la bambuan tubon kaj broditan dusakon sur la tablon, kiujn li pretis kunporti, li kajoleme ridetis:

“Lasu do. Vi timas, ke mi mortos pro stumblado, do mi ne iros. Mi pensas, ke, ĉar matene ne estas varme, mi faros la aferon en la urbeto kaj mi tuj revenos... do mi ne iros nun. Mi iros morgaŭ!”

Ŝi tenere kaj softe diris:

“Estas bone, ke vi iros morgaŭ. Viaj kruroj estas ankoraŭ molaj. Kuŝu unu tagon kaj poste ellitiĝu.”

Ŝajne kun malvolonteco en la koro li svingis siajn brakojn kaj irante al la pordo, li preskaŭ falis stumbligite de batilo uzita por fari pajlajn sandalojn. Kiam li stabile starigis sin, ŝi diris kun amara rideto:

“Jen, avĉjo, ĉu vi ankoraŭ insistas!”

Levinte la batilon, li ĵetis ĝin al la murangulo, dirante:

“Mi ja estas maljuna! Post kelkaj tagoj mi ĉasos leopardon por vi!”

Posttagmeze pluvis kelkan tempon. Post interkonsiliĝo kun Cuicui, la maljuna pramisto iris urbeten. Ŝi ne povis akompani sian avon kaj ordonis la hundon sekvi lin. En la urbeto la maljunulo babilis kun konato pri la prezoj de salo kaj rizo kaj pririgardis la nove aĉetitajn ĉevalojn ĉe la jameno de la garnizono. Kaj post tio li iris al la hejmo de Sunsun en la apudrivera strato. Tie Sunsun ludis kartojn kun tri aliaj kaj Avo rigardis ilian ludadon pro maloportuneco babili kun Sunsun. Poste Sunsun invitis lin al drinkado kaj li dankeme rifuzis, preteksante, ke li ĵus resaniĝis. Ĉar la ludado de kartoj daŭris, la maljunulo ne volis tuj foriri. Sunsun ŝajne ne komprenis, kion li volas diri atendante, kaj nur donis atenton al la kartoj en la mano. Poste alia ludanto vidis lian mienon kaj demandis, kian aferon li havas. Honteme kunfrotante siajn manojn, la maljunulo diris, ke li ne havas aliajn aferojn kaj nur volas babili iom kun Sunsun, la superreganto de la kajo.

Sunsun venis al la kompreno, kial li atendis longan tempon, rigardante ludadon. Turninte sian kapon al li, Sunsun ekridetis.

“Kial vi ne diris tion pli frue? Ĉar vi ne diris, mi pensas, ke vi lernas de mi, kiel ludi kartojn.”

“Estas nenio. Mi timas, ke mi ĝenas vin, tial mi ne kuraĝas diri nur tiujn kelkajn vortojn.”

Sunsun ŝutis kartojn sur la tablon kaj ridete iris al la malantaŭa ĉambro. Lin sekvis la maljunulo.

“Kian aferon vi havas?” demandante, Sunsun montris iom da kompaton al li, kvazaŭ li jam sciis, kion li volas diri pro la vizito.

“Mi aŭdis de vilaĝano de Zhongzhai, ke vi pretas boparenciĝi kun la ĉefkomandanto de Zhongzhai. Ĉu tio estas vera?”

Vidinte, ke la maljunulo fikse rigardas lin por akiri kontentigan respondon, Sunsun diris:

“Tio estas vera.”

Tiamaniere respondinte, Sunsun volus esprimi alian sencon: “Kion vi faros, se tio estas vera?”

“Ĉu vere?” demandis la maljunulo.

“Vere,” Sunsun nature respondis, ankoraŭ kun la implicita senco “Kion vi faros, se tio estas vera?”

“Kie troviĝas Moŝto la Dua?” demandis la maljunulo, ŝajnigante sin tre aplomba.

“Li veturis per ĵonko al Taoyuan jam plurajn tagojn!” aŭdiĝis la respondo.

Okazis, ke Moŝto la Dua veturis al Taoyuan pro tio, ke li kverelis kun sia patro. Kvankam Sunsun estis tre grandanima, li tamen ne volontis edzinigi al sia dua filo la knabinon, kiu nerekte kaŭzis la morton de lia plejaĝa filo. Tio estis klara fakto. Laŭ la loka moro oni konsideris, ke tio estas la afero de gefiloj, kaj gepatroj ne rajtas enmiksiĝi. Se Moŝto la Dua kaj Cuicui vere enamiĝis unu al la alia, Sunsun ne kontraŭstaris tiun geedziĝon implikitan per amo kaj malamo. Sed oni ne sciis, kial la zorgemo de la maljuna pramisto pri la afero vekis miskomprenon ĉe Moŝto la Dua kaj lia patro. Pensante, ke lastatempaj okazaĵoj inter la du familioj ĉiuj rilatis al la maljuna kaj enmiksiĝema pramisto. Kvankam Sunsun ne montris sian malŝaton sur la vizaĝo, li tamen ekhavis oston en la gorĝo.

Antaŭ ol la pramisto diris plue, la superreganto de la kajo parolis per iom kruda tono:

“Lasu tion do, oĉjo. Nia buŝo taŭgas nur por drinki, sed ne kantas por gejunuloj! Tion, kion vi volas diris, mi tute komprenas. Vi havas bonan intencon. Sed mi petas, ke vi penu kompreni min. Mi pensas, ke ni devas babilu pri niaj propraj aferoj, sed ne pri tiuj de gejunuloj.”

Tiuj vortoj kvazaŭ peza pugno batis la maljunulon. Li volis diri kelkajn vortojn, sed Sunsun ne donis ŝancon kaj trenis lin al la tablo de karto-ludado.

La maljunulo diris nenion. Kiam li ĵetis ekrigardon al Sunsun, tiu ridete serĉis multe, sed li ŝajne kaŝante mornecon en la koro, peze ĵetis kartojn sur la tablon. Sen diri ion ajn la maljunulo surportis sian bambuan ĉapelon kaj foriris.

Estis tre frue kaj la malbonhumora maljunulo iris urbeten por serĉi Grumon Yang. Yang estis drinkanta kaj la maljunulo vole nevole trinkis kelkajn tasojn, kvankam li diris, ke li estas en malsano. Kiam li atingis sian hejmon ĉe Verda Rivereto, li sentis sin varma pro vojirado kaj lavis al si la torson per riverakvo. Pro laceco li ordonis al Cuicui prizorgi la pramboaton kaj li mem eniris la kabanon por dormo.

Estis tre sufoko ĉe vesperiĝo. Ĉie super la surfaco de la rivereto flugis ruĝaj libeloj. Nuboj kolektiĝis sur la ĉielo kaj la varma vento brue blovis la bambuajn tufojn sur la du montetoj. Ŝajnis, ke pluvegos nokte. Atendante en la boato, Cuicui rigardis ir-reire flugantajn libelojn super la riveretsurfaco kaj sentis sin konfuzita. Vidinte la palan mienon de Avo, ŝi maltrankviliĝis kaj hastis al la kabano. Ŝi pensis, ke ŝia avo certe jam endormiĝis, sed ŝi neniel imagis, ke li eĉ plektas pajlajn sandalojn sidante sur la sojlo!

“Kiom da pajlaj sandalojn vi bezonas, avĉjo? Ĉu estas dek kvar paroj ĉe litkapo? Kial vi ne bone kuŝas sur la lito?”

Senparola, li stariĝis kaj rigardis supren al la ĉielo kaj mallaŭte diris:

“Ĉi-nokte pluvegos kaj tondregos! Iom poste ni ligos la boaton sub la rokon. Estos pluvego.”

“Mi vere timas, avĉjo!”

Ŝajnis, ke tio, kion ŝi timas, ne estas la ĉi-nokta pluvego.

La maljunulo ŝajne ankaŭ komprenis, kion ŝi celis, kaj diris:

“Kion vi timas? Ĉio, kio venos, okazos. Ne necesas timi!”

Ĉapitro 8

20

Vere pluvegis kaj terure tondregis dumnokte. Kiam fulmo tanĝis la firston de la tegmento, eksplodis tondro. Cuicui tremetis en mallumo. La avo ankaŭ vekigis. Sciante, ke ŝi timas, li ellitiĝis kaj metis tolan tukon sur ŝiajn ŝultrojn kontraŭ malvarmumiĝo. Li diris:

“Ne timu, Cuicui!”

“Mi ne timas!” ŝi diris. Apenaŭ ŝi volis diri: “Mi ne timas, se vi estas ĉe mi!”, eksplode tondris kaj aŭdiĝis obtuza sono de falego pli laŭta ol bruado de pluvado. Ili certis, ke la ĉeborda klifo falegis kaj eble subpremis la pramboaton.

Avo kaj lia nepino silente kuŝis sur la lito, aŭskultante al sonoj de tondrado kaj pluvado.

Malgraŭ pluvego ŝi baldaŭ endormiĝis. Kiam ŝi revekiĝis, jam tagiĝis. Ŝi ne sciis, kiam pluvado ĉesiĝis, kaj ŝi aŭdis fluadon de montvala akvo en la rivereton. Ŝi leviĝis el la lito, kaj vidinte sian avon bone dormanta, ŝi malfermis la pordon kaj eliris. Antaŭ la pordo jam estiĝis kanaletoj, malgranda fluo lirlis el malantaŭ la pagodeto kaj rekte sin ĵetis malsupren de la antaŭa rokklifo. Ĉie troviĝis tiaj portempaj fluejoj. La legoma ĝardeno apud la kabano jam malorde forlaviĝis de montakvo kaj la plantidoj de legomoj esti enterigitaj sub krudaj kotaj sabloj. Iom antaŭenirinte kaj ĵetinte sian rigardon al la rivereto, ŝi vidis, ke la rivereto jam multe ŝveliĝis kaj la rivereto jam superakvis la kajon kaj atingis preskaŭ ĝis la piedo de la teo-vazego antaŭ la kabano. En la pasejo kondukanta al la kajo elverŝiĝis brue flava kotakvo. La kablo fiksita trans la rivereto por pramiĝo ankaŭ dronis en akvo kaj la pramboato ankrita sub la klifo jam malaperis.

Ĉar ŝi vidis, ke la klifo antaŭ la kabano ne falis, ŝi ne rimarkis la perdiĝon de la pramboato. Post kelkaj momentoj ŝi vane serĉis ĝin tie kaj ĉi tie kaj senintence trovis malaperinta la blankan pagodeton malantaŭ la kabano. Multe surprizite, ŝi hastis malantaŭ la kabanon kaj sciiĝis, ke ĝi jam falis kaj nur malorde sterniĝis rompigitaj brikoj kaj ŝtonoj. Pro konfuziteco ŝi senrimede akutvoĉe vokis sian avon. Ne lia figuro vidiĝis nek lia respondo venis. Ŝi hasteme endormiĝis kaj skuis lin ĉe lia lito longan tempon, sed li ankoraŭ ne eligis voĉon. Okazis, ke li jam mortis antaŭ ol tondropluvo ĉesis.

Ŝi ekploregis.

Post kelka tempo iu homo, kiu volis afervojaĝi de Chadong al la orienta Siĉŭano, atingis la transan bordon kaj krie petis pramiĝon. Tiam Cuicui, plorante, boligis akvon ĉe la forno kaj pretis viŝi la korpon de la mortinta avo per boligita akvo.

La vokanto supozis, ke la maljuna pramisto ankoraŭ dormas, tiel ke li ne donas respondon. Pro urĝeco la vokanto ĵetis ŝtoneton trans la rivereton kaj ĝi falis sur la tegmenton. Cuicui, kun la vizaĝo plena je larmoj kaj nazmukaĵo, eliris kaj staris sur la alta rokklifo ĉe la rando de la rivereto.

“Hoj, estas ne frue! Altiru la boaton!”

“Ĝi jam malaperis!”

“Kion via avo faris do? Ĉar li prizorgas la boaton, estas lia kulpo!”

“Li prizorgas la boaton dum kvindek jaroj...sed li jam mortis!”

Dirante al la transa bordo, ŝi ploregis. Sciinte pri la morto de la maljunulo, li devis iri urbeten kaj fari raporton. Kaj li diris:

“Ĉu li vere mortis? Ne ploru. Mi reiru kaj informos ilin, ke oni alportos boaton kaj aliajn necesajojn!”

Proksime al la urbeto, kiam li renkontis konaton, li raportis al li la novaĵon. Baldaŭ la tuta urbeto sciigis pri la afero. Sunsun, la superreganto de la kajo, sendis venigi malplenan boaton kaj ĉerkon el simplaj lignotabuloj kaj senprokraste remis al Verda Rivereto. Grumo Yang kaj maljuna soldato ankaŭ hastis al la kabano de la maljuna pramisto. Ili dehakis kelkdek bambuojn por kunigi ilin per liano en floson kiel provizoran pramilon. Ili irigis la floson trans la rivereton al la bordo antaŭ ŝia kabano. Yang ordonis al la maljuna soldato gardi la floson kaj li rapidis supren por pririgardi la mortinton. Kun larmoplenaj okuloj li iom palpis sian malnovan amikon rigide kuŝantan en la lito kaj tuj faris kelkajn necesajn aferojn. Poste alvenis helpantoj kaj alportiĝis la ĉerko. La taŭista pastro, kiu loĝis en la urbeto, veturis per la floso trans la rivereton kaj alvenis kunportante taŭistaj instrumentojn, vestita en kanaba robo kaj kun granda koko en la mano, por senpage celebri funebran ceremonion. Dum homoj en- kaj eliris la kabanon, Cuicui plorsingulptadis, sidante sur la tabureto ĉe la forno.

Ĉe tagmezo ankaŭ Sunsun, la superreganto de la kajo, alvenis, sekvate de homo, kiu ŝultroportis sakon da rizo, vazon da alkoholaĵo kaj porkfemuron. Je ekvido de Cuicui, li diris:

“Cuicui, mi jam scias, ke via avo mortis. Maljunulo neeviteble mortis. Ne ĉagreniĝu. Ĉio aranĝiĝos je mia kosto!” Li pririgardis ĉirkaŭen kaj foriris returnen.

Posttagmeze kiam la kadavro estis metita en la ĉerkon, kelkaj helpantoj foriris hejmen. Nokte restis nur la maljuna pastro, Grumo Yang kaj du junaj servistoj senditaj de Sunsun. Antaŭ vesperiĝo, la pastro elfaris kelkajn florojn per verda kaj ruĝa paperoj kaj kandelinojn el argilo. Kiam noktiĝis, oni bruligis flavajn kandelojn kaj incensojn sur la tablo antaŭ la ĉerko, ĉirkaŭ kiu brulis kandletoj. La maljuna pastro, vestita en taŭista robo el blua kanabotolo, komencis la ceremonion de paŝado ĉirkaŭ la ĉerko. Levante la funebran paperrubandon, li iris ĉe la kapo, Cuicui sekvis kaj Grumo Yang marŝis ĉe la vosto. Ili malrapide rondiris ĉirkaŭ la ĉerko foje kaj refoje. La du servistoj, starante ĉe la forno, frapis gongon kaj cimbalojn senritme. Kun fermitaj okuloj la maljuna pastro zume ĉantis por konsoli la mortinton. Kiam li ĉantis pri la okcidenta paradizo kun kvarsezonaĵoj floraromoj, kien la mortinto iros, Yang prenis paperflorojn el la ligna pleto kaj ĵetis ilin alten super la ĉerko por simboli la paradizon.

Ĉe noktomezo la ceremonio finiĝis. Post eksplodigo de petardoj, kandeloj preskaŭ estingiĝis. Kun larmovualitaj okuloj Cuicui haste boligis akvon kaj preparis noktan manĝeton por la helpantoj. Post manĝeto la pastro endormiĝis, kuŝante oblikve sur la lito de la mortinto. La aliaj devis vigili ĉe la ĉerko laŭ loka moro. Yang ĉantis funebrajn kantojn, tamburante la malplenan buŝelujon.

Pro tio, ke Cuicui ploradis la tutan tagon kaj okupiĝis pri funebraj aferoj ankaŭ la tutan tagon, ŝi elĉerpita endormiĝis, apogante sin al la kapo de la ĉerko. Manĝetinte kaj trinkinte du tasojn da alkoholaĵo, la du servistoj kaj Yang sin tenis viglaj kaj ĉantis funebrajn kantojn laŭvice. Tamen nur post momento Cuicui vekigis kvazaŭ el ia sonĝo. Kiam ŝi konceptis, ke ŝia avo jam mortis, ŝi malĝoje kaj seke ekploris.

“Ne ploru plu, Cuicui. Vi ne povus vekigi la mortinton per via plorado!”

Kalvulo Chen la Kvara ŝerce diris ion ridindan pri plorado de estonta novedzino, interŝovitan per kelkaj krudaj vortoj. Tio vekis longatempan ridadon ĉe la du servistoj. La hundo bojis eksterdome. Cuicui malfermis la pordon kaj staris kelkan tempon ekstere, aŭskultante al ĉirpado

de insektoj tie kaj alie. La luno lumis tre serene kaj steloj glimis sur malhele blua ĉielo kviete kaj tenere.

“Ĉu tio estas vera? Ĉu avĉjo vere mortis?” ŝi pensis.

Yang sekvis ŝin, ĉar li sciis, ke knabinoj, kiuj havas mallarĝan spiriton, aspektas kviete dum fajro subbrulas en la koro, kaj eble pro malespero mortigos sin per pendigo aŭ saltado de alta klifo. Pro tio li zorgeme gvatis ŝin la tutan tempon.

Vidinte, ke ŝi stulte staras kaj ne returnas sian kapon dum longa tempo, li ektusis kaj diris al ŝi:

“Rosas. Ĉu vi ne sentas malvarmon, Cuicui?”

“Neniom.”

“Estas tre serene!”

“Ah...” ŝi eligis mallaŭte ekkrieton, kiam falstelo tranĉis la ĉielon.

Pli poste alia falstelo en la sudo fulme trakuris sur la ĉielo kaj aŭdiĝis ululo de strigo sur la transa bordo.

“Cuicui,” Yang jam staris flankon ĉe flanko kun ŝi kaj milde diris: “Eniru la kabanon por dormo. Ne fantaziu.”

Silente ŝi reiris antaŭ la ĉerkon de sia avo, sidigis sin sur la teron kaj plorsingultis. La du servistoj, kiuj akompanis la ĉerkon, jam endormiĝis.

Yang malbonhumore diris:

“Ne plu ploru! Ne plu ploru! Ankaŭ via avo afliktiĝas. Se vi ploras ĝis ŝveliĝo de viaj okuloj kaj raŭkiĝo de via gorĝo, tio ne helpas. Aŭskultu al mi. Mi konas, kion via avo havis sur la koro. Ĉio dependas de mi. Mi bone faros ĉiujn aranĝojn por ne malesperigi vian avon. Mi aranĝu ĉion kaj mi kapablas fari ion ajn. Mi trovos homon, kiun via avo kaj vi ambaŭ ŝatas, por zorgi pri la pramboato! Se ili ne kontentigos nin, mi, kvankam grandaĝa, povos svingi falĉilon por kontraŭstari ilin per mia vivo. Cuicui, estu libera de zorgoj. Ĉio dependas de mi!...”

Malproksime koko kokerikis ie. La maljuna pastro murmure parolis al si en la lito:

“Ĉu tagiĝis? Ankoraŭ frue!”

21

Frumatene helpantoj alportis ŝnurojn kaj vektojn el la urbeto.

Kiam ses homoj vektportis la ĉerkon de la maljuna pramisto en la direkto de la montetsupro malantaŭ la disfalinta pagodeto, Sunsun, Grumo, la maljuna pastro, Cuciui kaj la hundo ilin sekvis. Atinginte la kvadratan fosaĵon antaŭtempe elfositan, la maljuna pastro ensaltis laŭ kutima praktiko. Li ŝutis iom da cinabrograjnoj kaj rizgrajnoj al kvar anguloj kaj centro de la fosaĵo, kaj bruligis iom da paperoferajojn. Elgriminte el la fosaĵo, li ordonis al portantoj mallevi la ĉekon en la fosaĵon. Raŭke plorante sen larmoj, Cuicui sin premis al la ĉerko kaj rifuzis ĝin forlasi. La Grumo perforte ŝin fortiris kaj oni sukcesis formovi la ĉerkon. Post momento ĝi malleviĝis en la fosaĵon. Oni fortiris la ŝnurojn, ĝustigis la ĉerkon en bona ordo kaj kovris ĝin per tero. Cuicui ankoraŭ plorsingultis, sidante sur la tero. Pro tio, ke la maljuna pastro reiros prezidi riton de fasto en la urbeto, li foriris pere de pramboato. La superreganto de la kajo konfidis ĉion farindan al la Grumo Yang kaj ankaŭ reiris urbeten. La helpantoj iris al la bordo kaj lavis al si manojn. Post tio ili enboatiĝis kaj foriris por siaj propraj aferoj, ne volante plu ĝeni la mastron en profunda sufero. Ĉe Verda Rivereto restis nur tri homoj: Cuicui, la maljuna Grumo kaj Kalvulo Chen la Kvara, kiun

Sunsun sendis por zorgi pri pramboato portempe. La hundo, kiu estis batita de la Kalvulo per ŝtonpeco kaj ŝajnis malamika kontraŭ li, mallaŭte bojadis.

Posttagmeze post interkonsiliĝo Cuicui volis, ke Yang iru al la urbeto kaj konfidu siajn ĉevalojn al la alia en la barako, kaj poste revenu akompani ŝin ĉe Verda Rivereto. Kiam li revenis, Kalvulo Chen la Kvara estis jam foririgita.

Cuicui kaj ŝia hundo prizorgis la pramboaton, lasante Grumon sin distri sur la alta klifo ĉe la rivereto aŭ raŭke kanti plengorĝe por ŝi.

Post tri tagoj la superreganto de la kajo alvenis preni Cuicui por loĝi en lia hejmo, sed ŝi volis prigardi la tombon de sia avo kaj ne tuj foriri. Ŝi petis, ke li transdiros al la jameno, ke Grumo Yang loĝu ĉe ŝi dum kelka tempo. Li promesis kaj foriris.

Grumo Yang, pli ol kvindek-jara, estis pli kapabla en rakontado ol ŝia avo. Kaj krome li estis tre zorgema, laborema kaj purama, tial lia akompano al ŝi ŝajne sentigis ŝin, ke, kvankam ŝi perdis sian avon, ŝi havigis al si novan onklon. Kiam aliaj demandis pri ŝia kompatinda avo dum pramiĝo aŭ ŝi mem pensis pri sia avo ĉe vespero, ŝi eksentis acidecon kaj tristecon en la koro. Sed kun la forpaso de tempo tiu tristeco iom post iom moderiĝis. Ĉiutage ĉe vespero kaj nokto, kiam, sidante sur la alta rokklifo ĉe la rivereto, ili babilis pri la malnovaj aferoj de ŝia avo sub humida tero, multaj el kiuj estis nekonataj al ŝi, ŝi eksentis mildan konsolon. Kaj li ankaŭ parolis pri ŝia patro, la soldato, kiu volis amon kaj domaĝis sian honoron, kaj pri tio, kiel li en la uniformo de la Verda Bataliono¹⁷ altiris junulinojn, kaj ankaŭ pri ŝia patrino, kiu tre lertis en kantado de siatempe tre furoraj kantoj.

Tempo ŝanĝiĝis kaj ĉio nature malsamis. Imperiestroj jam cedis la tronon, por ne paroli pri la ŝanĝoj de la ordinaraj popoloj! Grumo rememoris, ke kiam li estis juna, li kondukis ĉevalon al la Verda Rivereto por kanti al ŝia patrino, sed tiu turnis sian dorson al li. Sed nun li fariĝis la nura apoginda kaj fidinda patrono de la orfino, je ekpenso pri tio, li vole nevole montris amaran rideton.

Ĉiuvespera babilado inter ili pri ŝia avo kaj aferoj rilataj al ŝia familio iom poste iris al tiu pri ĉio antaŭ la morto de la maljuna pramisto. El tio Cuicui eksciis tiajn multajn aferojn, kiujn ŝia avo ne menciis, dum li estis viva, kiaj kantado de Moŝto la Dua, la morto de la plejaĝa filo de Sunsun, la flegmo al ŝia avo montrita de Sunsun kaj lia filo, la kialo de forvojaĝo al la malsupra baseno de Moŝto la Dua, kiu, sub la allogo de la muelejo-doto farita de la riĉulo de Zhongzhai-vilaĝo, tenis la morton de sia frato en la memoro, ne akiris ŝian atenton, unuflanke rezistis la devigon de lia patro akcepti la muelejon kaj aliflanke aminklinis al la pramboato, la kaŭzo de la morto de ŝia avo, kaj ĉio ĉi tio rilatanta al ŝi... Ĉio, kion ŝi ne komprenis, nun montriĝis en plena lumo. Pri tiuj klare klarigitaj aferoj ŝi ploradis la tutan nokton.

Kvar monatojn post fenebraĵoj Sunsun sendis irigi Grumon urbeten post diskuti pri edziniĝo de Cuicui al lia dua filo. Ĉar Moŝto la Dua troviĝas en Chenzhou, oni ne necese mencias tion kaj nur transloĝigos ŝin al lia hejmo en la apudrivera strato kaj atendos la decidon de Moŝto la Dua ĝis tiu revenos. Grumo konsideris, ke li devos peti opinion de Cuicui. Reveninte, li transdiris al ŝi, kion Sunsun proponis, kaj samtempe sian propran opinion, ke ĉar ŝi ankoraŭ ne edziniĝis al la familio de Sunsun, estas nedece loĝi en fremda familio, kaj ke ŝi prefere atendas ĉe la Verda Rivereto ĝis Mosto la Dua revenos per ĵonko kaj li faros decidon.

¹⁷ *La Verda Bataliono: verdflaga trupo el la armeo de Qing-dinastio.*

Post tia decido, Grumo pensis, ke Moŝto la Dua certe revenos post nelonge, kaj li ankoraŭ konfidis siajn ĉevalojn al la alia en la barako. Akompanante ŝin, li vivis ĉe la Verda Rivereto tagon post tago.

La blanka pagodeto onidire rilatis al la prosperiĝo de Chadong-regiono. Ĉar ĝi jam disfalis, oni devos restaŭri ĝin. Mondonacoj estis kolektitaj el garnizonejo, impostkolektejo, diversaj firmaoj, popolanoj kaj vilaĝanoj el grandaj vilaĝoj. Konstruado de la pagodeto ne donos bonon al unuopuloj kaj nur prezentas al ili ŝancon akumuli siajn meritojn pere de mondonacado. Por ke ĉiuj havu ŝancon donaci monon, metiĝis en la pramboato du bambutuboj kun po nodo ĉe ambaŭ finoj kaj fendeto ĉe la mezo, tra kiu la pasaĝeroj povis enmeti la monon. Kiam la bambutuboj plenplenis je mono, Grumo kunportis ilin al la organizanto en la urbeto. Vidinte, ke la maljuna pramisto forestas kaj la harplektaĵoj de Cuicui estas ligitaj per blankaj fadenoj, la pasaĝeroj tuj komprenis, ke la maljunulo jam plenumis sian devon kaj kviete kuŝas en la fosaĵo. Rigardante simpatie al Cuicui, ili elpoŝigis monon kaj enŝovis ĝin en la bambutubon. “La Ĉielo benas vin. La mortinto iru al la okcidenta paradizo kaj la vivanto tenu pacon eterne.” Cuicui konis, kion la donacantoj celas, kaj sentante acidecon en la koro, ŝi turnis sian dorson kaj kablortiris la boaton.

Kiam la vintro alvenis, la disfalinta blanka pagodeto denove rekonstruiĝis, sed la junulo, kiu kantadis sub la luno kaj lia kantvoĉo leĝere ŝvebigis ŝian animon en la songo, ankoraŭ ne revenis al Chadong.

...

Eble tiu junulo ne revenos por ĉiam aŭ eble li revenos morgaŭ!

verkita dum la vintro de 1933 ĝis la printempo de 1934